



Beletra Almanako

N-ro 35 (Junio 2019) – 13a jaro

ISBN 9781595693921 / ISSN 1937-3325

Redaktis: Probal Daşgupto, István Ertl, Jesper Lykke Jacobsen, Suso Moinhos, Nicola Ruggiero, Anina Stecay




Foto: Martin Wiese

Kontribuis: Miguel Bento, Gerrit Berveling, Marjorie Boulton, Jorge Camacho, Paulino Dias, István Ertl, Miguel Fernández, Hoss Firooznia, Petru Ilieşu, Jesper Lykke Jacobsen, Carolus Linnaeus, Lukiano, Sten Johansson, Miquel Martí i Pol, Suso Moinhos, Abel Montagut, Nicola Ruggiero, Katja Steele, Antonio Valén.

MONDIAL NOVJORKO

www.librejo.com

Beletra Almanako (BA)

www.beletraalmanako.com

ISSN 1937-3325

Aperas numeroj februara, junio kaj oktobra.

N-ro 35 (Junio 2019; 2019/2). ISBN 9781595693921

Eldonas: ©2019: Mondial, Novjorko (Usono)

Respondeca eldonisto: Ulrich Becker

Redaktas: Probal Daŝgupto, István Ertl, Jesper Lykke Jacobsen,
Suso Moinhos, Nicola Ruggiero, Anina Stecay. Teknika asisto: Tim Westover
Surkovrila kaj rubrikaj fotoj de Martin Wiese.

Kiel mendi / aboni? Jen du ebloj:

① **Por ricevi de nun aŭtomate ĉiun novan numeron de BA (ĝis eventuala malmendo), skribu retmesaĝon al libroservo@co.uea.org kun la indiko “Konstanta mendo de BA”.** Zorgu nur havi sufiĉe da mono en via UEA-konto. UEA debetos vian konton je ĉiu nova numero.

② Ankaŭ plu eblas (pli kosta) jarabono rekte ĉe Mondial. La **prezo** de jarabono de BA por 2018 (3 kajeroj) dependas de via loĝloko (la sendokostoj estas jam inkludataj): en Usono US\$ 42.00, ekster Usono € 42.00.

Grandaj rabatoj por abono de pli ol unu ekzemplero!

Pagu al la konto de Mondial ĉe UEA: move-x, [kaj informu la eldonejon pri via pago](#) (skribante al informo@librejo.com). **Prefere abonu tra UEA: libroservo@co.uea.org (vidu supre).** Eblas ankaŭ pagi rekte al bank-kontoj en Germanujo aŭ Usono. Demandu la eldonejon (informo@librejo.com).

Por aĉeti BA kiel bitlibron, vizitu bitlibroj.com.

Kontribuajojn oni sendu retpoŝte, prefere unikode aŭ x-alfabete, al la ret-adreso de BA: redaktejo@gmail.com.

Kontribuajoj sekvu la regulojn legeblajn ĉe:

beletraalmanako.com/kontribui

Ankaŭ fotistoj, desegnistoj, ilustristoj bonvenas. Ili bonvolu skribi al la sama redakteja ret-adreso.

Eldonejoj dezirantaj aperigon de **recenzoj** bv. sin turni al la sama redakteja ret-adreso (sufiĉas la sendo de nur unu ekzemplero rekte al la recenzonto, post interkonsento kun BA).

Por **anoncoj aŭ reklamoj**: skribu rekte al informo@librejo.com.

Ĉiujn ceterajn demandojn pri la eldonado kaj dissendo bv. direkti al: informo@librejo.com.

Pri la enhavo de la kontribuoj responsas la aŭtoroj mem. Tio validas retrospektive por ĉiuj numeroj de *Beletra Almanako* ekde BAI (septembro 2007) ĝis nun. ♦ **La lingvaĵo de kontribuoj publikigataj en BA laŭeble konformu al la komunume evoluigata ĝenerala normo**, kun NPIV (presita kaj reta) kaj PMEG kiel ĉefaj referencverkoj, interkonsente kun la aŭtoroj.

Eldonejo: Mondial, 203 W 107th Street, #6C, New York, NY 10025, Usono
Faks-numero: +1-208-361-2863; Telefono: +1-646-807-8031

Enhavo

2

Beletra Almanako n-ro 35, Junio 2019 (2019/2)

Sinprezentoj (BA-redaktoroj kaj -eldonisto)	4
Nekrologoj	8
Imre Szabó (1952-2019)	8
Emile Van Damme (1927-2019)	9
Originala prozo	10
Sten Johansson: <i>Marika</i>	11
István Ertl: <i>Vi(d)vokroniko, aŭ: Dek ok monatoj</i>	22
Miguel Fernández: <i>La lasta kanto</i> (p. 39-40)	
István Ertl: <i>/Kutim' vi estas.../</i> (p. 49)	
István Ertl: <i>/aspiras.../</i> (trad. Antonio Valén kaj la aŭtoro; p. 60)	
István Ertl: <i>Dek du rakontetoj por knabino</i> (trad. Katja Steele; p. 67-68)	
István Ertl: <i>La senfina vojaĝo</i> (trad. Hoss Firooznia kaj la aŭtoro; p. 70)	
István Ertl: <i>La senfina vojaĝo 2</i> (trad. Hoss Firooznia kaj la aŭtoro; p. 71)	
Miquel Martí i Pol: <i>Senvorte</i> (trad. István Ertl; p. 76)	
Originala poezio	77
Miguel Bento: <i>Jardeko</i>	78
Miguel Bento: <i>Décennie</i> (trad. Jesper Lykke Jacobsen)	79
Gerrit Berveling: <i>Ekpensoj (Kion do faris la Di' postkreade?; Ni en ĉi riĉaj landoj; Ni vivas en tempo ne-nia; Mia vivtempo estas ekstra; La homa strangeco; Konversacio interreligia; Pura ĉagreno; Naskiĝtago fratina; Ne la unuaj estas ni; Larmis la edzino; Kial ekkonversaciis Dio kun Adam; Postaj generacioj; Silento; Morna vetero; Rendevua paĝaro; Sentitole)</i>	80

Tradukita prozo	87
Carolus Linnaeus: <i>Iter Lapponicum – Vojaĝo al Laponio</i> (trad. kaj komentis Sten Johansson; helpis pri trad. de latinaĵoj István Ertl).....	88
Lukiano: <i>Nigrino</i> (trad. Gerrit Berveling)	103
Tradukita poezio	115
Miquel Martí i Pol: <i>Silente / Senparole</i> (trad. Abel Montagut / Antonio Valén / Jorge Camacho)	116
Paulino Dias: <i>Omaĝa soneto al Vjaso</i> (trad. Suso Moinhos).....	118
Petru Ilieșu: <i>Rumanio (pastiĉo laŭ Ginsberg)</i> (trad. Nicola Ruggiero)	120
Nekonata: <i>Perlo (I-IV)</i> (trad. Marjorie Boulton)	128
Artikolo kaj eseo	144
Suso Moinhos: <i>La vivo kaj verkoj de Vesna Skaljer-Race. Dua parto</i>	145
Recenzo	162
Jorge Camacho pri <i>Septembre, surstrate en Tokio. Granda Tertremo en la regiono Kantô 1923 – Postsono de Masakro</i> (de Katô Naoki; trad. Mamiya Midori).....	163

* * *

Kovrila kaj rubrikaj fotoj: Martin Wiese

* * *

Korektoj:

En la pasinta numero ni erare menciis, ke Nora Caragea naskiĝis en 1940, anstataŭ en 1930 (p. 9); la kvar noveloj de Álvaro Cunqueiro (p. 85) aperis dank' al la afabla permeso de la eldonejo Galaxia.

FACILA: (Kvazaŭ-)abonado de BA tra UEA!

La libroservo de UEA pretas sendi al vi aŭtomate ĉiun novan numeron de *Beletra Almanako*, tuj kiam ĝi aperas.

Vi devas okupiĝi nur pri du aferoj:

skribi unufoje retmesaĝon al libroservo@co.uea.org

kun la noto "**Konstanta mendo de BA**"

kaj havi sufiĉe da mono en via UEA-konto. Provu!

(Bonvolu mencii vian nomon kaj/aŭ UEA-kodon en via mesaĝo!)

Sinprezentoj

4

de BA-redaktoroj kaj -eldonisto

Anina Stecay

Lingvoj kaj literaturo ĉiam interesis Anina. Ŝia esperantistiĝo okazis kvazaŭ flankefike, nome studcele, kiam ŝi bezonis la lingvon por studi interlingvistikon en Poznano. Esperanto tamen ekposedis ŝian koron tiel ke ŝi poste engaĝiĝis en la movado loka, landa kaj internacia. Jam antaŭe ŝi verkis kaj publikigis prozon en la gepatra lingvo, kaj intertempe ankaŭ ekverkis en Esperanto kaj tradukas el la germana.



Ekde 2015 ŝi instruas esperantan literaturon kaj rilatajn studobjektojn en la klerigcentro de la Germana Esperanto Asocio en la Esperanto-urbo Herzberg.

István Ertl

István estas nedenaska esperantisto eventuale ĝismorta, certe ĝisosta kaj malofte kabeanta. “Naskiĝis hungaro sed evoluis.” (J. Camacho) Trafis Esperanton kiel Obelikso la grandan kaldronon. De tiam – *fluctuat nec mergitur*. Fieras fajfi pri la fundamento, kiun neniam legis. Serie serioza, kaŝas tion per malklare eligataj vortoj kiujn multaj misopinias ŝercoj. Reduktis diversajn revuojn, trakudris verkojn diverslingven. “Neniu scias, en kiom da lingvoj Ertl verkas... /en kelkaj pliaj/... li scipovas grumbli aŭ

almenaŭ papage redoni citaĵojn trovitajn ie en la reto” (Neciklopedio). Respondecas pri multo en *BA*, precipe pri ĝia malfruo. Ĉi-numere li forlasas ĉian pudoron.

Jesper Lykke Jacobsen

Laŭ la hungaro Alfréd Rényi, matematikisto estas aparato, kiu transformas kafon en teoremojn. Kvankam teoria fizikisto, Jesper estas unu el tiuj aparatoj. En siaj vakaj malfruvesperaj horoj li ankaŭ eksperimentas transformi ĉap-elojn en esperantan beletron. Kelkaj specimenoj antaŭ kaj post la transformo videblas respektive sur la foto kaj en la Belartaj Rikoltoj de UEA. Liaj sukĉesoj sur la pedagogia tereno inkluzivas la starigon de kurso pri esperanta literaturo ĉe Ecole Normale Supérieure en Parizo kaj la generon de du adoleskaj denaskuloj.




Nicola Ruggiero

Trikatposedato. Eterna lernanto, al li tre plaĉas studi, tre malplaĉas ekzameniĝi. Unta lingvisto, tradukas kaj verkas en Esperanto ĉefe versojn. De temp’ al tempo prelegas aŭ instruas pri Esperanto-literaturo. Plu pensas loĝi en mis-tero, sed plu notas en kajero ravojn kaj revojn. Ne atendas la barbarojn sed serĉas tiun insulon kien ĉiuj kunportas la diable nur tri librojn por porti tri librobretarojn kaj fanfaroni pri tio.



Probal Daŝgupto




Probal Daŝgupto [laŭ la bengala prononco, aŭ Dasgupta laŭ la norma latinliterigo, ambaŭ fomoj validas en Esperantujo] regule kontribuas al nia beletro, precipe per poeziaj aŭ fikciaj tradukoj al kaj el Esperanto, kaj ofte recenzas, foje amplekse. Kiel profesia lingvosciencisto, li verkas i.a. pri la sintakso Esperanta, tuŝante nekutimajn temojn, ekz. kial,

apud la absolute malebla frazo “Ĉefe ĝenis ilin la *tiaj* pezegaj valizoj”, entute ebletas diri “...la *tiel* pezegaj valizoj”. Membro de Akademio de Esperanto ekde 1983, Probal prezidas ĝin ekde 2016. Pli frue li estis prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (2007-13).

Suso Moinhos

Suso Moinhos preskaŭ fariĝis botanikisto, aŭ moluskologo, sed fine li konstatis, ke la vortoj kaj iliaj cirkonstancoj pli logis lin. Nun filologiaj libroj kunvivas sur liaj bretoj kun traktatoj pli plantoj, kaj li dormas apud kolekto da konkoj el la sep maroj. Li verkas malmulte legatajn poemojn kaj tradukas librojn, kiujn li opinias interesaj por la legantoj de la venontaj kvindek jaroj. Li ŝatus *BAn* similan al ĝardeno aŭ akvario multaspeciaj. Fervora radioaŭskultanto, amanto de fortosportoj, li fojfoje parolas laŭte dum sonĝoj. Pliaj informoj, deŝuteblaĵoj: suso-moinhos.webnode.pt

Foto de Suso Moinhos: Xoán Carlos Gil








Ulrich eklernis Esperanton en 1976, post kiam lia patrino respondis al li, ke “Esperanto estas lingvo, kiun parolas nur kvin homoj en ĉiu lando, por povi interkomunikiĝi”. De tiam li volis esti unu el tiuj kvin, kaj poste fariĝis aktiva en diversaj movadaj funkcioj. Hodiaŭ li eldonas (kaj unu-dufoje verkis) librojn en Esperanto, kiujn foje nur kvin homoj legas. Li translokiĝis de unu lando al alia (foje postlasante eĉ mortintan ŝtaton) kaj de pseŭdokomunisma socio al la ĉefurbo de kapitalismo, kie li provas transvivi per pluraj pagataj hobiaj, ĉefe tradukado, eldonado, instruado.

ELEKTRONIKAJ ESPERANTOLIBROJ

HEJMEN
BITLIBROJ
PRI NI
KONTAKTO



www.librejo.com - www.mondalibros.com - www.beletraalmanako.com


bitlibroj.com

Nekrologoj

Imre Szabó (1952-2019)



Imre Szabó estis hungara inĝeniero, dum multaj jaroj ligita al Hungar(i)a Esperanto-Asocio, kies presejon li gvidis en la 1980-aj jaroj kaj kiun li poste (2008-16) prezidis. Ofta kunlaboranto de *Hungara Vivo*, ĉefredaktoro de *Budapeŝta Informilo* (1987-90). Li tradukis poemojn de Attila József (*Urboranda nokto*, 1986; *Purakore*, 2006) kaj de multaj aliaj hungaraj poetoj. Li verkis poemojn kaj kantotekstojn en Esperanto kaj hungare. Li estis persono tre komunikema kaj inspira, kies hejmo estis same la parola kiel la skriba vorto.

Emile Van Damme (1927-2019)

Emile Van Damme, belgo, instruisto, filologo, estis ĉefe konata pro la libroj verkitaj kunlabore kun Christiane de Vleminck: la franclingva *Grammaire ABC d'Espéranto* (1990), esperantigita kiel *ABC-Gramatiko de Esperanto* (1994), kaj la tri volumoj de *Leksikaj ekskursoj* (aperintaj inter 1997 kaj 2007). Emile estis ankaŭ poeto, kaj el lia plumo aperis en 1990 la poemaro *Dolĉe-amare*.



Marika

de Sten Johansson

11

Li preskaŭ tuj komprenas, kiu telefonas, kvankam pasis jaroj de kiam li aŭdis tiun voĉon. Kiam li ekscias, kio okazis, forta puŝo trairas lian bruston, la koro akceliĝas kaj li devas ekstari por rondiri en la ĉambro. Eble li devus atendi tion. Marika ja aspektis elĉerpita, aperante ĉe li post pluraj jaroj da foresto. Ŝi ŝajnis nervoza, nekapabla sidi senmove. Ŝiaj manoj kvazaŭ plukadis ion sur la brakoj. Krome ŝi estis tre maldika; absolute ne videblis ke ŝi gravedas. Li ege bedaŭras ke ili disiĝis tiel, sed tiam li ne suspektis ke li vidas ŝin la lastan fojon.

Jen aferoj pri kiuj János cerbumas ĉi tiun sabaton, veturante per la blua metrolinio ĝis la finstacio, kie atendas antaŭurba trajno. Post dek minutoj ĝi ekiras, serpentas tra la sudorientaj urbopartoj kaj pluas en la kamparon. Ĝi ne rapidas; kaj la trako kaj la vagonoj jam malnovas. Tio ne gravas; jam nenio plu urĝas.

Se li traktus ŝin alie, agus kun ŝi alimaniere, ĉu tiam okazus same? Ne eblas scii. Poste oni ĉiam devintus ĉion antaŭvidi.

La trajno klaktinte antaŭeniras inter pli-malpli neglektataj ĝardenoj, disaj domegoj kaj fabrikoj. Jen kaj jen staras grupoj el popoloj, kiel avertaj krisignoj en la ebena pejzaĝo. La horo jam proksimas al la dekunua kaj duono, sed ĉi tiu novembra tago estas nekutime griza kaj malgaja, kun fora brumo, tra kiu arbustoj kaj arboj ŝajnas pezaj pro la pluvo falinta nokte. La malseko penetras ĝis en la kupeo, kaj li sentas malvarman trablovon ĉiufoje, kiam la trajno haltas por ellasi vojaĝantojn. Ĉi-loke malmulto ŝanĝiĝis en jardeko. La stacinomaj tabuloj plu apenaŭ videblas, do li kalkulas la haltojn, kiel Marika tiam instruis al li. Ĉe la naŭa halto li devas elvagoniĝi, sed tuj antaŭe li ekvidos la lagojn.

Ĉi-semajnfine li devus kromlabori pri domkonstruado, kiun la firmao okazigas norde de la urbo, malgraŭ financa krizo kaj malbona konjunkturo en lia branĉo. Sed li konvinkis kolegon anstataŭi lin. Homoj ankoraŭ respektas entombigojn, kvankam ne facilis klarigi, kiun parencon li perdis, kiam la kolego demandis pri tio.

Post iom pli ol duonhoro aperas dekstre la unua grizakva lageto. Ankaŭ aliflanke io ekbrilas inter arboj; li scias ke tio estas la lago kun strando. Ŝajnas esti sufiĉe da novaj unufamiliaj domoj ĉirkaŭ ĝi. Kelkaj el ili nur duone pretas, tamen li vidas neniun aktivadon tie. Eble pro la krizo, aŭ oni simple havas liberan sabaton. Nu, por li jam estas tempo elvagoniĝi.

Imre, ŝia patro, venas renkonte, kiel li promesis telefone. Ili mansalutas kaj ekpromenas, ne suden al la domo, sed reen laŭ la fervoja trako kaj poste dekstren, kie turniĝas la vilaĝa strato. Evidente la nombro de domoj kreskis en la lastaj jaroj, tamen la vilaĝo restas miksaĵo el malnova kaj nova, granda kaj malgranda, stukaĵo, brikoj kaj betono, arbustoj kreskintaj kaj ĵus plantitaj. Li imagis ĝin pli verda, sed eble tio estas memoro de somero, aŭ de enamiĝo. Nun estas aŭtuno.

Ili preterpasas la ordinaran flavan preĝejon; jen troviĝas tomboj, sed ne el la ĝusta speco. Nek li estas tia, tamen Imre neniam tion menciis. Male, jam dekomence János sentis sin akceptita de ŝia familio.

Tiam, antaŭ dek jaroj, li kvin- aŭ sesfoje akompanis ŝin ĉi tien, kaj la patro ĉiam traktis lin amike. Li ŝajne volis ke János zorgu pri Marika, kaj tion li sendube ja farus, se ŝi permesus.

Kun la patrino li neniam interŝanĝis multajn vortojn dum tiuj vilaĝaj vizitoj. Ŝi restadis kuireje, zorgis pri manĝoj kaj pri Ernő, la filo. Oni ĉiam regalis ilin per tagmanĝo, sed nur la patro, Marika kaj li manĝis ĉe la salona tablo. La patrino kaj la filo sidis kuireje. Oni rimarkis ke ili hontas pri Ernő, eble plej multe kiam li manĝis, ĉar li sufiĉe malpurigis sin. Tamen li ŝajnis tre kara al la patrino, kiu ege okupiĝis pri li. Ŝi ŝajne ne multe atentis pri Marika, nek pri János.

La familio devenis el alia regiono kaj ne havis aliajn parencojn en la vilaĝo. Ankaŭ kun la najbaroj ili evidente ne multe interrilatis. Kial, li tiam ne sciis.

Post iom Imre kaj János atingas pli malgrandan blankan preĝejon, kun tureto altiĝanta nur kelkajn metrojn super la tero. Ili ne eniras ĝin sed pluiras en la tombejon. Ĝi estas ĉirkaŭata de fagoj, kiuj ankoraŭ ne perdis siajn malsekajn, ruĝe brunajn foliojn.

“Ni ne havas propran pastron ĉi-vilaĝe”, diras Imre. “Li venadas ĉi tien el la urbo kelkfoje jare.”

La patrino kaj frato de Marika staras iom fore sur la tombejo. Li eĉ pli grandas ol János memoras, kaj ŝi pli malgrandas. Li ne vidis la fraton post kiam Marika rakontis, kio okazis, sed li ŝajnas same inerta kaj senhelpa kiel tiam.

Je kelkmetra distanco de ili troviĝas ĵus fosita kvarangula truo en la grundo, kaj apud ĝi amaseto da tero kaj kelkaj floroj. Imre kondukas lin tien. La patrino rigardas suben, kaj la frato ien en la malproksimon. Neniu el ili mansalutas lin. Li kontentas pri tio.

Ĉe flanka budo staras viro en bruna jako. Li klinas sin al fosilo dum li fumas.

“Jen la preĝeja pedelo”, diras Imre. “Li preparis la tombon por ni.”

La truo ŝajnas al János tre malgranda. Sed Imre levas butikan plastsakon el Lidl, kiu staris inter la floroj, kaj eligas iaspecan ujon. Vazon el kartono, ŝajnas. Jen kie troviĝas Marika.

Ili atendas longe. La frato malkvietas kaj komencas rondiri inter la tomboj, trenante kun si la patrinon. La pedelo parolas poŝtelefono kaj tuj poste alpaŝas por sciigi ke la pastro malfruas.

La malvarma vento iom malpliĝis, aŭ eble la arboj ĉirkaŭ la preĝejo ŝirmas la tombejon. Sed anstataŭe ekpluvas. Komence nur per etaj, malpezaj gutoj, sed iom post iom pli dense. La patrino kaj la patro disfaldas ĉiu sian ombrelon, kaj baldaŭ oni kunpremiĝas, Imre kaj János sub nigra, la patrino kaj la frato sub vinruĝa. La pedelo staras senŝirma, klinante sin al la budo kaj penante ekbruligi novan cigaredon.

Li ekkonis ŝin en studenta filmklubo. Poste ŝi konfesis ke ŝi iris tien por renkonti alian junulon, sed li tiufoje ne venis, kaj post la konatiĝo kun János ŝi ne plu atentis la alian. Eble tiu ŝia diro estis nur iaspeca flato al li, sed ial ili ne plu iradis al la klubo kune. Ordinariajn kinejojn ili sufiĉe ofte vizitis, kaj muzeojn, kaj la loĝejon unu de la alia. Ŝi dividis studentan ĉambron kun samkursanino de la pedagogia fakultato, sed li havis propran ĉambron, do ĉe li neniu ĝenis ilin. Komence ŝi tamen ne volis seksumi kun li. Laŭdire ŝi tro multe amis lin. Li pensis ke jen io kion knabinoj diradas, por ke oni ne ĉesu respekti ilin. Io, kion ŝi eble legis en konsila kolumno por gejunuloj, aŭ kion konsilis al ŝi amikino pli aĝa. Li supozis ke ŝi estas pli-malpli sensperta, sed li ne kuraĝis demandi pri tio.

Tiu unua tempo estis speciala. Ĉio ŝajnis ludo; li sentis sin iel liberigita, post kiam li ekkonis Marikan. Libera de ĉia devo kaj premo. Ŝi scivolis pri li, de kie li venis, kion li studas en la teknika fakultato, kion li faradas en siaj liberaj horoj. Ŝi subridadis foliumante liajn kompendiojn pri konstrumaterialoj aŭ matematiko, en kiuj li neniam vidus ion komikan. Preterpasante domojn konstruatajn aŭ novajn, ŝi volis ke li recenzu ilin. Kaj unufoje ŝi haltis antaŭ pompa secesia¹ domo ĉe la strato Nagymező.

1 arta kaj arkitektura stilo ĉirkaŭ la jaro 1900, karakterizata de malsimetriaj, naturimitaj formoj

“Ĉi tiajn domojn vi devos konstrui, kiam vi ekzameniĝos!”

Li ridis.

“Tio estus amuza. Sed kredeble neniu volos pagi pro tio.”

“Kiam mi estos riĉa, mi mendos ĝin de vi. Poste mi loĝos tie supre, en la tria etaĝo, inter tiuj agloj aŭ kio ajn ili estas. Vi rajtos veni vizite de temp’ al tempo.”

“Tio plaĉos al mi. Espereble viaj lakeoj enlasos min.”

“János, ĉu vi restos ĉi tie post la ekzameno, aŭ ĉu vi volas reveni al Szeged?”

“Ne, neniam plu al Szeged. Prefere Novjorko.”

Ili ludis, ili similis dekkvinjarulojn, kiuj nur ŝajnis amrilaton. Sed iuvespere, kiam ambaŭ estis ebriaj, ŝi ne plu povis nei, kaj ili iĝis veraj geamantoj, laŭ lia ideo pri tiaj. Post la unua fojo sur lia mallarĝa, knaranta lito ŝi neniam plu rifuzis. Tiam li ne rimarkis ke ŝi mem nenion iniciatas.

Evidente ŝi plej ofte ĝuis sed neniam atingis orgasmon, ĉiuokaze ne kun li. Cetere ŝi ankaŭ nenion ŝajnis. Li efektive ne sciis tre multe pri tiaĵoj, pri kiel fari por helpi ŝin. Ŝi estis nur lia dua, kaj la unuan li memoris kiel sufiĉe prudentan. Nu, tia Marika certe ne estis. Do li ne cerbumis pri la afero; li pensis ĉefe pri si mem, kaj ŝi kutime akceptis tion sen protestoj kaj sen postuloj. Kelkfoje li pensis ke se ŝi vere amus lin, ŝi almenaŭ iufoje ŝajnis orgasmi.

La frato pli kaj pli malkvietas kaj ne plu volas resti senmova sub la pluvombrelo. Li paŝas ĝis la eta truo en la grundo, kaj kiam li komprenas ke Marika troviĝas en la malhele griza urno staranta apude, li esploras. La patrino kondukas lin en la preĝejon, por preĝi, diras la patro kvazaŭ pardonpete.

Ankaŭ János rigardas suben en la kavon. Kolektiĝis iom da akvo surfunde, tamen tio ne ĝenos; la tero ŝajnas tralasema kaj bone drenita. Sur la asfaltaj vojetoj tamen jam etendiĝas flakoj.

Li sentas strange stari ĉi tie sub pluvombrelo, premite al ŝia patro, kiun li dum jaroj ne vidis. Kredeble ili neniam staris tiel proksime unu de la alia.

“Se li ne venos, tiu pastro”, diras János. “Kion ni faros?”

“Li venos. Sendube la urba trafiko ŝtopiĝis.”

Efektive ŝi neniam volis fariĝi instruisto, sed artisto. Kaj li vere trovis ŝin talenta. Sed la gepatroj rifuzis ekonomie subteni ŝin en arta lernejo. Ŝi devis lerni ion utilan, ion per kio ŝi povos vivteni sin. Instruisto de elementa lernejo. Kiam ili estis paro jam de unu jaro, li rimarkis ke ŝi ja frekventas la prelegojn, sed malofte studas hejme. Kaj ankoraŭ poste ŝi ne plu iris al ekzameniĝoj. Ŝi ĉiuokaze ne sukcesos, ŝi diris.

Anstataŭe ŝi senĉese desegnadis. Kiam ili promenis sur kajoj, en parkoj aŭ sur la montetoj de la malnova Buda, ŝi ĉiam kunportis skizblokon. Fojfoje

ŝi haltis por desegni kelkajn kolombojn sur fenestrolado, barĝon malrapide strebanta kontraŭ la fluo aŭ simple frostan folion sur la gruza vojeto de iu parko. Kelkfoje li iris aĉeti al ili glaciaĵojn aŭ freŝajn kornobulkojn, kaj kiam li revenis, ŝi jam pretigis almenaŭ unu desegnaĵon, iam eĉ kelkajn.

“Jen nenio rigardinda, nur skizo”, ŝi tiam diradis, kaj poste ŝi ŝajnis defendi sin, kiam li eltrudis la blokon el ŝiaj manoj.

Al studentaj festenoj ŝi volonte iradis. Tiam li ĉiam estis nervoza, ĉar ŝi ne toleris multon. Du-tri glasojn da vino, kaj ŝi estis ebria. Kaj li ne povis ĉie garde akompani ŝin.

Nur unu el ŝiaj desegnaĵoj li rajtis konservi. La ceterajn, kiujn li ricevis, ŝi reprenis. Ĝi estis tutkorpa portreto de li staranta en banŝorto apud unu el la vilaĝaj lagoj. Vere li staris sur la strando, dum ŝi portretis lin, sed ŝi ne sukcesis pri liaj piedoj, ŝi diris, do ŝi altigis la nivelon de la lago desegnante lin kun akvo ĝis la kruroj. Tio aspektis iom komike, sed ŝi desegnis diable lerte. Ĝi ne estis karikaturo, tamen ankaŭ ne plibeligo. Ŝi trafis pri lia oblikva buŝo kaj la kurba nazo, kvankam oni vidis lin de fronte. Fone videblis kelkaj infanoj ludantaj per banpilko.

Post jaro kaj duono ŝi gravediĝis. Li vere klopodis preventi tion kaj bone konis ŝian kalendaron, sed tio ne helpis.

Li volis ke ili diskutu la aferon, sed tio ne necesis, ŝi diris. Ŝi rezervis horon en kliniko kaj ŝajnis ne malbone farti pro tio. Tamen plej ofte estis malfacile scii, kion ŝi efektive sentas.

Li havis ian malrealisman ideon ke ili eble povus konservi la idon, kvankam ili ambaŭ estas studentoj. Ke ŝiaj gepatroj povus subteni kaj helpi. Sed al ŝi la afero estis memkomprenebla. Do li devis prunti monon por pagi la abortigon. Kaj li ne rajtis menciigi ĝin dum vizitoj en la vilaĝo.

Post du jaroj li eksciis ke ĝi ne estis ŝia unua. Tio estis en 2002 post la granda inundo; ili staris surkaje rigardante al la rivero, kie la albordiĝejoj de ŝipetoj restis parte subakvaj. La pinto de biletvenda kiosko videblis, kun du stratlampoj kaj kelkaj aliaj fostoj. Ĝuste tiam la varfo ŝajnis farita por submarŝipoj. Ŝi staris turnite riveren, dum ŝi rakontis. Li klopodis venki subitan naŭziĝon.

“Sed kion faris viaj gepatroj?” li demandis.

Ŝi turnis sin al li kaj alhokis siajn brunajn okulojn en la liajn.

“Paĉjo sciis nenion.”

Jen ĉio. Lia naŭziĝo revenis. Ŝi eĉ ne menciis la patrinon.

“Sed... Kion...”

Lia parolo rajpis; li ne sukcesis ion elbuŝigi. Ŝi returnis sin flanken.

“Pro honto mi ne kuraĝis ion diri. Tio okazis post kiam Ernő finis la specialan lernejon kaj estadis hejme ĉiutage. Mi ja frekventis lernejon, sed kiam li

venis al mi unuafoje, mi estis malsana pro gripo kaj kuŝadis enlite. Li demetis la pantalonon kaj la kalsonon, kaj mi ridis pri li. Li aspektis komike kun tiu kline staranta afero, kiu balanciĝis tien-reen.”

“Ĉu tio signifas ke vi konsentis?”

Ŝi ekridis akre, eĉ ne turniĝante al li. Ŝia voĉo sonis kiel unu el la mevoj, kiuj gvtatis de sur ia rubo elstaranta en la akvo.

“Li fikstennis min kaj premis min suben, kovris al mi la buŝon kaj nazon. Mi pensis ke mi mortos. Li estis forta. Kaj persista. Poste li kutime venadis, kiam Panjo kaj Paĉjo ne estis hejme, sed iom post iom mi lernis pli lerte eskapi, fuĝi de la domo. Li neniam foriris ien sen Panjo.

“Kio okazis, kiam ili malkovris tion?”

“Kion vi pensas?” ŝi diris. “Kiam ili eksciis ke mi gravediĝis, Paĉjo malĝojis, kaj Panjo koleris. Kontraŭ mi, kompreneble, ĉar unue mi ne kuraĝis diri ion pri Ernő. Mi pensis ke oni certe malliberigus lin en ia flegejo. Li neniam travivus tie sen Panjo. Do mi asertis ke kulpis la najbaro. Poste mi tamen devis rakonti la veron, ĉar tiu viro riskis veran problemon. Mi estis neplenaĝa, ĉu ne.”

Ŝi silentiĝis, ne rigardis lin sed observis la akvon kaj la mevojn.

“Kio okazis poste, post la abortigo?”

“Nenio. Mi ne plu rajtis esti sola kun Ernő, kaj Panjo komencis pli zorge gardi lin. Poste, dum la mezlerneja tempo, mi loĝadis ĉe onklo enurbe.”

Li volis demandi multe pli, sed ŝi turnis sin kaj paŝis for de tie, al la metroo, por hejmeniri al sia luata ĉambro, kaj li postsekvis ŝin povante nenion fari. Ĉe la subirejo, kie ili disiĝis, li provis brakumi ŝin, sed ŝi forglitis kaj malaperis suben per la rulŝuparo.

Kial ŝi do rakontis al li, kion faris ŝia frato, se ne pro tio ke ili nun tre proksimas unu al la alia, kaj ĉar ŝi volas nenion sekreti al li? Li konsciis ke neniuj konsolo ekzistas pro tio, kion ŝi travivis, tamen li volis dividi ŝiajn sentojn, kiom ajn tio eblis. Sed post tiufoje sur la kajo ŝi male malproksimiĝis de li, kvazaŭ ŝi ne eltenus la intimecon kaj do rakontis la aferon por forpuŝi lin. Tiusomere ili ne vizitis la vilaĝon kune. Kaj kiam ŝi iufoje desegnis, ŝi ne volis montri al li la bildon.

Aŭtune ŝia patro finfine komprenis ke ŝi eĉ ne duone pretas pri la studoj, kaj tiam li nuligis la subvencion. Do, pro manko de mono ŝi ekloĝis ĉe János. Komence li ĝojis pro tio, sed baldaŭ li ekdubis, ĉu ŝi efektive estas la ĝusta por li. Ŝi komencis vespere eliradi sola kaj ofte revenis ebria meze de la nokto.

“En iuj novaj trinkejoj”, ŝi respondis, kiam li demandis, kie ŝi pasigis la vesperon. “Elegantaj. Ŝikaj, tutsimple. Ankaŭ vi devus iam plezuriĝi.”

“Kiel vi povas pagi? Certe tio multekostas?”

“Neniu problemo. Oni regalas. Ĉiam estas eksterlandaj komercistoj kaj aliaj, kiuj regalas.”

Tiutempe li finis sian ekzamenon kaj bonŝancis tuj trovi laboron, do ekonomie ne estis problemo vivteni du personojn. Precipe ĉar ŝi pli kaj pli ofte manĝis ie fore, kaj iam eĉ ne revenis por dormi.

Dum la lasta duonjaro ili apenaŭ plu havis interrilaton. Li komprenis ke ŝi vivas per viroj, kiujn ŝi renkontas en trinkejoj kaj restoracioj, eble ankaŭ aliloke. Li ne supozis ke ŝi rekte postenas surstrate, kaj li ne sciis, ĉu ŝi ricevas monon de ili, tamen vestaĵojn, juvelojn, vizitojn en restoracioj, vinon, alkoholon ili ja donis al ŝi. Fine ankaŭ drogoj ekaperis; li neniam vidis ŝin preni ion sed rimarkis ke ŝi estas influata.

Kelkatempe ŝi venadis hejmen al li nur por bani sin kaj ŝanĝi veston, kaj poste eĉ tute ne plu. Iu transportfirmao venis forporti la etaĵojn, kiujn ŝi posedis ĉe li. Ŝi translokiĝis al Vieno, kaj li ricevis bildkarton el Prater post kelkaj monatoj, sed poste nenion plu. Li supozis ke ŝi daŭrigas la saman vivon en Vieno kiel ĉi tie.

La preĝeja sonorilo batas la duan horon kun sono iel ladece tinta. La frato jam trankviliĝis kaj revenas kun la patrino. Li staras apud ŝi, ŝajne preskaŭ dormante. La pluvo maldensiĝas, ĝi jam pli-malpli similas etajn pinglojn enaere, kiel ia humidaĵo, kiu ne plu falas alteren sed sentebblas kontraŭ la haŭto, se oni moviĝas. János staras sur ĉi tiu vilaĝa tombejo jam de pli ol horo, kaj lia korpo tute rigidas.

“Ne”, subite diras Imre. “Ni mem devos prizorgi la aferon.”

Li levas la urnon, kiu ambaŭflanke havas simplan tenilon. El la plastsako li eligas du rubandojn, kiujn li tredas tra la teniloj. Poste li enmanigas al János unu el la rubandoj.

“Ĉu vi bonvolus helpi min?” li diras.

János kapjesas kaj glutas, kaj ili paŝas flankdirekte al la kavo kun la urno inter si, kvazaŭ portante ion neimageble pezan, eble fortepianon. Sed vere ŝi pezas preskaŭ neniom.

Ili tenas ĉiu sian rubandon, iom post iom malhisante la urnon en la kvadratan truon. Imre ion murmuris. Patronian li recitas, kaj János aliĝas al li je kelkaj lokoj, kiuj ekaperas en lia memoro, kvazaŭ rompitaĵoj de pototo trovataj en la tero. Kiam la urno staras stabile en la funda akvoflako, Imre lasas sian rubandon fali en la truon. János faras same.

“Kara eta filinjo, adiaŭ”, diras Imre, viŝante al si la okulojn.

“Adiaŭ Marika”, raŭkas ankaŭ János, tamen liaj okuloj eĉ pli sekas ol antaŭe, ĉar la pluvo jam pli-malpli ĉesis.

Ankaŭ la patrino kaj frato alpaŝas. Ili staras ambaŭflanke de la kavo rigardante suben al ĝi. János retroiras kelkajn paŝojn kaj ne aŭdas, ĉu ili ion diras. Poste Imre kaptas ĝardenan fosileton ŝovitan en la amason da tero, aŭ eble ĝi estas specifa ilo por ĉi tiu celo. Li ŝutas teron trifoje en la truon, ion murmuras kaj finas per pli laŭta “amen”.

Ili silentas.

“Do ni devos replenigi ĝin per la tero”, Imre poste diras.

Sed kiam li reprenas la fosileton por ĉerpi pli multe da tero, la pedelo alrapidadas.

“Ĉesu, mi petas”, li diras. “Vi ne rajtas malfosi la tombon.”

“Ĉu ne?”

“Ne. Mi zorgos pri tio poste.”

“Nu, bone do. Dankon.”

Imre remetas la fosileton kaj rigardas ĉirkaŭ si. Lia rigardo haltas ĉe János. Ŝajnas, kvazaŭ Imre ĝuste malkovrus ke li ĉeestas.

“Eble vi ŝatus ion diri?” li demandas.

“Mi ne scias kion”, respondas János. “Pasis tiom da tempo.”

Tio tamen ne estas vera. Pasis nur kelkaj semajnoj, de kiam li tuŝis ŝin. Kaj kiam ili disiĝis, li supozis ke li baldaŭ renkontos ŝin denove. La financa krizo komenciĝis antaŭ nelonge, kaj li ektimis ke ĝi ĉesigos la domkonstruadon. Iutage ŝi aperis ĉe li. Pasis kvin jaroj de kiam li vidis ŝin; ili ambaŭ nun estis pli aĝaj, tamen li konsterniĝis. Ŝi aspektis ne kvin sed dek kvin jarojn pli maljuna, krome ŝi estis magra kaj ŝajnis malsana. Kiam ŝi moviĝis kaj ridis, ŝi tamen estis la sama Marika kiel tiu, kiu fascinis lin en la filmklubo.

Ŝi rakontis ke ŝi loĝis en Vieno dum kelka tempo kaj poste en Germanio, tamen antaŭ du jaroj ŝi revenis Budapeŝten. Do ili jam delonge refoje vivas en la sama urbo, sed iliaj vojoj ne interkruciĝis. Eble ne tre strange, se li pripensis, tamen li miris pri tio.

Ŝi restis dumnokte. Se konsideri la vivon, kiun ŝi supozeble vivadis, li devus senti neniun altiron. Tamen estis preskaŭ male; li nepre devis posedi ŝin ankoraŭfoje. Ŝajne troviĝis pluraj Marika tie en lia vasta risorta lito el Ikea: unu kiu naŭzis lin, unu je kiu li sopiris de jaroj, unu kiu perfidis lin kaj unu kiu finfine revenis al li. Li ne demandis, kion volas ŝi, sed agis pli-malpli maŝine, kvazaŭ en sonĝo. Kaj ŝi pretis, ŝi akceptis lin, sed ĉu vere al li ŝi volis reveni? Li ne sciis.

Matene li alportis du tasojn da espresso al la lito, kie ŝi kuŝis envolvita. Strio da sunbrilo penetris tra la latkurteno kaj etendiĝis kiel luma rubando sur la kovrilo. Ŝi turnis sin, eksidis, palpebrumis kontraŭ la lumo kaj diris:

“János, mi estas graveda.”

Li ekridis singulte kaj preskaŭ perdis la tasojn. Kafo ŝprucis sur la littukon.

“Jen rapida rezulto”, li diris metante la tasojn sur la litotablon.

Ŝi komprenis la komikon kaj pale ridetis.

“Ne kun vi, stultulo. Mi gravedas je tri monatoj. Kaj mi dezirus ke vi akceptu prizorgi ĉi tiun infanon.”

Li sidiĝis sur la seĝon, kie ŝiaj vestaĵoj kuŝis ĵetite.

“Nun mi ne komprenas, kiel vi pensas, Marika. Kio pri la patro de la infano? Ĉu vi scias, kiu li estas?”

Tio ne estis bela demando; li volonte glutus ĝin, se tio eblus. Sed ŝi ŝajne eĉ ne rimarkis ĝin.

“Ne gravas. Se vi akceptos la infanon, vi estos la patro. Iam vi volis havi infanon kun mi, ĉu vi ne memoras tion?”

“Ne, Marika, vi mismemoras. Tiufoje mi pensis nur ke ni devus diskuti la aferon kaj ne tuj kuri al la plej proksima abortiga kliniko. Ĉiel ajn, tio estis antaŭ jaregoj, kaj ĝi estis mia ido.”

Li preskaŭ aldonis “aŭ tiel mi pensis”, sed ĉi-foje li mordis la langon kaj konservis tiun penson ĉe si mem.

“János, vi estus bona patro.”

Li ekridis. Kiel ŝi povus scii tion?

“Vi ne konas min, Marika. Ni ne plu konas unu la alian. Se ni iam ajn konis nin.”

Ŝi silentis kun la dorso al la muro, nuda sed kun la ventro kovrita. La mamoj estis iom pli lacaj ol li memoris ilin, tamen pli bonstataj ol la vizaĝo. La haroj estis pli longaj kaj pli trivitaj, la bruna koloro ne brilis kiel iam. Li pensis ke li mem pli bone konserviĝis, tamen ĉi-momente li ne povis memori sian spegulaĵon. Kredeble lia buŝo restis same oblikva kiel antaŭ jardeko, eble pli. Kaj ne eblas forkuri de la nazo, kiun oni ricevis.

Ili trinkis sian kafon. La vekilo montris kvaronon post la deka, sed estis dimanĉo, kaj li havis neniun horon por observi. Li rigardis ŝin. Malfacilis al ŝi resti senmova. La manoj ŝajnis ion serĉadi sen ŝia konscio.

“Kie vi loĝas?” li demandis.

“Ĉe amiko.”

Ŝi aspektis, kvazaŭ ŝi intencus ion aldoni, sed nenio venis.

“Kiel vi trovis min? Mi kelkfoje ŝanĝis loĝejon.”

“Per inĝeniero en via laborejo. Via kolego.”

“Kiu?”

“Mi ne memoras lian nomon.”

Li ne povis ne scivoli, kiel ŝi renkontis tiun kolegon, tamen li ne demandis. Oni ne volas ĉion scii, pri kio oni scivolas.

Li proponis al ŝi lunĉi kun li, sed tiutage ŝi ne havis tempon.

“Eble alifoje.”

Ŝi ne diris sian adreson, kaj li ne demandis.

Li jam pretas forlasi la tombejon. Marika estas enterigita, kaj ŝia familio sendube reiros hejmen. Al li restas nur trajni reen al la urbo. Dum kelka tempo tamen neniu moviĝas, krom la pedelo, kiu ekbruligas novan cigaredon. János subrigardas la horloĝon. Dudek kvin antaŭ la tria. Kaj li cerbumas pri tio, kion li delonge scivolas, kion ŝia patro ne diris.

“Kiel ŝi mortis?”

Li faras neprecizan geston suben al la kavo, tute nenecese, kompreneble. Imre ŝajnas ne surprizita, kaj la aliaj certe ne aŭdis, kion li preskaŭ flustris.

“Pro piloloj”, diras Imre.

“Aha.”

“La kuracisto diris ke tio sendube okazis senintence.”

“Jes. Kompreneble ja.”

Neniu plu diras ion. Li scivolas, ĉu la patro konsciis ke ŝi estas graveda, sed li ne povas demandi pri tio. Cetere eĉ ne eblas scii, ĉu fakte inter ŝiaj cindroj kuŝas ankaŭ tiuj de feti kelkmonata. Li volus ekscii, kiu trovis ŝin, sed tio ne koncernas lin. Ĉeestas ŝian entombigon nur li mem kaj ŝia familio. La amiko, ĉe kiu ŝi laŭdire loĝis, ne aperis.

La pluvo refoje plifortiĝas. La patrino palpas sian vinruĝan ombrelon sed prokrastas disfaldi ĝin. Tiam taksio alveturas kaj haltas antaŭpreĝeje sur la gruzebena. Elaŭtiĝas neĵuna viro en malhela kompleto kun nigra valizeto enmane. Li energie paŝas al ili. La ŝoforo restas sidanta ĉe la stirrado sed ne forveturas.

“Jen li finfine”, diras Imre.

Ankaŭ el la patrino aŭdiĝas ia sono, malforta ĝemo. Unuafoje hodiaŭ János aŭdas ŝian voĉon.

La viro apogas sian valizeton al apuda tomboŝtono, malfermas ĝin kaj eligas ion kun la aspekto de granda tuko. Ĝi estas iaspeca ornamita kapoto aŭ kazublo, aŭ kiel ajn oni eble nomas tiaĵon, kiun li transkapigas kaj mane glatigas antaŭe sur la ventro. Poste li eligas biblion, kiun li ne malfermas sed nur tenas enmane, kaj jen li ekpostenas apud la duone plenigita kavo. Li palpas per la alia mano sub la kapoto en maniero suspektinda, sed temas nur pri slipo kiun li elfosas el pantalona poŝo.

“La Eternulo per sia graco bonvolis voki al si nian fratinton Fazekas Mária Katalin”, li poste komencas sen antaŭa averto, kun okulo al la memorslipo. “Mária Katalin estis virino en la florado de sia juneco, la juvelo de siaj proksimuloj, kaj al ni ne facilas kompreni ke ŝi ne plu restas inter ni. Tamen ni ne demandu kial; ni fidu kaj certu ke la Sinjoro havas intencon pri ĉio, en ĉiuj siaj agoj kaj decidoj. Ni kune kantu...”

Jen li altigas la okulojn laŭvice rigardante tiujn, kiuj staras ĉirkaŭe, la patron de Marika, kaj János, kaj iom pli fore la patrinon kaj la fraton. Liaj okuloj revenas al János, kaj li demandas:

“Ĉu vi konas Ho, Sinjor’ per Via Grac’?”

Neniu ion diras, kaj li daŭre gapas al János. Supozeble li pensas ke tiu estas la plej proksima funebranto, edzo aŭ fianĉo de Marika, kaj tio ja estas tute erara, preskaŭ tute erara. János grakas.

“Pardonu, sed mi kredeble konas neniun el viaj kantoj, hm, mi volas diri himnoj. Mi estas katoliko.”

Tiam la pastro nenion plu demandas sed mem ekkantas per hezitema voĉo. Ankaŭ la patro movas la lipojn, sed kiu vere ekkantegas, tiu estas la frato. János ne scias, ĉu tio estas precize la ĝustaj vortoj kaj melodio, tamen Ernő ja volas kanti al sia mortinta fratino, tio evidentas. János aŭskultas lian fortan, relative ĝustatonan voĉon. Estas terure kaj malkompreneble. Oni simple ne povas imagi lin iam seksperforti sian dekkvarjaran fratineton.

Poste sekvas la vortoj, kiuj ĉiam aŭdiĝas en kinofilmoj kaj televido.

“Vi estas polvo kaj refariĝos polvo. La Sinjoro Jesuo Kristo revivigos vin en la lasta tago. En la nomo de l’ Patro, Filo kaj Sankta Spirito, amen.”

La pastro ŝutas iom pli da tero sur tiun, kiun Imre jam antaŭe ŝutis, kaj jen ĉio pretas. Li mansalutas ilin ĉiujn, enpakas siajn biblion kaj kazublilon kaj ekpaŝas for de tie tra la pluveto. Imre akompanas lin ĝis la atendanta taksio, eble por pagi ĝin. La patrino trenas kun si la fraton; tio impresas kurioze; li almenaŭ duoble tiel grandas kiel ŝi kaj ŝajne preferus resti ĉe la tombo, sed kiam ŝi tiras, li tamen sekvas. La pedelo kaptas sian fosilon kaj ekstaras atendi kun senpacienca mieno. János ŝatus ion fari, reciti preĝon, eble en latino, kvankam ĉi tie sendube tio ne estas kutima. Ĉiuokaze li memoras nenion latinan, krom mea culpa, mea maxima culpa², kaj li ne certas, ĉu tio konvenus.

Do li eliras tra la kradpordo, plupaŝas laŭ la vilaĝa ŝoseo kelkcent metrojn ĝis la lago kun la strando. Tie li sidiĝas sur forgesita kaduka benko gapante suben inter siajn piedojn dum kelka tempo. Poste li klinas sin malantaŭen al la rompita dorsapogilo kaj rigardas al la lago. Li sentas la pluvon palpi lian frunton per malpezaj fingretoj, preskaŭ karese. Ĝi malrapide fluas laŭ liaj vangoj, malsekigas la lipojn. Ial li imagis la pluvakvon sala, sed fakte ĝi gustas je absolute nenio. Sur la lago li vidas la densajn gutojn fari retan desegnaĵon sur ĝia surfaco. Jen sur la strando ŝi desegnis lin staranta kun akvo ĝis la kruroj, kaj en ĉi tiu plumbe griza akvo ili plaŭdadis antaŭ jardeko, kiam ili ĵus renkontiĝis. Marika en sia ruĝa bikino, kaj li, kiu provis sub la akvosurfaco iom palpi ŝin. Sed tie en la akvo ŝi eskapis de li, kaj nun ŝiaj cindroj kuŝas en malseka tera kavo. Li dezirus ankoraŭ havi ĉe si almenaŭ tiun ruĝan bikinon.

2 latine: per mia kulpo, mia grandega kulpo

Vi(d)vokroniko, aŭ: Dek ok monatoj

22

de István Ertl

Origine tiu ĉi dosiero titoliĝis “memoroj.jan.2018”. Nome, mi komencis ĝin simple registrante eventojn ĉirkaŭ kaj post la morto de mia edzino Fabienne, en epoko kiam tia notado helpetis travivi la plej pezan periodon de funebro, kaj ankaŭ ĉar, en tiu stato de mensa kaj anima nebulo, mi pli ol kutime timis forgesi detalojn neforgesindajn.

Iom post iom – mi rimarkis – la temaro de la notoj etendiĝis. Evidente, eventoj kaj faktoj ne povas sendependi de la emocioj tiam sentataj, siavice foje notindaj. Luj ideoj eĥis al tiuj de Fabienne mem: “Kancerkroniko”, *BA17*, p. 87. (Eĥas eĉ la titolo, kaj tion mi rimarkis nur ĵus!) Tial tre baldaŭ mi diris al mi: en iu fora epoko, post la funebro, mi reprenos ĉion ĉi, kaj redaktos, ekstraktos, netigos ĝin por *BA*.

Kvazaŭ ekzistus “post la funebro”! Ĉe la efektiva kredakto, 406 tagoj estis pasintaj post ŝia foriro. Ĉe la nuna redakto, iom pli ol jaro kaj duono. (Fakte, mi finas tridek tagojn poste, sed ne emas retitoli al “Dek naŭ monatoj”.) Evidente, la doloro stompigis. Specife en la lastaj monatoj, mi ekkapablis ami denove. Sed la doloro ĉeestas – mallerta komparo – simile al la sekvoj de iama ostrompo tra la tuta korpo. Tial: ne indas prokrasti, ĉar kompleta postfunebro neniam venos.

Pardonu ke mia teksto malsufiĉe parolas pri – ĉefe – miaj infanoj; ĝi verkiĝis tro memcentra. Vi juĝos ankaŭ ke mi enlasis tro da subjektivaĵoj, miniaturaj vivofaktoj, kiuj havas signifon eble nur por mi (kaj havis por ŝi). Luj el ili restos nekompreneblaj aŭ nekompreneblaj. Sed amikoj instigis min: legi eĉ pri tiaĵoj povus helpi aliajn dum simila vivperiodo. Kaj registri ĝuste tiujn bagatelojn sentiĝas kiel starigi monumenton specife por Fabienne. Ĝeneralaĵoj povus rilati al kiu ajn, sed ŝia lipruĝo estas nur ŝia.

Kaj esti enterigata kiel manpleno da cindroj en paro da ŝtrumpetoj – ĉu tio tamen ne estas io kio okazas al malmultaj?

Teknika atentigo: en tiu ĉi teksto (kiel en mia vivo) ŝi = Fabienne. (Krom kiam ne...)

Fonto de ĉiuj fotoj: unsplash.com

Fotis: Jonathan Borba



Kronologio

13 jan. 2011 ĵaŭde: la diagnozo: mamkancero kun metastazoj en la ostoj, stadio 4, la plej grava, kun mediana pluviv-daŭro de jaro kaj duono.

16 apr. 2013 marde: novaj metastazoj diagnozitaj. Probable tiam ŝi ekkomprenas ke la kancero neniam foriros, kaj ekverkas tion kio aperos en *BA*. (Sed kvar tagojn poste ni iras al koncerto de Arno en Rockhal.)

2017

21–23 jan. ŝi pasigas semajnfinojn en Belgio kun du ŝiaj plej bonaj amikinoj, kun eĉ plia tranokto ol planite.

19–26 feb. vojaĝo en Sicilio. (Kvazaŭna portretfoto farita apud la tombejo de la mirinda urbeto Prizzi iĝos mia konstanta vidaĵo en la laborejo. Mi havas du ekranojn, sed unu mi uzas nur por ŝin afiŝi.)

2 apr. dimanĉe: *Relais pour la Vie* – sportevento profite al kancer-esploro. Nia emo partopreni dependas de nia tiujara rilato al kancero.

9 apr. dimanĉe: lasta komuna biciklado triope. Trajne en la urbon, pedalado enurbe, sandviĉo apud ARBED sub bela suno, per la panorama lifto en la valon, bicikle ĝis Walferdange, de tie ŝi trajnas, D. kaj mi biciklas, hejmen. Mi petas la kontroliston helpi ŝin ĉe la eltrajniĝo.

13–20 apr. vojaĝo al amikoj en Svislando kaj Alzaco.

27–28 apr. ŝi laboras lastfoje. Revenas elĉerpita, kun daŭrega laceco.

5 majo: *Rock against Cancer*, koncerto kaj ĉefe komuna manĝo kun Al. kaj J., kiuj nin invitis.

7 majo: naskiĝtaga festo de J., lastfoje tia evento por ŝi.

24 majo: tomografio, post kiu baldaŭ venas diagnozo pri metastazoj hepataj.

24–30 majo: hospitala restado; ekde 7 jun. kemiterapio.

13 jun. koncertas Elton John. (Se mi nur imagus kion mi faros du jarojn poste en tiu tago!)

16 jun. mejlrolonga letero de nia filo R., en kiu li klopodas klarigi kial dum monatoj ni nenion aŭdis de li.

julio-aŭg. du mallongaj feriadoj en Francio, inter kiuj ni revenas por terapioj.

8 aŭg. ŝi lastfoje vidas sian naskovilaĝon St-Lambert.

16–24 aŭg. hospitalo; **17 aŭg.** punkciado de la pulmoj.

24–29 aŭg. ŝiaj gepatroj restas ĉe ni por helpi.

17 sep. malferma tago de diversaj laborejoj; ni vizitas biologian analizejon, ŝi volas scii kiel tiuj homoj priservas ŝian sanon.

24 sep. dimanĉe: lasta vizito ĉe R. en Nancy.

- 30 sep.–1 okt.** lasta vizito ĉe geamikoj en la nordfrancia vilaĝo Barlin. (Ni revenos al ili en aprilo 2019.)
- 4 okt.** ŝi laste iras kun amikino al kinejo (eble *Le sens de la fête?*).
- 7 okt.** lasta koncerto: la brutale energia hungara BeshoDrom.
- 8 okt.** ni iras voĉdoni en lokaj elektoj.
- 13–15 okt.** lastaj vizitoj al Bruselo (geamikoj) kaj Amsterdamo (nia filino K. kaj ŝia koramikoj).
- 18 okt.** lastfoje ŝi venas al la merkreda tagmanĝo en mia laborejo kun esperantistoj.
- 21 okt.** “ĉi-semajne iom pli malforta ol kutime”.
- 22 okt. dimanĉe:** festo ĉe la bahaanoj, inter kiuj nia kuracisto kaj amiko N.
- 25 okt.** scintilografio PET-CT.
- 28 okt.–5. nov.** duafoje ĉi-jare al Sicilio; la lasta vera vojaĝo.
- 7 nov.** radiografio toraka.
- 14. nov.** lastfoje restoracie kun amikino.
- 16 nov.** instruista akceptovespero; unuafoje mi devas iri sola.
- 23–27 nov.** hospitalo, **24. nov.** punkcio de pulmo.
- 25 nov.** hejmvarmiga festo ĉe amiko L.; ankaŭ ŝi estas invitita; ĉeestas A., sed mi ankoraŭ ne konas ŝin.
- 30 nov.** lastfoje ŝi venas al koncerto de nia filo D. kaj aliaj piano-lernantoj.
- 3 dec. dimanĉe:** Kristnaska aĉetumo en Auchan, kun ŝia kutima zorgo pri ĉies konvena donaco. Ĉe Sephora ŝi petas detalajn klarigojn pri ŝminkado, por kiel eble plej bone aspekti por la familio Kristnaske, por la e-istoj en NR. Mi puŝas ŝin en rulseĝo, kaj ŝi kontentas ke sekvajn fojojn ŝi povos aĉetumi tiel. Sed ŝi ne povos. Poste, lastfoje kinejo: ŝia aparte ŝatata *Merry Christmas, Mr. Lawrence*, kun David Bowie.
- 9 dec. sabate:** lasta gastado de amikoj ĉe ni dum ŝia vivo.
- 21 dec.** aĉeto de ŝiaj lastaj pantofloj.
- 22 dec.** lastfoje ŝi stiras aŭton, al familia Kristnasko en Belgio.
- 26 dec.–2 jan.** Novjara Renkontiĝo, Saarbrücken. Jaron poste ĝi okazos, feliĉe, en Wiesbaden; al la sama loko mi ne reirus.

2018

3 jan. al la hospitalo por lasta restado.

11 jan. ĵaŭde: anonco: restas kelkaj semajnoj por vivi. Ŝi retmesaĝas je 10:04: “Vi povas veni tagmeze ĉi tien, kaj la flegistino alvokos /nian doktorinon DG/. Mi ne trovas mian telefonon, ĉu vi povos voki?” – mi venis en la lunĉpaŭzo, DG klarigis.

13 jan. sabate: kunveno kun niaj tri infanoj por klarigi.

17 jan. merkrede: lasta tomografio: la terapio efikas (la kancerĉeloj aŭ mortis aŭ ne aktivas), sed ŝia korpo jam tro malfortas por profiti el tio.

19–20 jan. vendrede–sabate: ŝi lastfoje hejme por 24 horoj. Raporto al miaj du forestantaj infanoj: “nun Via panjo estas apud mi sur la sofo, manĝante jogurton – agrable reveni al iom da normaleco. Nc. vizitis nin, de 14.30 ĝis 18.00. Mi kuiris du supojn, refaris la fazeolaĵon de la lasta fojo, almenaŭ unu supo havis iom da sukceso ĉe ŝi! Ni ricevis por ŝi senpage rulseĝon kaj marŝilon – tiuj necesos kiam ŝi revenos hejmen por pli longe, sed ŝi devas ankoraŭ trejniĝi/fortiĝi por stariĝi sen helpo”. 20.00–21.45 lasta filmo hejme: *The Heartbreak Kid*, ŝi ne tro entuziasmas, iras dormi iom antaŭ la fino, restas enlite ĝis 10.30. Mi (eble ni ambaŭ) kredas ke estos la unua el pluraj tiaj forpermesoj, sed ĉe la reveno hospitalen ni komprenas ke temis pri la lasta.

23 jan. marde: 17.00 alvenas ŝiaj gepatroj, seninvite – sed prave maltrankvilaj.

27 jan. sabate: 5.35 Fabienne mortas.

Ĝis 6.25 tempo ŝtelita por ŝi (kun R. ni ne tuj denuncas ŝian morton). 7.00: telefonvoko hejmen, respondas ŝia registrita voĉo (ĝis nun mi ne modifis). Ĝis 7.25 matenmanĝo kun R. en bakejo. Ĝis 12.30 ni ĉiuj restas kun Fabienne. Ĝis 13.30 ni ĉiuj kun psikologo, dume ŝi forportata. Nc. iras al instanco por anonci la forpason. 16.30–17.30 Vizito al funebristo. Vespere: familiaj videofilmoj.

28 jan. dimanĉe, 20.00–21.30 Vizitas N., por plani la ceremonion; dume, tute samtempe, ĝena ĉeesto de la frato P. kaj ties edzino. Najbarino K. alportas kukon. Miaj bogepatroj lasas min vespermanĝi sole kun la infanoj, tre malfrue.

31 jan. merkrede, 1.00–3.00, 7.00–7.25 verkado de funebra parolado. 10.30–11.30 ceremonio en tombejo. 12.00–15.30 restoracio kun ĉeestintoj.

1 feb. ĵaŭde: stirado preskaŭ tuttage al ŝia vilaĝo.

3 feb. sabate: ceremonio en la preĝejo de St-Lambert, poste akcepto en la municipa salono (samaj lokoj kiel por nia geedziĝo 24 jarojn pli frue).

24 marto sabate (estus ŝia 53a naskiĝtago): memorfesto en Luksemburgo, en eksa kapelo de la abatejo Neumünster.

13 apr. vendrede: repreno de la cindroj el la gardejo. Sabate: eksterleĝa dispartigo de la cindroj.

20 apr. vendrede: 10.00 lokado de parto de la cindroj en la tombejo de St-Lambert, kun beno de diakono (mi ne ĉeestas).

18 majo vendrede: 18.00 funebra meso en Újpest, Hungario, poste “akcepto” ĉe mia kuzino A. Sabate, 15.00 inaŭguro de memorplato kun ŝia nomo sur mia familia tombo en Pesterzsébet. 16.00–24.00 Memora ĝardenfesto ĉe amiko Sz. Dimanĉe 18.10 ĉ. 50 gramoj da cindro ŝutataj en Danubon, el publiktransporta ŝipeto, iom sude de la ponto Erzsébet, pli-malpli tie kie Fabienne, en decembro 1990, unuafoje vidis Danubon, kun mi, tuj post sia trajna alveno Budapeŝten.

2019

25 jan. vendrede: 11.00 inaŭguro de ŝia luksemburga tombo.



Fotis: Tom The Photographer

Notoj 2018

5 feb.

Ŝia voĉo en malnova filmo: “Rigardu, jen mi! Jen mi, D.!” Doloras tre. Ne nur tial ke ŝi ne plu jenas kun ni nun, sed ĉar ŝi ankaŭ ne aperas sur ĉi tiu videaĵo el 2004, ŝi ja mem filmas... kiel preskaŭ ĉiam.

9 feb.

En mia lasta sonĝero, dum mi scias ke ŝi foriris pro kancero, mi ekscias ke ankaŭ mia patrino havas kanceron. Inversa kronologio! Mia patrino do (ankoraŭ) vivas, sed ŝi ne plu. En la sonĝo eĉ iom malklaras la identeco de la du figuroj.

12 feb.

Mia rubriko por *Kontakto*:

“Mi ŝaltas kaj lasas funkcii la radion dumtage, kun ajne stultaj aŭ malstultaj programoj, kaj tio kreas etoson en kiu eblas imagi ke ankaŭ Fabienne ĉeestas. Ja ekzistis tiom da tagoj dum kiuj la radio bruis kaj ŝi ĉeestis!

Jen normala fenomeno en ĉi tiu funebrofazo: ĉio memorigas pri ŝi, vestaĵoj, dentobroso, mansaketo... Mia filo proponas manĝi mangon, mi akceptas; Fabienne iam diris ke estus praktike havi specifan mangokuleron; mi klopodis aĉeti por ŝi tian Kristnask-donace, sed nenie trovis...

Mi kontrolas ŝian monujon por trovi monerojn – estas nur cendetoj, sed plorige trafas miajn okulojn pag-atestoj: senescepte el decembro, nur apotekaj aŭ pri hospitala parkado...

Dume amasiĝas fakturoj kaj kvitancoj ne librotenitaj; ĉiam Fabienne faris la kontadon. Kiam laste? Mi baldaŭ konstatos, kiam mi havos kuraĝon por tiu tasko.

Kaj kiam ŝi lastfoje iris al nia supra etaĝo? Meze de decembro ŝi ankoraŭ fortis. Kiam al la kelo? Kaj kiun libron ŝi laste legis? Ĉu *La strato de Tanja* de Kalle Kniivilä? Nu, certe ĝis la paĝo 32, kiel atestas faldita oreleto. Kiam ŝi laste dormis en sia lito? Tion mi precize scias...

Nia domo aperas al mi nuntempe kiel ia praarbaro, kie mi konas certajn padojn, sed la ceterajn partojn nur iom post iom malkovras, pro ia urĝo, kiel necesa riparo, aŭ simple pro bezono ŝanĝi littukojn. Antaŭe mi ĉiam havis ĉiĉeronon en la ĝangalo, aŭ forstiston en la arbaro, aŭ –

Sed nun – nun mi staras perdita.”

19 feb.

Mi fosas en ŝiaj retaj arkivoj: hotmail, Facebook, la forumoj kiujn ŝi partoprenis (kiel *esperantina*). Mi konstatas ke probablege la 22an lunde ŝi laste spektis novaĵojn. Fakte, mi eĉ memoras ke, dum mia tiuvespera vizito, mi trovis ŝin televidanta per la tabuleto. Lastfoje en la vivo – kaj pro mi ŝi malŝaltis ĝin.

Kiam ni laste ludis skrablon? Kiu venkis?

22 feb.

La malrapida erozio de ŝia persona pejzaĝo.

Nun, 26 tagojn poste, unu flanko de la banĉambra breto ankoraŭ surhavas senŝanĝe ŝiajn objektojn, precipe por ŝminki sin, aldoni la ne plu ekzistantajn brovojn. Sed iom post iom mi jam translokos, ĵetos objektojn – eble jam faris –, kaj venos la tago, kiam nenio, preskaŭ nenio, estos

plu tia kia ŝi lasis. Tiam (en fora iamo) la korŝira escepto estos kiam okaze surfaciĝos io ŝia.

Mi aparte pie gardas la velure molan, grizan kovrilon, kiun ŝi specife petis meze de januaro, kaj sur kiu ripozis ŝia kapo en la lastaj tagoj, en la lasta minuto. Mi ĉiam gardis ĝin en ŝia parto de la lito, zorge falditan, ĉar interne ĝi gardis odoron – ne iun kutiman odoron ŝian, tamen odoron rilatan al ŝia lasta vizaĝo, lasta buŝo ŝia. Sed hieraŭ nokte mi konfuzis ĝin kun alia kovrilo, malfalde uzis ĝin por kovri min mem – kaj nun la odoro estas for, mi kredas.

23 feb.

Mi neniam scios ĉu kaj kiam ŝi definitive akceptis la ideon morti. La 13an, sabate, ni ja kunsidis kun la infanoj dum horo (aŭ eĉ du) por paroli pri tiu perspektivo, sed mi imagis monatojn, kaj eble ankaŭ ŝi. Ŝi ja diris: “ĉio iras tro rapide”. Tagon pli frue ŝi parolis pri projekto verk(ig)i slipojn (kvazaŭ testamenterojn?), por kio la psikologino promesis helpon. Ŝi pensis laborigi ankaŭ amikino C., sed poste diris al mi ke ŝi ne taŭgos. Fine la tempo ne sufiĉis, kaj tiuj slipoj forte mankas al mi nun. Ĉu temus pri lavmanieroj, salatoj, gladado? aŭ ĝeneralaj vivkonsiloj? Laŭ la psikologino, mortantoj povas de tago al tago ŝanĝi la fokuson, ne plu konsideri grava gravaĵon de hieraŭ.

27 feb.

Monaton post ŝia morto, mi reiras al la hospitalo.

Mi kapablas danki kaj transdoni bombonojn nur al la geflegistoj, plorinte en la sama necesejo kie mi ĉiam tualetis, sed post kiam mi renkontas Cédric en la koridoro, ne plu eblas iri trovi d-rinojn DW kaj DG. Mi diras al Cédric ke ĝuste lin ŝi plej aprezis, kaj mi fuĝas ekplore.

28 feb.

Ĉu ŝia morto igis la ideon morti pli akceptebla?

(Dek ok monatojn poste: Se jes, tiam nur provizore.)

2 marto

Sciigo el Italio: ŝi devus pagi 45 eŭrojn pro trafikdelikto la 1an de nov. en Sirakuzo. Absurde... aŭ kortuŝe. El niaj tri ekskursaj tagoj (Catania, Sirakuzo, Etno) ŝi plej aprezis Sirakuzon. Sed tagon post tago ŝi malpli kapablis, kvankam helpis ke ŝi multe ripozis.

Fine, antaŭ ol por ĉiam forlasi Ací Castello, ni fotiĝis sur la ĉemara platformo sub nia fenestro. Ĉe tiaj fotadoj, mi ofte pensis: eble la bildo iam estos memoraĵo, rememorigilo, postmorta saluto... mi forĉasis tiujn pensojn. Ŝi surhavis la someran ĉemizon roze gajan kiun post ŝia elviviĝo mi surmetis al ŝi anstataŭ la trista malhelblua en kiu ŝi mortis. La gaja ĉemizo iĝis cindro kun ŝi.

8 marto

Ĉu venos iam tago kiam mi pensos pri ŝi kiel pri memkomprenebla, sed ne tuŝproksima parto de mia pasinteco... kiel mi nun pensas pri mia patrino?

13 marto

Ŝi laboris ĉe *Prévention Routière* de oktobro 1991 ĝis aprilo 2017. Kvaronan jarcenton. Eĉ iom pli ol daŭris nia kunvivado. Mi ĉiam ŝercis ke mi neniam vidas ŝin labori, vidas nur ŝiajn salajroslipojn. Foje mi menciis ĉu eblus inkognite partopreni staĝon ŝian. Nun neniam plu eblos. Tiu ŝia flanko restas por ĉiam kaŝita.

* * *

Ŝi ŝatis desegni, pentri, kaj en du periodoj (ankaŭ dumkancere) konsideris evoluigi sian talenton. Mi memoras akvofarbaĵon, kiun ŝi trovis malsukcesa – malkiel mi.

* * *

Subite, dum mi senfine kompiladas adresojn por invitoj, mi sentas kun la evidento de deĵavuo ke mi laboras senutile, ĉar ŝi tuj eniros la salonon, kaj priridos mian laboron. Simile, plurfoje en lundoj mi sentis ke vespere necesos telefoni al mia patro, kiel kutime en lundoj... nu, kutime ĝis 22 dec. 2008. Eble tiajn iluziojn kreas, krom despero kaj elĉerpiĝo, mia nun ofta okupiĝo pri la pasinteco.

Kiam mi nostalgias pri Kristnaskoj kun ŝi kaj la infanoj en Budapeŝto (kiom da tiaj okazis? ĉu sep?), mi tuj memoras ke siatempe ili ne estis plenfeliĉaj, sed iom zorgaj pro la infanoj, iliaj sano kaj problemetoj, sed precipe pro... la nostalgia komparo kun la Kristnaskoj de mia infanaĝo. Kiel mi festos ekde 2018?

* * *

Mi diras al D. ke ni nun trinkas la lastan botelon de la akvo Contrex el nia stoko. Ni ja ĉiam aĉetis Contrex por ŝi; mi ĝin tute ne ŝatas. Iom post

iom malaperos tiaj artikloj, kaj poste eĉ la objektoj, vestaĵoj poseditaj de ŝi. Nun ankoraŭ pendas ŝiaj mantelo, pantalono, porkalva ĉapeto sur la vestibla kaj banĉambra hokoj, iuj ĉemizoj sur dormoĉambra seĝo... kaj kuŝas diversaj vestopecoj sur ŝia parto de la lito, eĉ la noktoĉemizo en kiu ŝi mortis.

* * *

Hodiaŭ mi fortege sentis kontraston: dum la tago mi organizis ceremonion, do faris ion **por** ŝi, kaj dume mi pensis pri ŝi kia ŝi estis antaŭ monatoj, jaroj, plej divers-etape; sed vespere, kiam mi revenis hejmen, ŝia foresto estis tro ĵusa, denove tro rekte sentebla, pro spacoj kaj objektoj kiuj antaŭ nur semajnoj estis (ankaŭ) ŝiaj.

15 marto

Ŝi fidis homojn kaj, precipe, volis eviti ĝeni ilin. Eble tial ŝia malfrua diagnozo: ŝi ja tre frue iris konsulti fakulon pri siaj mamdoloroj, sed kredis ties misdiagnozon sen serĉi duan opinionon... kaj apenaŭ parolis al mi pri ĉio ĉi... ĉu por ne ĝeni min dum mi funebris mian patron?

16 marto

Ŝia lasta mesaĝo al mi: "Mi kredas ke mi havas la vivnecesaĵojn. Gravas ke la bazaj tolaĵoj estu propraj." La vivnecesaĵoj (*minimum vital*), tio plorigas min.

18 marto

Komence mi respektis ŝian deziron paroli ne pri ŝia morto aŭ forpaso (*mort, décès*), sed foriro (*départ*). Ŝi eldiris tion kiam ŝi estis akceptonta la ege-baldaŭecon de sia *morto*, sed tiu vorto mem, el mia buŝo, draste intervenis en ŝian pripensadon. Ŝi fakte ekploreteis pro ĝi. (Tiun tagon ankaŭ mi ploris en la hospitala kafeterio, poste ĉe ŝi, sur ŝi, kaj ŝi diris: "ploru nur".) Sed nun, 50 tagojn poste, tiu vortodistingo ne plu nepras. Purigante pro baldaŭaj gastoj, hieraŭ mi forprenis ĉiujn littukojn por lavi, ankaŭ de nia lito. Tiel mi perturbis staton de la lito kiu daŭris 50 tagojn, sed, iusence, jardekojn. Ĉar ĉiam mia litduono havis la kovrilrandon super la matraco, sed ĉe ŝi – sub ĝi.

19 marto

La haroj trovitaj en la duŝa defluejo hieraŭ.

20 marto

Ĉe mia jara sanekzameno, la kuracistino miras ke mi neniam uzis feriajn tagojn “pro serioza malsano de la edzino”. Ĉu riproĉo? Mi klarigas ke dum sep jaroj mi povus uzi ilin kiam ajn, kaj ĝuste tial ne uzis – iom superstiĉe. Mi agnoskis la “seriozan malsanon” nur postfakte.

27 marto

Ŝia naskiĝtago.



Fotis: Angela Bailey

* * *

Dimanĉe vespere: An. kun la filino sur la sofo, dum mi apudas en la fotelo. Fremda entrudiĝo, tamen bonvena ĉeesto. Des pli ke samtempe K. “psikoterapias” min per Messenger.

28 marto

La sesdeka tago sen ŝi. Kiam survenas min ploratako (ĉiam malpli ofte, tamen daŭre plurfoje dum la tago), ial mi instinkte, spasme faras kalkulojn: antaŭ kiom da tagoj okazis jeno aŭ alio, kiam estis ŝia lasta fojo pri tio aŭ jeno.

8 apr.

Elekti iujn konkretajn fotojn pri ŝi por montri, eĉ por mem rigardi, estas ia perfido: kiam tiuj bildoj estis faritaj, neniu pensis pri tiu nuna funkcio. Kvankam la kompleta vero estas ke en la lastaj jaroj, ĉe fotofarado, mi ja oftete pensis pri postmorta rigardo.

9 apr.

Ĉu mankas kunesto, aŭ pasia amo?

Dum nia kunestado mi foje pripensis la forpasemon de pasia amo.

17 apr.

Priskribindus la plora vojaĝo kun ŝiaj cindroj.

* * *

Pasis 80 tagoj. Ĉirkaŭmonda vojaĝo. Sen reveno samloken.

* * *

Mi ekkopias ŝiajn tekstmesaĝojn. Neniam mi forĵetis mesaĝojn ŝiajn, pensante kaj hontante pri la penso ke iam, iam poste, mi ŝatos relegi ilin. Nun estas tiu “iam poste”.

Mi tenas ĉemane ŝiajn telefonon kaj tableton, ŝiajn lastajn kunulojn, gardantojn en la hospitalo, kies taŭgan ŝargitecon mi kontrolis je ĉiu vizito. Per la tableto ni muzikis por ŝi dum horoj en la lasta tago, ne sciante kiom ŝi povas aŭdi ankoraŭ.

22 apr.

Mi etendas manon al ŝia litoflanko, konsciante la vanecon de mia gesto. En mia kvarondormo kelkaj bruoj kreas la impreson ke iu, ke ŝi, ĉeestas. Kaj ĉi-matene jen la impreso ke dum mi sidas ĉi tie en la salono, ŝi plu dormas sed baldaŭ enpaŝos – kiel en tiom da semajnfinoj, tiom da dimanĉoj.

* * *

MRM ne respondis al miaj mesaĝoj. Ĝenerale, malsufiĉe reagis ŝiaj poststudaj konatoj, kaj des pli tiuj de ŝia laborejo. Ĉiuj laŭdis la ceremoniojn, sed la prezento de ŝia vivo estis malkompleta, kvazaŭ ŝi precipe estus privata persono. Eĉ pri la gepatra asocio tio parte validas.

23 apr.

La paralelo inter la situacio de mia patro antaŭ 26 jaroj kaj la mia nun.

25 apr.

Ŝi nun mankas pli ol kiom ŝi malmankis kiam ŝi ĉeestis.

26 apr.

La datreveno de la tria monato.

Hieraŭ, pro lerneja ekskurso de D., la unuan fojon mi pasigis nokton sola en nia domo. Unuan fojon post kiom da jaroj? Eble pro antaŭtimo, mi volis tiun nokton kiel eble plej mallonga. Mi laboris longe, poste naĝis kaj iris al kinejo (*La formo de akvo*), tiel ke mi alvenis hejmen nur je 00.25. Sed apenaŭ mi pripensis mian solecon, venis renkonte nia kato Grizzly. Fine ne tute sola, do?

30 apr.

Mi decidis “fari la kontojn”. Tion ŝi ĉiumonate faris, sumigante kvitancojn kaj konteltirojn. Sed laste ŝi okupiĝis pri tio en oktobro, du nun atendis sesoblo de la kutima tasko. Kaj multaj kvitancoj, kiom ajn banalaj, vekis memorojn, jen pri glaciaĵo en Sicilio jen pri ŝia lasta paro da pantofloj.

3 majo

Kiam mi alportis la cindrojn al ŝia vilaĝo, mia bopatrino rakontis ke Fabienne ridetis kiam ili, la gepatroj, alvenis la 23an de jan. Kaj poste ploris, laŭ ŝi. Pri tio mi ne aŭdis ĝis nun. Kaj ne redemandis pri detaloj. Ĉe sia lasta fojo en St-Lambert, Fabienne ĉirkaŭrigardis en la ĝardeno kvazaŭ sciante ke temas pri la lasta fojo – diras mia bopatrino. Aŭ ŝi celas diri ke ŝi mem tuj pensis tion.

6 majo

Mia bildo pri ŝi modifiĝas: malpli ofte nun ŝi aperas kiel la fizike tre malforta homo de la lastaj tagoj, pli ofte en la tuta perspektivo de niaj kunaj 26 jaroj.

8 majo

En ŝia agendo el 1989, kiun neniam antaŭe mi vidis, mia nomo aperas dufoje. Kaj ĉe iu semajnfino ŝi notis: “anonima voko”. Mi neniam povos ŝin demandi pri tiu mistereta voko. Antaŭe tio multe malpli interesus min. Antaŭe ni havis **kune** la nuntempon, kaj la estontecon – nun al mi restas nur la estinteco en kiu fosi.

12 majo

Kiam mi konsultas ŝian FB-profilon, kiun mi tenas viva, eĉ uzante ĝin, mi iel post-partoprenas ŝian vivon. Ja iluzio: miaj propraj preferoj kaj uzkultimoj iom post iom modifas la profilon, igas ĝin pli simila al mi mem... eble en iu tago ĝi fariĝos tiom simila al mi ke mi devos ĝin ĉesigi.

* * *

Ĉiu el ni sentas nian funebbron unika, kaj tamen ĉiuj funebroj similas.

* * *

Jam laŭkutime (la kvaran fojon!) okupas min preparoj por memorfesto ŝia. Agrable okupiĝi “pri ŝi”, sed jam mi antaŭtimas la postan malplenon. Almenaŭ ŝiajn cindrojn mi plu havos dum monatoj.

Ĉu bonas ke la etapoj de la funebro tiom malrapidas?

Homoj volas scii kiel mi elturniĝas kaj ĉu ili povas helpi, bla bla. Pli bonas reago de M.: ŝi donas al mi duonon de sia kuko, babilas kun mi dek minutojn, kaj deklaras ke viroj pli facile superas emocie tian periodon ol virinoj.

14 majo

Ĉe mia oficeja tablo, mi sentas tute realisma la eblon ke ŝi estas nun en la hospitalo, ajnmomente vizitebla. Mi senmovas en la tempo, kiel burdo en sukceso. Ĉi tiu maja tago ne malsimilas iun januaran. Mi volus trovi la normalan iron de la tempo.

* * *

Hieraŭ, dum la dimanĉa purigado, mi zorge formetis ĉiujn ŝiajn objekton por la bezonoj de senpolvigo, kaj poste remetis ilin.

28 majo

Nun mi pli pensas pri ŝi foresta ol mi pensis pri ŝi en ajna averaĝa tago antaŭ du jaroj, kiam ŝi ĉeestis.

Kio se mi havus amnezion? Mi ne memorus ŝin, kaj iĝus pli facile? Sed devus esti amnezio parta, mi ja bezonas memori miajn infanojn, mian laboron.

* * *

Kial mi ne dancis kun ŝi? Pro mi ŝi rezignis pri tiu plezuro.

30 majo

Imagi ke ŝi povus legi ĉi tiujn liniojn signifas daŭre malakcepti ŝian morton.

1 junio

Kvar plenaj monatoj sen ŝi.

Dum ŝi vivis, nia kuna, daŭra vivado fabrikis komunajn memorojn, kiujn ni poste povis komune elvoki. Nun mi daŭre vivas, sed fabrikas solulajn memorojn – por elvoki kun kiu?

* * *

La foto sur la ekrano en mia oficejo estas tiom vivanta ke ĝi daŭre mal-faciligas al mi kredi ke ŝi mortis, jam antaŭ 125 tagoj. Ĝi estas fonto de ĝojo, ĉiutaga salutejo.

2 junio

Kiam mi ploras, mi ploras mian solecon. Kiel malsolidare!

* * *

Tuj kiam mi reportis ŝiajn telefonon kaj tableton el la hospitalo, mi lokis ilin sur la fenestrobreton, kun la kabloj nutraj, por ke ili neniam malŝargiĝu, almenaŭ ili ne. En januaro ankoraŭ kuntroviĝis tri “kable nutritaj” – el tiuj, ŝi ne revenis.

3 junio

La unuan fojon mi ie forstrekas ŝian nomon; el la mini-kajero metenda en mian monujon pri uzo de medikamento. Oni ne avertu ŝin urĝkaze.

5 junio

La homoj ĉirkaŭ mi rajtas pensi pri ŝi nur de tempo al tempo, kaj ĉiam malpli ofte. Mi envias la homojn, kaj rankoras.

8 junio

Dum, la 31an de januaro, ni restoracie umis (kiun verbon uzi?) je ŝia memoro, ŝi jam survojis al la kremaciejo, cindrigota samtage. La fune-ristoj fajfis informi min pri tiu drasta samtempeco. Kaj neniu pensis averti min pri nia geedza ringo, pri kiu mi pensis ke iu deĵordeve forprenos ĝin, ĉu en la hospitalo ĉu en la kremaciejo.

Kalendaro tremigas: la 1an de januaro ŝi ankoraŭ ricevis bondezirojn por nova jaro, kaj la 1an de februaro eĉ ŝia korpo ne plu ekzistis.

9 junio

En mia antaŭa vivo, la scio ke ŝi ŝatis certan tipon de jogurto pli gravis ol scii kiu estas la ĉefministro de Italio. Nekredeble ke la valoro de tiuj centoj, miloj, dekmiloj da scietoj kaj observoj, akumuliĝintaj tra la (tro mal)

longaj jaroj da kunvivado, kiuj lubrikis aŭ eĉ fundamentis tiun kunvivon, ene de sekundo malkreskis al precize nulo.

* * *

Mi suspektas ke d-rino DG tra la lasta jaro sciis multe pli klare kio kaj kiel plej verŝajne okazos ol kiom ŝi diris al ni. Verŝajne ŝi ja diris ĉion, en la kutima singarda kaj pedagogia maniero de bona kuracisto, kiu devas ekvilibri inter informado pri probablega morto kaj instigado al optimuma rezisto korpa kaj anima. (Krome, mi certe pli blindis al la realo ol Fabienne.)

Se mi antaŭscius kio precize okazos, aŭ eĉ se mi nur pli pesimismus pri la pluvivŝancoj, tiam nia, mia tempo estus multe pli malfacila, malpli vivinda.

Laŭdinda nescio, *sancta simplicitas*?

* * *

Tempovojaĝo: malkovri komentojn ŝiajn en FB neniam viditajn, de antaŭ jaro.

12 junio

Kutime, pli ol tri monatojn post forpaso, la postrestintoj jam delonge regule vizitas la tombon de sia forpasinto – anstataŭ tio, mi ankoraŭ “dependas” de sinsekvaj ceremonioj, kiuj tenas ŝin en iu stato “daŭre-nen-tombejo”.

16 junio

Ne samas timi morton kaj timi mortadon. Mi kredas ke ŝi jam en 2013 plenumis la laboron venki la timon morti – atestas pri tio ŝia verko en *BA*. Sed mortadon – sufokiĝon – ŝi ja timis. Kaj kian bonŝancon ni havis ke ŝi povis nepre fidi d-rinon DG, ke eblis ricevi tiun ĉi plej lastan, plej gravan garantion – kaj, efektive, ŝi forpasis tiel ke ŝia spirado restis kvietita, nur ĉiam pli malofta.

Ĉu mi lernis ion el ŝia morto? Eble mi povas iom pli imagi nun la propran forpason, ne plu konsideri ĝin kvazaŭ ion fikcian aŭ okazantan en alia mondo? Ke mi foriros trankvile, rerigardante al vivo kun iaj rezultoj?

17 junio

Ni neniam vivis en la obsedo de *carpe diem*, de la tempo forfuĝanta. Ni ja milde konsciis ke povus esti nia lasta jaro, aŭ nia lasta fojo pri io... Sed ni

ne faris al nia vivo drastajn ŝanĝojn pro tio. (Mi hezitas skribi “ni” – malmulton mi povas atribui al ŝi kun absoluta certo, kaj mi ne volus lezi ŝin per misatribuitaj sentoj kaj ideoj.)

* * *

Ekzistis tuta aro da komunaj memoraĵoj, plus da individuaj memoraĵoj komunigeblaj – nun restas nur aro da individuaj memoraĵoj ne plu komunigeblaj, kaj aro da iam komunaj memoraĵoj nun por ĉiam individuaj.

24 junio

Ekde hodiaŭ ŝi ĉiam estos pli juna ol mi.

3 julio

Antaŭe, kiam mi havis la impreson mieni neŭtrale, en la spegulo mi vidis homon tamen preskaŭ ridetantan.

Hodiaŭ mi ekvidis min en la spegulo: pensante mieni neŭtrale, mi mienis morne.

9 julio

Kiel ŝi povis sen di-kredo atingi tian pensado-staton pri la morto? Kiel fakte statis pri ŝia kredo?

19 julio

Pensi pri ĉiuj homoj kiuj amikas, ŝatas, amas min estas “korvarmige”. Jen la vorto kiun mi plej ofte uzis por danki kondolencajn mesaĝojn. Tamen, mi nun subite pensis pri iliaj sentoj al mi kiel pri amaso da etaj lumoj, eble kandelaj, lumigantaj nur po parteton de vasta ĉambro, kiu en sia tuto tamen restas morne malluma – ĉar ne plu eblas ŝalti la ĉiolumigajn ampolojn de la plafona lustro.

* * *

Kiam ŝi lastfoje iris al la supra etaĝo? Iam meze de decembro, mi pensas. Eble por kolekti lavotajn vestaĵojn. Se ŝi, se iu ajn scius pri la lasteco de tiaj fojoj, tio estus antaŭtempa mortkondamno.

22 julio

Ĉu mi multe malpli memoros kia estis Fabienne antaŭ la malsano? Ekzemple, ŝi ĉiam bezonis pli da dormo ol mi kaj tial matene leviĝis pli malfrue. Komence de nia rilato, en la simbioza etapo, tio eĉ iom agacis

min. Semajnfine mi klopodis resti kun ŝi kuŝe, sed ofte mia alergio al akaroj igis min tusi kaj forlasi la liton.

Ĉu la malsano intensigis ŝian matenan dormemon? Ne eblas fajne diskronografii la ĉi-teman, kaj ne nur ĉi-teman, memoradon.

* * *

Kiel draste ke ĝuste kiam, post siaj kromstudoj pri etnopsikologio, je la aĝo de 45 jaroj, ŝi estis preta ŝanĝi sian karieron kaj eĉ pli rekte helpi homojn, la kancero blokis tiun vojon. Sed ŝi ja insistis kiom eble labori plu – iom malpliigante sian labortempon, sed kiel parton de tiu normaleco kies forrabon ŝi ne permesis al la kancero.

* * *

Mia rigardo karesas ŝiajn somerajn vestaĵojn en ŝranko: sed mankas el ili la korpo. En la salono, iom de la korpo cindre ĉeestas. Makabra ideo, malebla puzlo.

* * *

Antaŭe, la eventoj ekzistis aŭ por ke ni vivu ilin kune, aŭ por ke mi poste rakontu ilin al ŝi.

24 julio

Kiel estus se tra la lastaj sep jaroj mi havintus kanceron kaj mi mortus? Se mi nun havus la elekton ke ĉio estu okazinta tiel, ĉu mi akceptus?

25 julio

Mi mesaĝas al D.: “En la FB-historio de via patrino mi vidas ke la lasta afero kion ŝi faris en FB, la 22an de jan., estis ŝati vian profilbildon”.

Lia respondo: “hm”.

D. aŝiŝis portretfoton la 17an de jan., do kvazaŭ tuj post la anonco ke ŝi havas nur kelkajn semajnojn por vivi. Al mi lia vizaĝo aspektas senfine trista, sed lin mem tiam okupis nur teknika demando.

Ĉu ŝi perceptis tiun tristecon same kiel mi?

* * *

Ŝia lasta retmesaĝo, al sia labordonanto, 23 jan.:

“Mi ne plu venos gvidi staĝojn. Mi estas definitive en hospitalo. Mi bedaŭras anonci ĉi tiun krudan novaĵon. Tamen pli bone ke vi sciuj, por via organizado de la staĝoj. Feliĉan novan jaron!”

27 julio

Post ses monatoj, ne pasas la sento de absurdeco – absurde ke ŝi ne vivas. En la nuna varmego mi vidas multajn leĝere vestitajn virinojn, kaj demandas min per kio ŝi vestus sin hodiaŭ... Ies malhelbruna robo kaj frizaĵo memorigas pri ŝi – sed pri ŝi antaŭ 25 jaroj.

8 aŭg.

Mi atendis ke la UK estos okazo de oftaj rememor(ig)oj pri ŝi – sed ne tiom. Krom la poemdeklamo* de Miguel, per kiu li preskaŭ plorigis sin kaj min, krom la okazaj kondolencoj, kaj krom la esplora momento kiam mi konfesis al amikoj ke mi simbole venigis al Lisbono la laste portitan ĉapeton de Fabienne, daŭre kaptis min la kutima maŝino kongresa.

La samaj amikoj vizitis miajn bogepatrojn: ĉi tiuj diris sin impresitaj kiel bone mi elturniĝas praktike en la vivo nun sen ŝi. Hm.

*Miguel Fernández

Lasta kanto

Memore al Fabienne Berthelot, kiu forpasis la 27an de januaro 2018, ĝuste kiam mi estis ĵus fininta ĉi poemaron. Kor-tuŝite, mi aldonis ĉi lastan kanton kiel omaĝon al ŝi.

Memore al Fabienne Berthelot

Al István Ertl

Ni devintus Lisbono renkontiĝi,
kiam la verdo de l' rivero Taĵo¹
iĝos spegulo de tutmonda eĥo.

1 “*Taĵo* (hispane Tajo [taĥo], portugale Tejo [teĵu], aliaj esperantigoj Taĥo, Tago, Taguso) estas rivero en Iberio, traŭranta Hispanion kaj Portugalion. La nomon *Taĵo*, kompromisan inter la portugala kaj la hispana, ekuzis en esperanto unue Leopoldo Knoedt en sia traduko *La Luzidoj*, poste diversaj membroj de la Ibera Skolo”. (Vikipedio).

Mi volis al vi kanti *Nessun dorma*
kaj *Ne me quitte pas* ĉe riverbordo,
la kantoparon, kiun vi plej amis.

Sed tio ne plu eblos.
Iu sciigis min, ke vi forpasis,
ho fratin' per la piko de la murdema kankro.
Kaj ambaŭ kantoj iĝis ĉe mia gorĝo ploroj,
kaj Lisbon' per-faduas de nun vian foreston.

Estul' amata mortas,
kaj la tuta naturo renversiĝas.
Vanas la teron mini vorto-trove.
Ne elfoseblas vortoj en la kosmo
kapablaj meti buŝumon ĉi-doloren.
Sed ĉiuj vortoj – vi pravas, István – sencas,
ĉar ili helpas la morton supervenki.
Tial mi pripoemas mian ploron.

Kaj ricevas la lumon de via rido pura,
dum vi transvivas vin per viaj amoj.
La memoro pri vi ŝprucigas vivon.
Per ĝi la papavetoj papilias
kaj la kometoj revas iĝi sunoj.
Kaj la taktoj de l' karaj *Nessun dorma*
kaj *Ne me quitte pas* iĝas animo,
kiu sorigas nin en la eternon.

* * *

Aperas kulposento, pro aliaj virinoj: mi rimarkas ke ek-revekiĝas en mi funkcionieroj ne plu “uzataj” de post la konatiĝo kun ŝi: plaĉivolo, amindumemo, simple pli granda atento al virinoj ĝenerale.

* * *

Nun mi fojfoje sukcesas senti ke ŝia morto okazis ne hieraŭ, ke tiu evento lokiĝas en pasinteco proksima, sed ja pasinteco.

9 aŭg.

Ĉi-vespere la ploremo atakis min kiam en la supra banĉambro mi membris la jarŝanĝon 2010/11: ni duope staris ĉe la fenestro ĉi tie, brakojn ĉirkaŭ la talioj, rigardante la artfajraĵetojn surstrate, eble iom tristaj pro la foresto de niaj skiferiantaj infanoj, sed ankoraŭ sensciaj pri la diagnozo 13 tagojn poste. Rerigarde el la nuno, nia duopo staris forta kaj kuna, preta al komunaj elprovoj.

22 aŭg.

Al kiu mi nun rakontu la ĉiutagajn bagatelojn de mia vivo? Ĉu mia patro demandis sin simile en 1992, kiam konstantiĝis la kutimo telefone paroli kun mi ĉiun lundan vesperon?

* * *

Juna hispana koleginino tagmanĝas kun sia koramikino. Li venas al ŝia laborejo lunĉpaŭze, kiel Fabienne venadis al la mia en Roterdamo en 1992.

2 sep.

Mi legas artikolon pri kancero kaj imunsistemo. En la jaro post la diagnozo ni multe legis por kompreni kio okazas al ni; post la provizora faciliĝo (“nenia kancera aktiveco en la korpo”) en aprilo 2012, mi ŝajne multe malpli faris tion. Sed ŝi ĉiam volis, kaj sukcesis, kompreni la kialojn kaj kielojn de ĉiu nova etapo de ŝia terapio. Paralele, mi ĉiam malpli informiĝis. Mi ne volis vidi ke metastazo ĉe la hepato multe pli minacas ol la antaŭaj evoluoj. Sed eble pli bone tiel? Eble ni, aŭ mi? travivis pli belajn jarojn ol se mi restus ĉiam kroĉita je fakliteraturo?

6 sep.

Komparo de doloroj kun Al. Por li estas nekompareble pli malfacile, sed evidente ni trovas komunaĵojn. Specife, li rakontas senti truon en la ven-

tro – ĉu tiu sama sento, kiun mi havis eĉ anticipe, sola en la kafeterio de la hospitalo?

8 sep.

Ĉu mi iam povos kunvivi kun iu alia? Tiu demando komencis sentiĝi kiel permesebla ses monatojn post ŝia morto. Ĝi aperadis eĉ pli frue, sed kvazaŭ tabue forpuŝata. Nun mi povas foje imagi tion, kaj dolĉ-amare memoras kion ŝi foje diris: ke se mi mortus la unua, estus problemo por ŝi, sed inverse ne, ĉar mi certe facile trovus iun virinon. Ŝi eĉ profetis pri juna blondulino el orienta Eŭropo kun bluaj okuloj. Malfacilis por mi juĝi ĉu ŝia tono estis ŝerca; nun mi imagas ke la demando ankaŭ serioze okupis ŝian menson foje.

Se eblus rilato kun iu alia, tio estus kvazaŭ reiri al epoko 30 jarojn pli frua, kvazaŭ por rekomenci segmenton de mia vivo.

* * *

Jutubo malkovrigas al mi filmon pri Novjara Renkontiĝo antaŭ 12 jaroj: jen ŝi sen la malsano.

11 sep.

Mi ne memoras ĉu ŝi mortis “kalva” aŭ kun ĉapeto sur la kapo. Mia vidmemoro donacas al ŝi ĉapeton, sed ŝi certe ne plu surhavadis ĝin tiam – ne plu en la lastaj 48 horoj, kiam ŝi jam ne volis, aŭ povis, zorgi pri tiu aspekta detalo, eble eĉ ĝena, ŝvitiga. Ankoraŭ en decembro, hejme, ŝi malŝategis kiam D. foje ekvidis ŝin sen kapkovrilo.

Sen tiu ĉapeto kiu poste vojaĝis al Lisbono, sen ŝi.

La ĉapeto kiu daŭre kuŝas, kune kun aliaj vestopecoj, sur ŝia litoduono. Ĝis kiam?

13 sep.

Atako de ploro kian mi jam de longe ne havis, simple ĉar ial mi komencis rigardi en la komputilo centon da fotoj. Kiom da epokoj, tiom da Fabienne. Kaj nun neniu Fabienne plu.

Kiam mi rehejmiĝas kaj salutas per *hahó*, ne venas ŝia samvorta respondo, ameme moketa pri mi, kun franceca duonmanko de h-oj.

15 sep.

Aŭtomataĵoj kies senco perdiĝis. Duŝinte min, mi purigas la defluilon, kaj konstatas ke denove estas neniuj haroj en ĝi.

16 sep.

La foto kiu montras ŝin en Sayda en 2012, minuton post kiam ŝi rompis al si ripojn futbalante. Tiam montriĝis definitive ke ŝi ne povas reiri al sia vivo antaŭdiagnoza, antaŭkancera.

19 sep.

Serĉante ion sur kio skribi notojn dum vojaĝo, mi trovas perfektan grizan libreton, donacon el la UK de Nitra. Sed dekon da paĝoj okupas iu ŝia tute praktika “dolortaglibro”, plejparte fakta registrado de doloroj kaj korpaj sentoj, kun la celo ilin konscii, laŭbezzone priraporti en la hospitalo, kaj lerni el la spertoj. Faktoj kiel la utila dozado de certa medikamento.

Sed la notaro rakontas ankaŭ pri “PERFEKTA” Budapeŝta feriado, ŝia lasta, kiam ŝi eĉ naĝis, eĉ “akvopilkis”. Kaj jen la lastaj enskriboj: pri ŝia farto dum la labortago kiu montriĝos ŝia lasta; pri la hepata metastazo; pri la semajnfino kiam sabate liten najlis ŝin laco kaj doloro, sed jam dimanĉe ŝiaj farto kaj stato pliboniĝis. Ŝi esperis ke per tio finiĝos tiu laŭvica krizo. La lasta vorto en la libreto estas france “FINI?”, majuskle, demandosigne.

28 sep.

K. revenis hejmen por la semajnfino. Mi alvenas je 20.30 el la laborejo, jam en mallumo. Ekvidi ŝin en la kuirejo, ĉe la forno, ĝojigas min: jen mia filino hejme. Sed subite ŝiaj vizaĝo kaj haroj, eĉ la pozo kaj okupiĝo, elvokas bildon de Fabienne, kiun mi povis tiom da fojoj vidi tra la fenestro ĉe vespera hejmeveno.

29 sep.

Sonĝo kun Fabienne. Kiso, kaj vere fizika ĉeesto ŝia. (Tre malofta en miaj sonĝoj! Eble mi ne pretas transdoni ŝin al la sonĝomondo.) La kison ŝi devis doni al mi iel ludeme. Sur nia lito mi sidis kaj ŝi genuis, alproksimiĝante por doni kison. Ĉeestis iuj aliaj, sed ne gravis. Mi kredas ke la kiso fine ne okazis, ĉar mi vekiĝis antaŭe, sed ĝi estis okazonta, kaj mi ne sentis min malfeliĉa.

1 okt.

Mi rigardas ŝian portreton, tiun kiu iel fariĝis ŝia “oficiala foto”, kaj ĉi-vespere mi ridetas al ŝi – ridetas ankaŭ ŝi. Sed tio ĉe mi ne daŭras longe – ĉe ŝi ja eterne.

Nun ŝi kaj mi aspektas samaĝaj. Sed post kiam pasos jaroj, jardekoj, mi povos nur teoriumi pri ŝia aspekto de 60-, 65-, 70-jarulino – se mi tion ĝisvivos. Tiam... korpikos min ŝia juneco kompare al mia maljuno.

* * *

Post vekiĝo mi havas dum du horoj strangan senton, kvazaŭ la inverson de deĵavuo. Ĉion ĉirkaŭan mi bone konas kaj rekonas, kaj tamen sentas ian fremdecon pri ĉio: pri la objektoj kaj la ĝenerala ĉirkaŭaĵo, pri miaj kutimaj agoj matenaj. Ĉu mi vere loĝas en tiu ĉi lando? En tiu ĉi nebula, friska pejzaĝo? En ĉi tiu domo? Kun unu filo? Ĉu mi vere ekbiciklos al mia laborejo? Kaj tiel plu. Eble tio estas: *unheimlich*?

A. S. komentas: “tiu preciza fenomeno science nomiĝas *jamais vu*”.



Fotis: Anne Nygard

4 okt.

Okulfrape: laŭ mia kontrolo, ĝis nun en ĉi tiuj notoj la radiko *am'* aperas nur ses fojojn (la radikoj *amor'* kaj *seks'* neniam).

Ĉi-loke mi cenzuras miajn notojn – anstataŭe mi registru kiel kruele la kancero subfosis la membildon de Fabienne, kiun mi ĝis la fino vidis bela kaj dezirinda.

5 okt.

Antaŭe temis pri komuna projekto. Ankaŭ nun mi ne estas forlasinta la komunan projekton por realigi ion solulan, ion mian; mi plu portas la komunan projekton, sed malpli bone, ĉar ĝi estis planita kiel duopa. Kaj partojn de la projekto mi simple ne konas: kio precize farendas pri la tegmenta varmizolo?

6 okt.

Kun D. mi biciklas al la tombejo de Hunsdorf, kie iam estos unu el ŝiaj ripozejoj. Frapeto al la koro: jen la unua fojo el... dekoj? centoj? certe ne miloj, da fojoj kiam mi/ni faros tiun ĉi veturon. La tombejo, kaj eĉ pli specife nia tomboloko, troviĝas rektalinie fronte al nia domo, je 800 metroj birdofluge.

Vivo pluas – mi respondas, hejmenveninte, al mesaĝo de R. Kredeble mi ĝis nun neniam uzis tiun ĉi frazon, nur aŭdis de aliaj kiel konsolon.

15 okt.

Vendrede gastas ĉe ni vespere la familio C. Agrable, sed dolĉamare. Kiam mi fotiĝas kun la filineto K., mi tuj pensas pri la paralelo kun la du fotoj kiujn mi titolis “Ni ludas geavojn”, el januaro 2016, kun Fabienne, mi kaj la ĵusnaskita K. en la hospitalo. Evidente, mi kunafiŝis ĉiujn ĉi fotojn en FB.

* * *

En ambaŭ lastaj noktoj ŝi rolis en miaj sonĝoj, mi kredas ke ni eĉ amoris, aŭ tre proksimis al tio. Kaj ĉe la vekigo la sento estis pli konsola ol amara, kvazaŭ pruva ke ŝi ĉiam estas, estos kun mi.

17 okt.

La Esperanta tagmanĝo kun i. a. Al. kaj I.; ni komparas funebrospertojn. Ilia doloro ja estas pli freŝa kaj eble ankaŭ pli granda. Bonas ke ni ne bezonas fari la vortajn ĉirkaŭpromenojn de sociaj konvencioj; ni povas senĝene salti de unu funebra subtemo al alia.

20 okt.

Mia menso kapablas, senpete kaj nehaltigeble, ligi eksprese ajnan ideon aŭ perceptaĵon al iu memoro aŭ penso rilata al ŝi.

21 okt.

La perdo de digno kiel preskaŭ lasta konsidero de mortantoj: la paradokso ke tia banalaĵo kiel iri al necesejo povas iĝi unu el la plej gravaj zorgoj de niaj lastaj tagoj. La ĝeno kiun mi spertis purigante la pudendon de mia patrino ĉe ŝia vivofino; la ĝojo konstati, ĉe mia patro, ke li sukcesis feki: mi vidis en tio garantion, falsan, de lia pluvivo.

24 okt.

Esti malsana sen ŝi: la unua fojo. Kiam menciigis hospitalo, mi paniketas: kion pri D. sola hejme? Nokto plena de vekigoj pro doloro. Kiam meze

de la nokto mi iras al la kuirejo por preni Dafalganon, mi pensas: jen kio estis tute kutima por ŝi, kaj rutina ankaŭ por mi kiel kibico. Eble mi nun vivas miniaturo ion kompareblan al multaj el ŝiaj tagoj dum sep jaroj.

6 nov.

La semajnoj antaŭ kaj ĉefe post la enoceanigo de cindroj ŝiaj estis tre doloraj, kun rekorde oftaj pensoj pri ŝi. Bonvenis rendezuo kun la psikologino hieraŭ.

7 nov.

“So long, Marianne” de Leonard Cohen: kanto kiu estos, eble, senmorta. Nepre pli ol Marianne kaj Leonard, mortemuloj jam mortaj. La kanto pri ilia amo ekzistas, ili ne plu ekzistas; ĉu ilia amo plu ekzistas? Ĉu mia amo al ŝi, kiun mi plu forte sentas, ne plu ekzistas, ĉar ĝia objekto malaperis? Sendube nia amo produktis aferojn transdaŭrontajn. Sed kie ĝi mem estas? nun? en mia koro? sencela, senobjekta, senseenca?

8 nov.

Paul McCartney eldonis novajn kantojn. Ŝi neniam aŭdos ilin. Douglas Kennedy eldonis novan libron. Ŝi neniam legos ĝin. Ĉiuj artistoj devus ĉesi produkti.

11 nov.

Kun A. en kinejo, por spekti la amfilmon *Zimna Wojna*. Poste: horeto da staranta babilado en kafejo. La unua fojo en mia nuna vivo ke mi “eliras” vespere kun virino.

* * *

La dekstran flankon de la vitra breto, kie situas miaj raz-bezonaĵoj, mi regule purigas. Sed ne la alian finon, kie kuŝas kelkaj bagateloj ŝiaj, kiel ŝi lasis en decembro/januario. Hodiaŭ oblikva sunradio montras ilin polvo-kovritaj: miniaturo Pompejo.

13 nov.

Tagmanĝo kun A., plaĉa homo. La unua virino kiu estas nova konato post la morto de Fabienne kaj kiu allogas min. Revenante hejmen, ĉe la koro mi sentas ne la kutiman froston, sed ian varmetiĝon, kvazaŭ antaŭsignon ke mi kapablos iam denove ami iun. Poste mi ekvidas kaj flaras la adventan kronon faritan de Fabienne antaŭ preskaŭ jaro, mia koro premiĝas – kaj mi ploras duoblan porcion en la banĉambro.

15 nov.

Lerneja akceptovespero. Montriĝas ke instruistoj ne scias pri ŝia morto. Pli ŝoke, patrino kun kiu mi longe babilas, subite demandas: “Kiel fartas Fabienne?” “Ŝi mortis” – mi respondas kruele, kaj ŝi eklarmas.

19 nov.

Ne povi paroli kun ŝi pri ŝia propra morto. Mi ne celas ke mi dirus al ŝi reaperanta: “mi amas vin”, “vi mankas al mi” kaj simile, sed ke mi priparolus kun ŝi, kiel antaŭe, ajnajn problemojn, ekzemple tiujn de mia funebro.

27 nov.

Antaŭ ol endormiĝi, mi turniĝante serĉas optimuman pozicion en la lito, kiam mi “aŭdas” kion ŝi kutimis tiam diri: “ĉu vi do ĉesos ĵetiĝadi”? Eĉ kun ŝia frazmelodio. Mi laŭte ridas, kaj mia rido apenaŭ transformiĝas al ploro.

1 dec.

Mi mendas la surskribon por ŝia luksemburga tombo. Diskuti ĉe la funebro preskaŭ horon pri detaloj de la koloro, grandeco, litertipo, eĉ precizaj marĝeno de tiu plato: kvazaŭ frida profesia sperto, kiel engaĝigi la revuon de UEA. Kiam ĉi tio estas aranĝita, malfermas sin nova tempa dimensio: gravis enordigi ĉion fizike, por aliri sekvan etapon psike.

* * *

Merkrede mi iras al kinejo, ĵaŭde al teatro, kun A. Ambaŭ fojojn ni babilas poste horon, koncentritaj unu al la alia. En tridek jaroj mi perdis, se mi iam havis, la kutimon aŭ la kapablon flirti. Kaj tamen mi sentas en mi ian memcerton, senĝenon, malsame al 2004, kiam trafis min adoleskeca enamiĝo (agnoskende nun, mi kredas; Fabienne neniam scios).

Sed ĉi tio efikas al mia koro kiel duŝo varma kaj frida. Ne ke mi sentus rimorson esti kun A., aŭ ke ideo pri ŝi iel ajn influus la rememoradon pri Fabienne. Temas kvazaŭ pri du apartaj dimensioj. Sed alternas plorkrizoj kun emocia varmosento. Hieraŭ vespere, tia krizo pli fortis ol iam ajn: miaj membroj tremis, mi devis kaŝi min de D. por konvulsie plori.

6 dec.

Malsamaj mienoj sur ŝia ĉiam-sama vizaĝo, sur la foto en mia laborejo... Foje la buŝo ŝajnas kaŝi rideton, foje ĝenon, foje malaprobbon. Ĉu similon imagas homoj kiuj alrigardadas kaj alpreĝas bildon de sanktulo?

14 dec.

La prefero resti en la nuna fazo. (Unue mi skribis: “la nuna stagno”.)

Mi antaŭtimas Kristnaskon, la NR-on, ĉi okazojn tro datrevenajn, memorigajn. En NR ĉeestos nemalmultaj kiuj renkontos nin la unuan fojon post ŝia morto; plejparte homoj kiuj kutimis, dum jardeko, vidi ŝin kaj min kune, kaj kiuj eble eĉ pli perceptos ŝian mankon ol kiom mi pensos pri tio.

Kompare, aperas kiel alloga eblo estadi en la rutino de la ĉiutagoj. Fakte, kial? Pli frue en la jaro ĝuste rutino efikis minaca, plena de doloraj rememoroj. Eble tio ke nun mi perceptas male signas lantan terapiiĝon?

16 dec.

Bonvenas ĉiu momento kiam mi ne suferas pro memoroj (kiel la memoro pri nia lasta Zam-taga manĝo en Trier, kiam pro mia malzorgo ŝi devis dolorige multe piediri kaj suferi la rigardojn de restoraciantoj kiuj kredis ŝin ne elĉerpita sed ebria) – aliflanke, renkontoj kun A. komencas multe okupi mian menson. Unu netrankvila mensostato alternas kun alia.

18 dec.

Mi ŝanĝis en FB mian “amrilaton” de “edziĝinta” al “estas komplike”. Ĉe ŝi mi faris saman ŝanĝon jam antaŭ longaj monatoj.

* * *

“Elstumblis el mia vivo”: venas frazo spontane en la kapon. Stumblado, pro la memoro de ŝia lasta tago hejme. Sed: malĝusta frazo, ĉar ŝi foriris ne tiam, kaj ne tiel. Ŝi ne stumblis, ŝi foriris digne.

21 dec.

“Kutim’ vi estas jam, kiel aer’, rigardo mia vidas ĉie vin,”* – pri la tirkesto de tiu poemo mi pensas, kiam mi ordigas aferojn en la banĉambro, kaj plian fojon alpuŝiĝas al ŝiaj objektetoj, pie – aŭ forgesi – gardataj... same kiel du fioletoj en la fridujo, kaj ĝenerale ŝiaj medikamentoj, eĉ tiuj kiujn ŝi porciumis en mini-boteletojn, certe por januaro, kaj ne plu uzis.

* * *

Ĉiuj laŭdis kiel koncentrite K. kantis en ŝia adiaŭceremonio. K. diras ke estis facile, ke post mallonga periodo de tristo ŝi rapide superis la funebran fazon, ĉar ŝi jam de longe vivis malkune de sia patrino. Ŝi komprenas ke por mi estis, estas alie. Mi ne diras al ŝi sed mi restas iomete ŝokita.

*István Ertl

/Kutim' vi estas.../

Kutim' vi estas jam, kiel aer',
rigardo mia vidas ĉie vin,
en ŝrankofundo, en tirkestoĵ miaj,
en propra cerb', kaj mi vin ne rimarkas.

Sed lastvespere, kiam vi envenis
la ĉambron kaj
subite mi denove konsciĝis
pri vi apuda, mi vin – sen aŭskulti –
rigardis mire. La okulojn
fermis. Kaj silente ripetadis:
"Kutim' ŝi estas jam, kiel aer'.
Ŝi estas tiu kiu min spirigas."

* * *

Lasta ĉi-jara kafumado kun A. Ni transdonas librojn donace por Kristnasko. Mi malkaŝas miajn timojn pri la venonta periodo – ŝi respondas ke la familia etoso tamen bonfaros al mi. Mi: espereble ŝi ne pensas ke mi nur iel instrumente uzadas ŝin por plibonigi mian animstaton; ne: ŝi gravas por mi kiel persono. “Mi ja scias” – ŝi respondas.

* * *

Antaŭ jaro ni aĉetis ŝiajn lastajn pantoflojn. Ili plu staras sub ŝia lito-flanko kaj foje ŝajnas kaprice ŝanĝi pozicion.

22 dec.

Tra la fenestro fortege ekbrilas, post kaj eble eĉ meze de pluvo, probable la sola sunbrilo de la tago. Super Steinsel griza nubaro vorticas. Sed brilas la tegmento de nia antaŭa domo, kaj brilas ĉe ŝia (estonta) tombejo. La forto de la momento kaptas min ĉe la gorgo. Vidi samtempe pasinteccon kaj (tombejan) estonteccon el la sekura domo de la nuno.

* * *

Plurparta dialogo kun A. pri Coelho; post mia surpriziĝo pri ŝia intereso ŝi klarigas la bezonon kompari sian nunan impreson kun la iam grava, adolesk-aĝa; fine ŝi mem duonmoke elektadas citaĵojn por lude pruvi ke ili ĉiuj sonas profunde.

Por mia 24a naskiĝtago, Fabienne sendis al Hungario pakafeton kun la libro de Alain-Fournier, kun la zorge pripensita dediĉo “Por mia unua kurso en hungaro, franca amikino Fab” – mi apenaŭ memoris ŝin tiam, sed ŝi pravis tiel kontakti. Poste inter ŝi kaj mi beletro kaŭzis ankaŭ miskomprenojn, ĉar mi supozis ĝin same grava por ŝi kia ĝi estis tiam por mi.

* * *

Antaŭ jaro ni ekveturis Kristnasken, post tago ni faros same. Kun diferenco je unu homo.

Notoj 2019

4 jan.

Jarŝanĝe mi bezonas rerigardi: mi trarulas ŝian kompletan FB-profilon por 2018. Dum nia feria foresto mi malpli ofte ploris, sed ja tre forte pro la penso ke mi ĵus eniris jaron kiu jam pasos komplete sen ŝi.

5 jan.

Kiam mi sentas proksimiĝi pensojn kaj sentojn plor-generajn, mi plej ofte sukcesas preteri, ĉirkaŭi ilin, anestezi min. Sed ne ĉiam. Iuj ideoj, subitaj vizioj, aŭ emocie forta muziko povas rompi la digojn, venigi plor-singultojn.

6 jan.

Hieraŭ mi ordigadis en la kelo, forĵetis senutilajn mapojn de antaŭ 20 jaroj kaj eĉ bebaĝajn ludilojn de miaj infanoj. Ĉu mi kapablos ekfari simile (sed pli milde) pri ŝiaj objektoj kunestantaj? Ĉu ekzemple ĝis la datreveno de ŝia morto mi forigu ŝiajn vestaĵojn el la lito, eble eĉ lipruĵojn el la banĉambro? Mantelojn el la ŝranko? Estus tro. Sed eble ja for tiujn izolaĵojn kiujn mi ne tuŝis pro respekto kaj funebro: la adventan kronon, la pendantan mansakon... Tia ordigo en la kuirejo aparte doloras. Ŝi ne plu loĝas ĉi tie, nenio devas respondi al ŝiaj bezonoj. Kion mi faru pri malplenaj bokaloj kaj panfara maŝino? Mi planas prepari nek konfitaĵojn nek panon. Ĉu iam ajn ekloĝos ĉi tie iu kun tiaj intencoj?

7 jan.

Atingaĵo de nia amo estas ke ni realigis reciprokan harmonion: agnoskis ke la alia ne ĉiom konformas al nia ideala bildo kaj akceptis la alian tia; sed samtempe ni sukcesis milde modifadi unu la alian direkte al tiu idealo.

12 jan.

En la tradukista festo, koleginoj promesas sendi al mi “facilajn receptojn”. Alifoj mi subite iĝas tria diskutanto pri ideala disdivido de maŝinlavotaĵoj laŭ koloro kaj tempumo.

* * *

Semajno de datrevenoj. Hieraŭ: la anonco pri “nur semajnoj por vivi”. Morgaŭ: la kunveno por niaj infanoj. (“Niaj”, “ni”: pronomo kies pluraleco malaperis.) Sed pri mia patro mi apenaŭ pensis: antaŭ dek jaroj mi vidis lin lastfoje, forlasante lin optimisme en la intensa flegejo, nur kvin tagojn antaŭ lia morto en la “neintensejo”.

Kaj dolĉete-dolorege tiras min la ambigueco inter funebrado kaj vek-iĝanta kapablo denove ami.

13 jan.

La hispana filmo *Truman* montriĝas multe rilati al kancero! Kiel eblis ne antaŭrimarki tion? Ĉu intenca pretervido? La protagonisto mortos post monatoj pro pulmokancero: kiel li aranĝas sian lastan tempon, kaj siajn rilatojn kun la geproksimuloj? Mi ridas ankaŭ kiam kunspektantoj ploremas. Ekzemple kiam amiko malrimarkas nian heroon, ne sciante kion diri al li – jen temo pri kiu Fabienne spertis multajn variojn! Kaj pluaj tiaj scenoj. A. eĉ demandas min ĉu en ordo, ĉu ni restu. Post la filmo mi certigas ŝin ke ĝuste tian filmon mi bezonis.

Grandaj artverkoj ofte vekas impresojn de koincido, ĉar ili ja parolas al kaj pri ĉiuj homoj. Tiel la islanda romano *Afleggjarinn*, kiun mi relegas post ok jaroj. Ĉe la unua lego mi identiĝis kun la 22-jara ĉefrolulo. Sed nun: ankaŭ kun lia patro, perdinta la edzinon, kun filo preskaŭ samaĝa kiel mia.

* * *

Necesas trarigardi ŝiajn vestaĵojn. Post 12 tagoj ni ja bezonos ŝtele enmeti ŝiajn cindrojn en la tombeton. Kia vestaĵo povus eniri ĝin, taŭga por enhavi la cindrojn? Plorigas min tuŝi jakojn, ĉemizojn ktp. ne tuŝitajn de post ŝia morto. Des pli kiam mi venas al vestopecoj kiujn, se juĝi laŭ la perfekta faldo, ankoraŭ ŝi surbretigis.

La sceno en *Truman* kie la protagonisto demandas ĉe la funebra entrepreno kiom da spaco okupas cindroj de homo, ridigis min, min solan, pro la koincido ke mi mem, malpli ol 24 horojn pli frue...

14 jan.

Ĉu, dum nia dua sicilia vojaĝo, ŝi foje restigis sian rigardon sur D. kaj mi, pensante pri lastaj fojoj kaj pri la tempo post ŝi? Ekzemple kiam ni knaboj naĝis en la maro, la du lastajn fojojn.

18 jan.

El recenzo: “homoj vivolonge kunas alian homon sen tro zorgi pri kiu fakte estas tiu, kondiĉe ke la alia ŝtopas breĉon, kiu alie restus malplena.”

20 jan.

Antaŭ unu jaro ŝi hejmis lastfoje. De tuta jaro kuŝas ŝiaj tiam uzitaj du papernaztukoj inter la matraco kaj la muro, ĉar mi ne kapablas ilin forĵeti.

* * *



Fotis: Félix Prado

Mia konstanta hejma loko – sida, labora, ajna – estas nun preskaŭ ĉiam la seĝo inter la fenestrobreto kaj la tablo. Tie sidis ankaŭ mia patro en septembro 2008, kiam li laste gastis ĉe ni. Jam dum ŝi vivis, mia baza loko estis tie – sed vespere mi translokadis min, por apudi ŝin dum ŝi televidis. Nun mi konsciiĝas ke mi gardis la kutimon lokŝanĝi en la unuaj monatoj, kaj iam, sen rimarki, perdis ĝin. Ja mi praktike neniam televidas.

21 jan.

Antaŭ jaro mi same sidis ĉi tie, eble retmesaĝis, eble pri *BA*, plenumis semajnfinan rutinaĵon, dum ŝi restis enlite ĝis 10.30. Kiel tiom da fojoj, mi konsciis ŝin kelkajn metrojn for, dormanta. La lastan fojon – sed tion mi ne sciis. Kaj nun, en 2019, mi sentas fortan tenton stariĝi kaj iri al nia dormoĉambro – sed mi konstatus nur malplenan litduonon, kaj plorus.

24 jan.

Enŝtrumpetigi cindrojn – kia stranga vortkunmeto! Sed jen kion mi faris hieraŭ vespere, prepare al la enterigo morgaŭ. De semajnoj klaris la ideo ke mi devos uzi vestaĵon por kaŝi la cindrojn. Sed nun mi konkrete elektu. Bone, jen ruĝa kardigano. Sed kio en ĝia poŝo konkrete enhavu la cindrojn? Ja ne eblas simple enŝuti ilin tien... tial mi elektis... ŝtrumpetojn, paron helbrunan, da kiaj ŝi havis eble dekon.

Mi unue trinkis du glasojn da vino. Kiel precize transŝuti cindrojn, komplete transigi ilin el metala, cilindra urno en tekstilan ujon, sen ke cindrero perdiĝu? Cindro el cilindro. Per normala supkulerlo mi povis zorge transmeti, en kvin minutoj, 95%, sed la resto bezonis dudek minutojn, malfacilajn fizike kaj emocie. Cindro ja fiksiĝas sub la buŝrando de la urno... Mi prenis falditan paperon (dankleteron de la Kancerfondaĵo!) kaj fluigis la restantan cindron sur ĝin, poste uzis la paperon kiel glitilon en

la ŝtrumpeton... sed persistis la problemo de subrandaj eroj. Mi metis la paperon sur la tablon, starigis sur ĝin la cilindron buŝ-suben, kaj donis fortan baton sur la fundon de ĉi tiu... eliĝis eroj, ĉiam malpli da, ĉiam malpli grandaj... necesis refari eble kvinfoje... la eroj iĝis infinitezimaj sed videblaj... last-rimede mi ĉirkaŭpasigis la fingrojn en la interno de la cilindro, kaj poste alviŝis la grizaĵon disde miaj fingroj sur la ŝtrumpeton... ankaŭ tion kvinfoje... kaj, lastlaste, mi purlekis la fingrojn.

Ŝi amuziĝus pri ĉi tiu farmaniero!

Mi grandigis foton ŝian sur la komputila ekrano, kaj per rigardo karesis ŝiajn frunton, orelojn, mentonon, buŝon, fingrojn... pensis pri la cindreroj kiujn mi adiaŭas kaj kiuj eble respondas al tiuj korperoj... Ĉiuj detaloj de ŝiaj fingroj, *ubi sunt?*

25 jan.

La rimorso ekhavi sentojn al iu nova kaj senti pluamon al la ĉiama, la foririnta.

Post klasika koncerto, en kafejo A. multe demandas pri miaj infanoj, kaj mi rakontas al ŝi pli ol mi planis, aŭ ol mi devus, pri mi mem, miaj nunaj sentoj. Eĉ la hieraŭan ŝtopadon de ŝtrumpetoj.

Por morgaŭ, ŝi deziras forton.

27 jan.

Estas pasintaj nun 365 tagoj kaj 2 horoj. Mi ne vekigis je la preciza mortohoro. Kaj ŝi ne rolis en miaj sonĝoj ĉi-nokte. A. jes.

* * *

Hieraŭ: suna, sed tre malvarma vendreda antaŭtagmezo. Ene de horo, kiu ŝajnas longa, la metiisto kreas la tombŝtonan surskribon. Iom mi sentas mankon de ceremonio, sed tio estus mislokita, tiom longe post la morto. Ni babilas kun la "tombŝtonisto", juna sed mem travivinta kanceron laringan, kaj ĝuas la kompanion de du scivolaj ĉevaloj el trans barilo. Dimanĉe kvazaŭ rekreiĝas la etoso de normalaj, Fabienne-epokaj gastigadoj hejme, aŭ de la funebrotempaj manĝoj: la alvenantaj amikoj mem alportas manĝon kaj trinkaĵojn, tiel ke mi povas senti min parte gastiganto, parte konsolato-nutrato. Ĉiuj sidiĝas ĉirkaŭ la komuna tablo, neniu iras al la sofoj pli for. Verŝajne societa reflekso, sed ankaŭ senvola omaĝo al la momentoj antaŭ unu jaro, kiam ni, postrestantoj, tenis nin varmaj en fizika kuno, interproksime.

Laste alveninta, N. rolas preskaŭ pastre. Ŝi rapide komprenas la ĉagren-

egon de Al. kaj I., proponas ke Al. laŭtlegu la poemon de Miguel – kion li faras eksingulte... kaj fine ŝi aŭdigas bahaan kanton.

28 jan.

Matene A. mesaĝas: “kiel vi fartas?”

30 jan.

Antaŭ teatraĵo ni iras rapide manĝi picon kun A. Ŝi petas rakonti mian semajnfino. Mi diras pri la vulpo transkurinta la ŝoseon noktomeze. A.: “eble la animo de via edzino”. Poste pri miaj infanoj; mi mencias ke R. scias ke “mi eliras kun virino”. A.: “mi volus kapti la okazon diri al vi ion. Estu klare ke nia rilato estas amika kaj daŭru tia.” Maljam dum la teatraĵo mi decidis detale reagi. Do, poste en la teatra trinkejo: “Mi nek surprizos nek ŝokos vin, mi fakte volas danki vin.” Mi rakontas pri mia lasta jaro: la komenca glacieco de sentoj, la sperto vidi eksterulinon sur mia hejma sofo, la malkomforta sento pri konsolemulinioj... Z., la unua kies belecon mi rimarkis... E., kiu min persekutis... Mi finas dirante ke ŝi, A., aperis neatendite sed tute nature, iel evidente, ke estas tre facile kaj agrable kunesti kun ŝi; pro tiu natureco ŝi dankindas. Ŝi estas mia unua vere nova amiko ekde la morto de Fabienne.

Amuze, ŝi donas konsilojn kiel eviti sintrudemajn virinojn, poste demandas ĉu laŭ mi parrilato sen daŭra enamiĝo eblas. Mi rakontas kiel la forteco de enamiĝinteco alternis inter Fabienne kaj mi. Ŝi reciprokas pri sia longa amrilato dure rompiĝinta, postdolora, konfuzanta ŝin – eĉ laste, kiam ŝi iris preni monon, ĝuste la bankbiletojn ŝi forgesis en la aŭtomato. La teatraĵo titoliĝis *Mia koro estos rompita kaj manĝita*. Nu, en la picejo mi perdis la apetiton: mia pico estis rompita kaj manĝita de A.

31 jan.

Se antaŭ unu jaro mi sciis ke nun mi maldormos pro amĉagreno, kia mi taksus min?

Ĉi-vespere, revenis al mia koro la glacia sento kiun ĝi komencis forgesi.

* * *

Vespere rapida aĉetumo en Delhaize, plorkrizo en la aŭto, en la preskaŭ malplena parkejo. Sama (sentiĝas sama!) malvarmo ĉe la koro kiel antaŭ unu jaro. Nur antaŭ semajno mi ekriproĉis al mi ke Fabienne malplioftiĝas en miaj pensoj, sed samtempe ŝajnis konturiĝi vojo al estonteco; nun sentiĝas kvazaŭ mi jam adiaŭis Fabienne sed estas nenia vojo antaŭen.

En la aŭto mi priploris ne ŝian morton, sed mian propran solecon.

* * *

Finfine mi havis decan interparolon kun D., ĉe la vespermanĝo. Mian emocian malplenon mi bezonis plenigi per patra zorgemo. Mi pridemandis lin pri la pianolecionoj, pri la lernejo, pri liaj kutimoj ĉe la komputilo, pri kial li ne legas librojn...

3 feb.

Kun la familio de Ch. Pli frue mi tuj avide notus detalojn pri nia babilo kun Ch. pri Fabienne, sed nun... ties graveco iĝis relativa.

Hodiaŭ kun D. en la tombejo. Unuafoje nur ni duope, se escepti la “proviziton” de 6 okt.

* * *

Ĉu mi “kuraciĝas” el mia funebro, ĉar nun mi sentas alian doloron, malsaman sed same fortan?

* * *

Malfacila endormiĝo, ĉi-foje pro la memtrudo fini la Simenon-tradukon – mi sukcesas je 2.25.

5 feb.

Post filmo kvira en Rotondes, vespermanĝo kun A. en tibeta restoracio. Mi ne kuraĝas malkonsenti pri la loko – ĉi tien mi venis kun Fabienne en 2013, nupto-datrevene. Ree hejme, mi legas la belan poemon *Képzelt etruszk költő* de amiko L. Sz., kiun mi pensis esperantigi. Sed tuj poste mi sentas: kia vanto, kia sensencaĵo! Kaj subite same absurda aperas al mi ankaŭ ĉia laborado pri BA, pri la kulturo Esperanta... pri Simenon... Kaj mi ne sukcesas koncentriĝi pri gazetartikolo: kial interesu min la sorto de Brazilo? Kio okazas al mia menso?

Fotis: Anna Hamilton



7 feb.

Mi ne havas multajn fizike ofte kontakteblajn amikojn. Miaj ĉiutagaj kontaktoj estas kun kolegoj; bonaj amikoj estas for, malofte vidataj. Dum ŝi vivis, tia aferstato ŝajnis al mi preskaŭ konvena.

8 feb.

Mi rigardas foton el 2014. Rigardi ŝiajn manojn revenigas la senton tuŝi ilin. Mi povas pensi pri ŝia korpo kaj vojaĝi tra ĝi. Sed kun mankoj, breĉoj de la memoro. Kaj nenio garantias ke la memoroj kongruas kun la realo – malgraŭ ke mi tiom ofte rigardis ŝian korpon, kiun ajn angulon de ĝi, ne (nur) erotike sed kun emocio. Komence de nia rilato ŝi eĉ miris pri tio: “Mi ne estas la oka miraklo de la mondo!”

Post dudek ses jaroj da kunvivo kaj unu jaro da senigiteco, tiu miraklo fariĝis miraĝo. Cindro kaj polvo.

* * *

Mesaĝado kun mia filo R. Li: “El tio kion vi diras, mi neniam sukcesas eĉ diveni en kia mensostato vi estas”. A. poste komentas tion: “Laŭ miaj observoj pri vi, li pravas.” Mi respondas al ŝi: “Kaj tamen kun vi mi provis klarigi mian malklaran mensostataton. Sed mi ne regas mian konduton, ĉar mi trovas min reĵetita en alian epokon, kaj mi devas rememori kia mi estis tiam kaj eltrovi ĉu mi plu estas tiu sama”.

* * *

En nova rilato mi povus montri min, difini min, iu nova – ekzemple iu modkonscia, iu naturvagama aŭ eĉ iu preta danci... sed eblus ankaŭ forlasi ecojn kaj agadojn – dio gardu, eble eĉ Espon! Sed oni ja devas esti si mem, manke de aŭtenteco ne funkcias – aliflanke, la rilatulo ja influas kia oni montras sin mem, sekve, kia oni efektive estas.

/Postnoto. Kaj vere: en majo B. jam konatiĝis kun iom alia mio./

9 feb.

Memorbildo en la banĉambro. Mi staras antaŭ la spegulo la 24an de jan. 2018 merkrede vespere, eble simple brosas la dentojn, tualetas. Mi preparas min por unuafoje dormi en la hospitalo kun ŝi. Kvazaŭ por nupta nokto.

* * *

Verkinte poemon en la franca, mi relegas mian poemaron *Provizore* el 2003. Prijuĝo: saviĝas nur *La raporto de Tezeo*, *La vidvo* (!), *Vojaĝanto diras* (surprizo, mi memoris ĝin malpli bona), *Disperdito*, *Sumo*, *Kutim' vi estas*. Entute ses.

13 feb.

La naskiĝtago de A. "La plej originala donaco kiun mi iam ajn ricevis" – ŝi diras. El mia rubriko en *Kontakto*:

"Ni, esperantistoj, fieras pri la diverseco kaj bunteco de nia – sincere dirite – tamen miniatura mondo. Kiam oni defias nin pri tio, supozante nian komunumon grupo sekta, sporada, sensignifa kaj simile, ni volonte kontrastigas niajn proprajn kutimojn de vasta vojaĝado translima. Sed kiel bone sentigi al krokodiloj ke nia sperto estas io esence malsama ol turismo organizita aŭ vojaĝado per la angla?"

Mi decidis fari eksperimenton. Submetita al mia provo estas sensuspekta koleginino, kiu ege ŝatas vojaĝi (jam vizitis Tajlandon, altebenaĵojn en Bolivio kaj la Pordon de l'Infero en Turkmenio) kaj iom ŝatas moketi pri la esperantista sekto.

Nu, mi memoris ke pluraj en mia amikaro estas profesiaj aŭ hobiaj ĉiĉeronoj. Aliaj regule montras sian urbon al esperantistaj gastoj. Mi do skribis al dek du geamikoj, de Bamako tra Jerusalemo ĝis San-Francisko, por proponi ke ili sendu al mi deklaron laŭ kiu ili pretos gvidi mian koleginon – ne en Esperanto, sed en aliaj lingvoj kiujn ŝi konas – se ŝi prononcos al ili, en komprenebla maniero, la vortojn *naskiĝtaga donaco*. Ĉu mia koleginino aprezos ĝin morgaŭ, aŭ forĵetos min sen peco el ŝia torto? La estonteco montros."

* * *

Estas bone havi tian kontraŭpezon de gajo al mia funebro, kia estas mia amikeco kun A., sed tiel instrumentigi ŝin samtempe neas ŝian individuecon.

18 feb.

Revidi S. post tiom da jaroj. Ni babilas du horojn. Ŝiaj jaroj nun vidiĝas, la "slavaj" vangostoj ne sufiĉe protektis ŝian vizaĝon; mi tamen konstatas ree ke ŝi, precipe ŝiaj rido kaj rideto, estas belegaj, kaj ke en paralela mondo mi enamiĝus al ŝi.

23 feb.

R. pri sia edzino I., mensmalsana: “Bedaŭrinde, de kelka tempo mi ne plu komprenas kion ŝi volas diri al mi. Ofte mi fine demandas ŝin: ‘Eble vi volis diri ke vi amas min?’ Kaj ŝi respondas: jes.”

Mi ne respondis al la lasta “mi amas vin” de Fabienne. Dum la unua el niaj tri lastaj noktoj, en la hospitalo, mi masaĝis kaj karesis ŝin dum horoj, malgraŭ ĉiaj tuboj ĉe ŝia korpo. Kiam ŝi diris “mi ĝuas” kaj poste “mi amas vin”, mi ne tuj komprenis ŝin kaj ne reciprokis vorte. Kial? Eble ĉar karesadi plu estis mia respondo?

Ĉu pli malbonas perdi edzinon kiel mi perdis ŝin, aŭ perdadi edzinon kiel R. perdadas I.?

Regi lingvon je la nivelo de kutima, ĉiutaga uzo jam malfacilas. Regi la diversajn registrojn kaj kulturajn aludojn estas defieĝo. Atinginte tiun regadon, transpaŝi ĝin por ludi kaj arti estas rezulto de longega strebo. Kompare al ĉio tio, esti reduktita al iu hipoteza “mi amas vin” estas turmento. Kaj belaĵo. Samtempe. Kio restas kiam homo ne plu restas si mem? Suicido kiel por M.; sinko en senkomprenon kiel por I.

24 feb.

Noto kiun mi devus verki fakte antaŭ jaro, la 24an de feb. 2018., kaj kies mankon mi rimarkis dum la finredakto:

Ca. estis amikino de Fabienne, kiu mortis pro cerbokancero 15 monatojn antaŭ ŝi. Ŝian filon mia filo ŝatas, sed mi neniam vere simpatiis la edzon AG. Nun li proponis kafumi, kaj ni restis du horojn en konversacio – evidente, pri Fabienne, pri mi kaj pri Ca., sed pli grave: pri liaj sentoj dum la 16 monatoj de post la morto de sia edzino kaj nun. Jam li povas malfermi sin al aliaj, sed de tempo al tempo ploras plu, kiam sola en sia aŭto. Utile, aŭdi la sperton de tempovojaĝanto.

26 feb.

Sonĝo kun ŝi. Trajno, kiel tiom ofte. Mi devas eliri el la vagonaro, ŝi veturas plu, sed mi bezonas ion diri al ŝi. La etaj vagonoj estas malfermitaj, kvazaŭ turisma trajneto. Mi povas paroli al ŝiaj kunvojaĝantoj, sed ŝin mi ne plu vidas. Ho, tamen jes: ŝi estas juna, kiel ĉe nia konatiĝo.

* * *

En la lernejo por paroli kun instruisto de D. Jam la fakto esti tie iom tuŝas min, ĉar ekde ŝia morto mi revenas eble nur la duan fojon al loko tiel grava por ŝi. Sed kiam mi reiras surstraten, jen ŝoko preskaŭ ekploriga:

mi eksteratende ekvidas la famajn aŭto-malhelpajn fostetojn kiujn ŝi iniciatis.

28 feb.

A. rakontas pri sia jogo-restado en Tajlando. Ŝi perdis tri diversajn aĵojn sed retrovis ĉiujn poste – laŭ ŝi tiel oni malkovras ke certaj aferoj malnecesas, oni ne donu gravecon al ili – kaj ĝuste tiam oni eble ilin retrovas. Ŝi fake-juriste konsilas min pri la plendo de Ba. kontraŭ mi. Kiam mi fine konfesas ke motivis min ankaŭ la supozo ke Ba. edukos siajn infanojn naciisme, ŝi atentigas ke ĉiu rajtas eduki siajn infanojn iel ajn, eĉ jogane aŭ esperantiste.

Mi transdonas la ceterajn donacojn, ankaŭ la poemon*, kies apartaĵon ŝi rapide eltrovas.

*István Ertl

/aspiras.../

(el la franca tradukis Antonio Valén kaj la aŭtoro)

Aspiras al la pintoj de la vintro
 La nuboj kiuj gregas en ĉi nokto,
 En brakumo kruda, kiun la vento mildigas.
 (Kaskadas horoj, venu jam pulsa mateniĝo)
 Sole nur gravas tago, kiu malmuntas la tempon –
 Antaŭe, poste, ĉiam, ĉu daŭru mort-sonoro?
 Ni gvatas la fendigojn sur la lago,
 Divenas ĉu ĝi iel povas
 Rememorigi int-printempajn dolĉojn
 Al niaj manoj obeemaj, kiuj
 Movas la fadenojn de ekflugaj gestoj,
 Ekplugas la agrojn senpaciencajn,
 Lasante la sunon prikanti nian someron.
 Eble jen promeso bruska, freŝa:
 Sonas lontane la bruo de nova
 Kermeso: hom-torento, rebriloj en postmido,
 Odoro vafla. Giganta rado. Ni ek!

2 marto

En la festivalo A. aĉetas afrikan orependaĵon kaj, ĉe stando de “motivisto kaj enŝaltisto de songoj”, rakontas al tiu sian lastnoktan songon: ŝi devis iel probleme forpreni objektojn el la apartamento komuna kun sia eksulo.

Iuj homoj disiĝas eĉ kiam ambaŭ restas vivaj. Kia riproĉo stulta, memcentra.

* * *

Mia zorge pripensita aspekto: senŝanca ŝajnplijunigo olduleca.

* * *

Ĉiuj tri infanoj hejme. Je la 11a horo finfine ĉiuj ĉe la matenmanĝa tablo. Mi vidas kiel K. kliniĝas super libro, kaj apude turas la figuro de la superkreskinta D.

3 marto

Kiam mi forprenu mian edzan ringon?

Ĉu mi ploros farante tion?

Ĉu hodiaŭ, la 400an tagon post la morto?

Mi faris, je la oka matene. Nur kiam mi forprenis la ringon, mi tuj memoris ke ĝi fakte estis donaco de mia patro, origine lia propra edza ringo. Dum longaj jaroj mi neniam pensis pri tio. Kia sendankeco. Mi ploris kaj formetis la ringon en porcelanan ujeton de la dormoĉambra ŝranko. (Kvin monatojn poste, miaj fingroj ankoraŭ ofte palpserĉas la ringon.)

4 marto

El mia oficeja fenestro mi rekonas A. sub ŝtorma pluvo sur la trapasejo. Ofte mi ne rekonas homojn de for – afero kiu ĝenis min eĉ rilate al Fabienne, ne facile identigi ŝin en amaso...

9 marto

Impulse venis al mi la ideo ekredakti ĉi tiujn notojn por BA. Eble pro la emocia sekureco kiun mi kredis senti hodiaŭ, kaj kiun rapide forpelis kelkaj larmoj. Mi antaŭvidis preskaŭ filologian plezuron; anstataŭe venas turmentaj sentoj.

* * *

Noktomeze mi volas simple formeti iujn ĉemizojn, sed pro la lokomanko en la vest-arkara ŝranko min kaptas furiozo ordigi kaj rearanĝi. Mi ekzilas tiujn vestaĵojn ŝiajn kiuj plu pendis en la ŝranko kontraŭflanka. Kun unu escepto (por gardi unu belaĵon ŝian samŝranke) mi ĉion transportas al la supra etaĝo. Plu restas ŝiaj “lastaj” vestaĵoj je la piedo de ŝia lito. Ne eblas ĉion ekzili.

12 marto

Antaŭ jaro mi kutimis obsede demandi min: kio estis okazanta ĝuste antaŭ unu, eble ankaŭ du jarojn pli frue? Dum ŝi vivis... Sed nun, ĵus mi surprizis min pensi: kio estis okazanta antaŭ tri monatoj?

16 marto

Mi suferas pro la manko, pro la malpleno hejme. Tiu sufero tamen ne plu rilatas nur al ŝia manko, sed ankaŭ al la demando: kiel ĝin plenigi? Certe tiu penso-ŝanĝo estas antaŭenpaŝo, sed nur modifas la konsisterojn de la sufero. Iom malpli da funebro, iom pli da angoro pri la estonteco. Kaj sento de ia maljusto, ia mislokiteco en la tempo: se mi devas nun trovi novan kunvivanon, kial tio okazas al mi kia mi estas nun, 53-jara, kiu estis jam akceptonta la ideon baldaŭ fariĝi avo?

* * *

Historia malpinto de mia korpopezo: iam 98 – kaj 77 kg nun. Pli ol iam ajn vidiĝas la preskaŭ ina larĝeco de mia pelvo; apenaŭ muskoloj, apenaŭ graso. Antaŭe mi pli bone akceptis la pliaĝiĝon de mia korpo. Nun obsedas min ĝiaj faltoj kaj faŭltoj.

* * *

Je 23.52 en la kuirejo D. preparas makaroniojn. Mi rigardas lin, kaj subite (pli pensas ol) sentas la nunecon de la momento: ni ambaŭ ĉeestas, vivas, sanas. Tiajn nunojn oni traktas evidentaĵo – sed devus pli aprezi ilin.

21 marto

Post evento ĉe Rotondes, kun A. ni restas longe la solaj plusidantoj por diskuti serioze, eĉ pasie, la ĵusan prezenton, aferojn de egalrajteco... Ŝajne kun A. preferindas serĉi ne harmonion, sed diskuton. Ŝi ridas: “ni konas nin de monatoj, kaj finfine vi rimarkas mian kritikemon”.

24 marto

D. diras ke, dank' al pasvorto de sia patrino, li povis aliri la version 4 de la ludo Sims. "Donaco de via patrino", mi diras kaj esploras tuj kiam mi restas sola.

30 marto

Etaj detaloj el la komenco de iu rilato poste iĝas eroj en familia fondo-mito. "Kiam la unuan fojon mi vidis vian patrinon, ŝi surhavis..." "Mi povintus ne rimarki vian patron, sed..."

Kaj milionoj da tiaj potencialaj historieroj neniam fariĝas efektiva historio.

6 apr.

Sabata vekiĝo. Memoroj pri semajnfinaĵoj matenoj kunaj en la lito. Bilderoj pri ŝia korpo, pri amoroj. Kun apenaŭa kromgusto de tristeco; superregas la belo de iamaj momentoj. Eĉ la konscio de la nun vaka dekstra lit-duono apenaŭ perturbas tiun serenon.

7 apr.

Mi kontrolas ŝian retpoŝton (eĉ nun!) kaj plusendas al mi mem utilan mesaĝon. Kiam ĉe mi aperas F. B. kiel sendinto, mi esploras.

Kaj mi falas en ŝiajn malnetajn, nefinitajn mesaĝojn, relegas vivfragmentojn de antaŭ 4-5 jaroj. Mi ne devus.

8 apr.

No quick fix – ne eblas rapida riparo. Rilato ne estu riparo.

19 apr.

Vespero kun X. Kiam oni atendas nenion, oni ricevas ion.

* * *

La Abba-muzikalo en Novjorko, ŝia ĝojo ĉeesti ĝin. "Amo": feliĉigi la alian, sen peti, sen demandi, sen atendi ion de tiu. Plate kaj banale, sed vere. Balavoine: "ami pli fortas ol esti amata" – longe mi ne komprenis tiun frazon.

24 apr.

Post la koncerto, stranga vesperlumo farbas mian aŭton sangonigra. De la trotuaro A. zorge levas helikojn, por ke ni ne surtretu.

30 apr.

Ĉi-urbe mi revidas elementojn de konata vizaĝo ĉe plej diversaj virinoj. Sed ankaŭ la ina figuro de B. estas fascina, kaj fizike ĉeesta.

2 majo

Kun A. ni komparas la mondojn de jogo kaj de Espo, parolas pri jogo kiel filozofio kaj sanigilo. Ŝi diras ke ŝi neniam estos tro altnivela jogano pro malemo aliĝi al la plej striktaj praktikoj kaj limigoj. Ĉu eblas ĉesi jogi? – mi demandas. Nu, en januaro ŝi apenaŭ jogis. Responde mi klarigas pri la koncepto “kabei”, kio ŝin amuzas.

4 majo

Hieraŭ vespere en Porta Nova mi ne gardis la kvitancon. Kaj sammente decidis forĵeti hejme ĉiujn pagatestojn de preskaŭ tuta jaro, sen fari la kontojn. Tempo por senrespondeco.

5 majo

Gesto de A.: per ambaŭ manoj leĝere skuetas la hararon, poste klinas la kapon kaj blovas supren en la harojn.

Kiom da gestoj de Fabienne restis sen observo mia, kaj nun eterne sen priskribo? Kiom da ĉies niaj gestoj, da nia individueco perdiĝas por ĉiam? Kaj ĉu gravas?

12 majo

La apoteko en Walferdange. Ŝi neniam paciĝis kun ili, ĉar malgraŭ ŝia frekventado oni tie neniam rekonis ŝin. Mi eklarmas, kvazaŭ tiu ŝia vundo estus ankoraŭ io reale ekzistanta, kvazaŭ ĝi ŝvebus super la apoteko kiel griza nuboj.

22 majo

Jam tri semajnojn ni mesaĝumas kun B. Nun ni pasigas tri horojn kune. Kiam mi parolas pri miaj infanoj, ŝi metas siajn manojn sur la miajn, kvazaŭ forto-done. Ekstere ŝi transdonas sian pluvombreton, kaj tute nature alkroĉiĝas al mia brako. Jam io tiel simpla estas forta sento por mi. Tamen iam ŝi devas foriri. Mi postrigardas – ĉu iam revidos – ŝin, ĝuste kiam mi komencis pli bone ŝin ekkoni. Tri horojn poste, ŝi mesaĝas: “mi ŝategis esti kun vi. Kvazaŭ mi konus vin de jaroj. Por diri la veron, mi ne volis foriri.” Mi respondas: “Same miaflanke.” Ekas longa ĉeno el mesaĝoj. Kelkajn tagojn poste, ŝi: “mi devas ĉesi skribi al vi. Nur unu fojon mi renkontis iun kun kiu eblas paroli horojn kaj kunesti same nature. Kaj tiun

mi edzigis (...) Mi ne povis imagi renkonti iun kiel li. Kaj tamen okazis (...) Mi nun rimarkis ke vi ekmankas al mi.”

25 majo

Songô: Mi loĝas en domo sola, subluante tre bonkvalitan ĉambron. Revenante hejmen, mi scias ke provizore loĝas tie iu virino, eĉ dividas kun mi la liton. Laŭ la posedantino, tiu plendis pri diversaj aferoj, eĉ pri la vido el la fenestro, kaj pri la malordo kiun mi lasis. Mi demandas pri kiu temas. Ŝi respondas ke tiu virino nun jam loĝas aliloke. Mi konkludas ke ŝi decidis tion sen informi min. Kiu ŝi estas?

26 majo

Morgaŭ 16 monatojn post ŝia morto. Hieraŭ, plia paŝo en la “evakua projekto”: forigi el la dormoĉambro la skatolojn da fotoj kaj korespondo kiuj restis tie jam 14 monatojn, de kiam ni selektadis bildojn por la ceremonio en marto 2018. Mi volis ne rigardi fotojn, nur ordigi, sed evidente ne rezistis, malplenigis kovrtegon kiun ŝi titolis “Ĉiutaga vivo”, kaj multe ploris. Iusence kuraĝon mi ĉerpis el invito de X. iri kinejen vespere; mesaĝo el la nuno helpis trakti la pasintecon. Poste ankaŭ la vestaĵojn de sur la lito mi forigis – kvankam nur en samĉambrajn ŝrankojn. Netuŝitaj restis ŝalo kaj kovrileto sur la kapkuseno apud mi – simboloj de iu plua ĉeesto – kaj la libroj sur ŝia noktomeblo. Nun la dormoĉambro estas strange granda kaj malplena.

4 junio

A. intense scivolas pri mia provkurso joga, mi raportas tre detale, ŝi proponas ke mi venu al ŝia jogokurso. Jogo: plia afero kiun antaŭe mi ne konsiderus fari.

5 junio

B. enamiĝis al mi, kaj mi ne kuraĝis kompreni tion. Preskaŭ surprizis min ŝia volo revidiĝi. Ĉu do tiaj signoj estas (ĉu nur por mi) tiom malfacilaj por interpreti?

B. emas ekscii ĉion ajn pri mi. Sed finas jene: “Mi sentas min allogata al vi, volas koni vin... sed ne volas malŝpari vian tempon. Vi devus serĉi virinon kiu estu via partnero. Mi ne volas forlasi ĉi tion, sed ja honesti al vi”. Mi: “Amo estas neantaŭvidebla, kaj ĝi povas meti nin en situaciojn kie ni ne volas esti. Sed amon oni ne facile forpelas nur ĉar ĝi estas malpraktika. Iam ni devus renkontiĝi.”

Kaj poste mi trovas por ŝi poemon: “La amo enpluvos / en niajn okulojn / kaj ni ne estas preparitaj por ĝi. / Nuda ĝi estas per sia vero”.

9 junio

Ĉe la endormiĝo okupas miajn pensojn la baldaŭa revidiĝo, dutaga rendezvo, kun B. – sed en mia sonĝo mi venas en la salonon kun D., kie ni trovas Fabienne ĉe la tablo, sed nun la kapo falinta. Mi metas mian manon sub ŝian kapon kaj kun teruriĝo konstatas ŝin mortinta. En miaj sonĝoj ĝis nun ŝi ĉiam aperis viva. Ĉu mia menso sugestas ke la perspektivo amori kun alia virino remortigas ŝin?

20 junio

Parolante pri miaj infanoj al mia gimnastikestro, mi mencias ke “mia edzino estis ĵudistino”. Elirinte al la koridoro, mi emociiĝas, pro tiu subita ligo inter pasinteco eĉ fora kaj la nuno.

* * *

Antaŭ la renkonto, prepare al korpa konatiĝo kun B., miaj mesaĝoj estis ankaŭ delogiloj. Post tiu revido, ili kreskis de emocie agrabla tiklaĵo al vera kor-ŝtormo. Sed nun ili ŝajnas al mi esprimejo de mia nuna sufero pro la foresto de B., kiun mi apenaŭ havis tempon ekkoni. Antaŭe mia logiko estis: ni provu, estas nenio por perdi. Sed ĉu nun, nun estas nenio plu por gajni? Tiam mi ĉion perdis. Kaj ŝi skribis hodiaŭ ke ŝi ne povus trompi la edzon “kun taga reguleco”.

* * *

Ĉu B. vidas ke mi serĉas kaj trovas en ŝi ne nur la individuon, sed la virinan esencon bezonatan por re-duopigi mian vivon? Hodiaŭ ŝi sciigadis min realtempe pri preskaŭ ĉiu movo sia, kaj mi sopiris tion. Kvazaŭ kunvivo; kunvivo kvazaŭa.

12 julio

Kvar tagojn post la ĉiofuŝa mesaĝo al B.

Dum nia vojaĝo tra la Apalaĉoj, mi skribas al ŝi: “En la aŭto ni aŭskultis la muzikliston de D., ekde finna mortoroko ĝis Debussy kaj Brassens. Venas penso de longe ne havita: Fabienne devus scii pri tio, devus koni liajn muzikajn gustojn. Eĉ kiam amo mem estas jam nur memoraĵo, la ligo kiun infanoj kreas inter la paro, travivas pli longe, neniam malfortiĝas.” Kiel statas ĉe B. kaj la edzo? En niaj lastaj mesaĝoj ni ĝuste esploris kiel ŝi parolu kun la edzo por plibonigi ilian kunan vivon... kaj kiel ŝi ekforgesu la figuron kiu hantas ŝin vivlonge... Mi provis influ i eĉ per iuj el miaj minirakontoj.* La provo misfunkciis. Aŭ ĉu?

(daŭriĝo p. 69)

*István Ertl

Dek du rakontetoj por knabino

(el la slovaka tradukis Katja Steele)

1.

Vivis iam knabino kaj knabo. Nenia problemo.

Vivis iam knabino kaj du knaboj. Komenciĝas problemoj.

Vivis iam knabino kaj tri knaboj. La problemoj iĝas ege seriozaj.

Kaj ĉi problemoj malrapide iĝas ludiloj se ni ekpensas pri haremo, en kiu virino estas la sul-tano.

2.

Estis iam knabino, kiu havis ruĝajn ungojn. La ruĝa koloro estas bela, sed ĝi memorigas pri sango, kaj pro tio la knabino aspektis kiel sangavida leonino.

En la vintra sezono la knabino havis blujajn ungojn. Vintre ŝi aspektis kiel reĝino de la nokto.

Kiu estas pli danĝera? Ambaŭ povas engluti la homan koron.

3.

La knabino kun ruĝaj ungoj, kiu ludis per fajro, ludis ankaŭ kartojn en sia lito. Kun ŝi estis du pli junaj knabinoj, kiuj ne volis dormi.

Ŝi diris: „Iru nun dormi!“ Sed nenio okazis. La knabino kun danĝeraj ungoj rapide forĵetis la kartojn kaj elsaltis. Ŝi iĝis leonino. Tiuj du knabinoj ege ektimis kaj kune malaperis.

Ŝi iris en la lito kaj pensis: “Kion mi nun faru kaj kun kiu?” Sed antaŭ ol ŝi povis trovi respon-don, ŝi endormiĝis. La knabino estis ege romantika, sed bezonis ok horojn da dormado.

4.

La Salonikaj fratoj Cirilo kaj Metodo donis alfabeton al la knabino, kiu ludis per fajro.

Tiu ĉi knabino estis fano de libroj pri spiritoj, sed eĉ pli ŝi ŝatis aventurojn. Kiam ajn ŝi povis, ŝi sidiĝis en trajnon al Prago aŭ al alia fora urbo. Kion la knabino trovis tie? Ni ne scias kaj neniam ekscios.

5.

La knabino havis nekutiman anatomian problemon. Ŝiaj menso kaj koro ne estis bone kunli-gitaj. Ŝi bezonis operacion, kiu korektu tion. Luksemburga konsultisto opiniis, ke la operacion povus fari kalifornia specialisto.

6.

La knabino freneze kuris de la monteto. Ŝi havis malplenan kapon kaj plenan koron.

Ŝi pensis: tio estas ege malfacila.

Poste ŝi kuris sur la monteton multe malpli rapide. Nun ŝi havis pezan kapon kaj tre malple-nan koron. Ŝi pensis: tio estas eĉ pli malfacila.

Kiu povas diri al la knabino, kion devus pensi ŝia kapo kaj kion devus senti ŝia koro?

7.

La knabino estis fakte princino, kiun oni trovis surstrate iun vintran nokton. Ŝia plej ŝatata rakonto estis „La princino kaj la draketo“.

Dum multaj jaroj la princino klopodis trovi la draketon. Kiam ŝi trovis ĝin, la draketo estis timigita kaj bruligis ŝin per siaj fajrolangoj. La princino fortiris sin de ĝi.

Ĉiam, kiam ili renkontiĝis, okazis la samo.

Fine la draketo forflugis, sed postlasis fajrolangojn. La knabino daŭre klopodas estingi ilin.

8.

La knabino, kiu ne plu ludis per fajro kaj kiu estis princino, tre ŝatis fabelojn. Pleje la fabelojn, kiujn ŝi legis sola. Sed iun tagon ekvidis tiujn fabelojn ankaŭ la princo.

Ne gravas, ŝi pensis. Mi ne plu legos fabelojn. Nun mi estas plenkreska. Mi bezonas la realon. Sed poste ŝi pensis, ke fabelojn kaj rakontojn ni bezonas dum nia tuta vivo por ke ni komprene la realon.

Fine ŝi aliris la princon kaj diris: Ĉu vi rimarkis, ke ni verdire vivas en reala fabelo?

9.

La knabino ĉiam vivis en siaj revoj. Kelkfoje ŝi ne kapablis distingi inter revo kaj realo. Ekzemple, iam okazis al ŝi en aŭtobuso, ke...

Ne: ni havas rakontojn, pri kiuj ni neniam parolos. Tio estas nun revo, kiu apartenas nur al ŝi. Kiam ŝi estis en siaj revoj, ŝi ofte forgesis pri la realo. Nun ŝi estas jam en la realo, sed ŝi devus ne forgesi siajn revojn. Ĉar ŝi povas provi muldi la realon laŭ siaj revoj.

Ĉu la knabino devus legi pli da rakontoj? Nepra. Rakontoj estas pontoj inter revoj kaj la realo.

10.

La knabino legis ĉiun rakonton, kiun ŝi ricevis, kaj memoris rakonton pri Franz Kafka.

Dum la lasta vintro de sia vivo Kafka kun sia fianĉino vidis en parko malgrandan knabinon, kiu perdis sian pupeton. La knabineto ploris. Kafka diris al ŝi, ke li scias kie estas la pupeto. La knabineto ne volis kredi lin. Kafka diris, ke li ĉiutage ricevas de la pupeto leteron.

Kafka komencis skribi leterojn de la pupeto kaj ĉiutage donis al la knabino unu novan.

En la leteroj la pupeto ĉiam diris al la knabino, kiom ĝi ŝin amas, sed la pupeto estis ĉiam pli for de la knabino. En sia lasta letero la pupeto denove diris, ke ĝi amas la knabinon, sed ĝi devas edziniĝi.

Neniam iu vidis tiujn leterojn, sed ni scias, ke ili ekzistis. Kelkaj knabinoj estas tro senzorgaj.

11.

La knabino, kiu estis princino, havis tro da laboro. Ŝi komencis frumatene: preparis la infanojn por la lernejo. Tio estis ĝojo, sed ĝi estis ankaŭ laboro.

Poste la knabino aŭtis al la Tutfeliĉa Demagogia Instituto, kie ŝi devis labori ĝis elĉerpiĝo. Ĉiuj aliaj trinkis kafon dum la tuta tago, nur ŝi ne. Ŝi laboris+trinkis kafon. Tio ne estis ĝojo, estis ĉefe laboro.

En la vesperaj horoj ŝi laboris en la hejma oficejo, preparis strangajn objektojn por ekspedo al Beluĝistano kaj respondis tedajn retmesaĝojn. Tio estis denove nur laboro, laboro, laboro.

Kelkan tempon ŝi skribis multajn mesaĝojn en la angla nur al unu persono. Ĝi estis la plej neefika laboro, kiun ŝi povis imagi. Sed ĝi estis ankaŭ ĝojo, kiun ŝi antaŭe ne atendis.

Estu kiel ajn, iun tagon la knabino elverŝis sian plendon pri la troa laboro al la princo.

De tiam ŝi faras nur tian laboron, kian ŝi volas fari, kaj ŝi estas la plej feliĉa princino de la mondo.

12.

La plej bonaj rakontoj estas tiuj, kiujn oni ne rajtas disdiri. Ĝuste kiel ĉi tiun lastan rakonton pri la knabino kaj pri...

13 julio

Eĉ al mi mem, mi pretendas esti egale plagata de du ĉagrenoj: la memorado pri Fabienne ĉi-urbe antaŭ kvin jaroj, kaj plia rompomesaĝo de B. hodiaŭ. Sed reale la memorado nun estas nur fona brueto malantaŭ oble pli forta amĉagreno. Mi trovus maldece konfesi tion.

La jarojn kun Fabienne mi vivis en feliĉo, sen bezono (ĉu vere?) ekkoni aliajn virinojn, mirindajn kiel B. Maltrafoj? Ĉe tiu ideo mi devus enorme kulposenti. Sed ne. Ĉu monstre? Ĉu la nuna amosento tiel balae fortas, tiel blindigas? Apud tiu al kiu mi nun enamiĝis, stompiĝas ĉiuj aliaj virinoj.

* * *

Nun kiam nia rilato kun B. ŝajnas finita (blinda espero aldonigas: “?”), mi rimarkas ke mi apenaŭ analizis ĝin ĝis nun. Ĉio iris eksprese. Vivi, ne pripensi la vivon!

* * *

La impresa evidenteco de la kapablo (ree) enamiĝi.

* * *

“Mi amas vin.” Ĉu ankaŭ B. diris tion iam al mi? Jes kaj ne: “Mi suferas nun legante vin, pensante pri vi; vi mankas al mi... Sed mi ne povas ami iun kun kiu mi ne povas kunestadi... tial mi almenaŭ klopodas ne ami vin... sed ne vere sukcese.” Kaj nun: “Mi volonte revidos vin. Sed mi ne plu mesaĝos. /La mesaĝoj/ igas min... ĝuste kia? Dependa de vi, malforta, konfuzita...”

15 julio

Sen la daŭra mesaĝado kun B. perdiĝas konstanta, preskaŭ ĉiuhora virina rigardo sur mian vivon. Fantoma, fantasma kunvivado.

* * *

Kiam mi ankoraŭ skribis al B. ĉiutage, mi notis: “kiam ni revidos nin, intertempe ni estos iĝintaj malrealaj unu por la alia”. Tiel mi sentis kiam ni freneze mesaĝadis unu la alian! Nun estas silento, kaj la frazo eĉ pli veras.

18 julio

Antaŭ semajnoj mi skribis al B.: “mi pensis verki kronikon de niaj kunaj kvardek horoj, antaŭ ol la memoroj ekvanuos. (Jam mi ne plu memoras ĉu vi duŝis vin antaŭ ol ni unue ekamoris aŭ ne. Mi kredas ke ne.) Sed mankas tempo. Aŭ eble mi timas ke registri la memorojn signifus kondamni ilin al neripetiĝo. Sed ili ripetiĝu.” Hodiaŭ, post kiam B. petis

ĉesigi nian komunikadon, mi repensis pri tiu kroniko. Ĝi ne plu havus sian dupersonan publikon. Min mem ĝi torturus; al aliaj ĝi povus ŝajni banala detalaro, aŭ sencela pornografio:

“Kiam ŝi ŝercis vespere ke ŝi eliros urben sen kalsoneto, kaj la homoj ne scios... Kiam niaj korpoj trovis unu la alian, ĉirkaŭ la oka vespere (lumis ekstere), stare inter la lito kaj la pordo al la vestiblo, post kiam ŝi donacis al mi libron de Zweig... kaj mi al ŝi skatolon da dolĉaĵoj (ĉu ni eĉ manĝis ilin?)... Kiam ŝi iniciatis la kison, de ĉiam okazontan... mi baldaŭ faligis la ŝelketojn de ŝia robo, tiel ke la mamoj rapide nudiĝis, mi konatiĝis kun ili, mezgrande fieraj, mirinde firmaj! Mi kieseĝis ilin, ekiris ŝia plezuro... baldaŭ la tuta robo estis for... ŝi iris al duŝo... revenis... mi tuŝis la pudendon kaj pugon, ĉio invitis... kaj jam salivo briligis ŝiajn perlaĵn dentojn en la anhele malfermita buŝo.”

(Jen. Ĉu havas sencon daŭrigi? Eble pli bone vortumi poeme.*)

Matene ni reamoris ekde la sesa, post kvar horoj da dormo – kaj la postan matenon simile. “Mi tre bezonis kafon”, B. skribis, “sed estis io kion mi

*István Ertl

La senfina vojaĝo

(el la angla tradukis Hoss Firooznia kaj la aŭtoro)

vi estas senfina vojaĝo de unua ekrigardo ĝis lasta tuŝo,
de ruĝaj piedungoj ĝis ondoj ŝajne malobeaj de oraj haroj,
brakumata de handikapitoj, rigardata de ĉiu viro dum vi promenas
vizaĝo kiu trabrilas la tempon kun grizverdaj okuloj
buŝo duone aperta elspira plezuron dumvoje al orgasmo
nazflankoj ne tute ĝemelaj sed deziregaj spiri liberon
firmaj orelloboj atendantaj kisojn aŭ eĉ mordetojn
via persika haŭto, kie miaj fingroj serĉas vojon
malsupren inter la cicokronitaj montopintoj
de firma ĝis mola, de seka ĝis humida kaj plu
glitante trans tiu tatuo juneca kaj dolĉa
por tuŝi la umbilikon kiun mi maljuste malmemoras –
dum mi rezolutis trovi vian centron
supozante atingi labirinton
sed nenio povis esti pli simpla nenio tiel klara kaj rekta
kiel via trivoja iro al plezuro
aŭ pli ol triobla, senlima, intima
sorĉa danco envolva ĉirkaŭ miaj fingroj

Sed nun estas mi
kiun envultas via ringofingro.

21-22 junio, Luksemburgio

bezonis eĉ pli.” Kaj surstrate ŝi lip-atake interrompis frazon mian por merge transporti min en voran kison.

20 julio

Novjorko: Mi vagas tra la salonoj de muzeo, kiam mi ekvidas virinon kun somera robo kiel de Fabienne. Larmoj venas. Nun ofte dolorigas memoroj pri ŝi – hodiaŭ ni estis plejparte en lokoj kiujn ni kune vizitis en 2014. Kaj post semajno estos dek ok monatojn post ŝia morto.

Sed aliaj virinaj figuroj kaj pozoj ade memorigas pri B. Eĉ diversaj pensoj kaj frazoj ofte trovas memor-eĥon el nia amasmesaĝado. Kvazaŭ en la Biblio, eblas trovi trafan frazon pri ĉiu temo. B., mia Biblio? Rememori pri ŝi kaŭzas verajn korporemojn fizikajn, similajn al la funebradaj. Post ŝia lasta rompo-mesaĝo mi kondukis same zombie kiel en la mortotago de Fabienne.

Laŭ P. mi ne hezitu uzi empense la vorton *funebro* ankaŭ pri amrilato. Mi reverkas mian amorpoemon tiusence.**

**István Ertl

La senfina vojaĝo 2

(el la angla tradukis Hoss Firooznia kaj la aŭtoro)

La senfina vojaĝo... jam finiĝis?

Ĉu nun mi malmemoru

viajn umbilikon, tatuon, buŝon duonapertan?

Kiel maljusta tio estus.

Mi ankoraŭ rezolutas trovi vojon.

Sed nenio povas esti klara nun, nenio rekta.

Vi fariĝis fora labirinto.

Trivojas nun la iro al doloro: por vi, por li, por mi.

Vin rigardas ĉiu viro, kaj mi estas nur unu inter ili.

Mi estas handikapita, sen via brakumo.

Viaj grizverdaj okuloj forturnis sin de mi.

Vi deziregas spiri liberon, sed ne el mia buŝo.

Kio estis senlima, abrupte finiĝis.

Ĉu petegi vin? Vi ne aŭdus mian krion:

“Envultu min via fingro, *áno, prosím!*”

21-22 julio, Brooklyn

Mi klopodas enŝovi pozitivajn pensojn: mi ĝoju pri la kapablo enamiĝi; estas mirinde ke homo kiel B. enamiĝis al mi ktp.

21 julio

La ilo per kiu mi plej amis B. estis mia telefono.

23 julio

Dolorigas min vidi kiel la nomo de B., kiu staris ĉiam plej supre, sinkas pli malsupren inter miaj WhatsApp-kontaktoj...

Kaj mi obsede repensas pri la datrevenoj: antaŭ precize 40 tagoj, je ĉi tiu horo, ni estis amorantaj la unuan fojon... antaŭ 80 tagoj mi eĉ ne konis ŝin... kaj tiel plu... same kiel mi pensadis pri funebraj datrevenoj lastjare... sed nun mi apenaŭ memoras la jar-kaj-duonajn datrevenojn pri Fabienne... antaŭ dek ok monatoj mi ekpasis la tri lastajn noktojn kun ŝi.

24 julio

Mi ne povas nokte ne relegi iom el nia mesaĝaro kun B., kaj mi estas frapita de la forto de ŝia pasio, pli granda ol la mia, ŝia tenera scivolo pri ĉiu detaleta de mia vivo, ŝiaj daŭraj amkonfesoj ne eksplicitaj... kaj samtempe la ĉiam-revena motivo: ni devas redukti la mesaĝadon kaj nian rilaton; mi trovu "realan" virinon. Ŝi suferis pli ol mi! Mi nur enamiĝis, punkto, fino. Sed ŝi: kaptiĝis en pluraj amoj, konsciis ke ili ne realigeblas samtempe, kaj kiam ŝi donacis al si kaj mi sian amon, ŝia ĉiutago iĝis nevivebla.

30 julio

Kun B. estis kvazaŭ reperdi virgecon. Enpaŝi duan vivon. Ĉio okazis tiel sonĝece kiel virgeperdo devus okazi. Forestis ĉiaj timo kaj angoro.

1 aŭg.

Mortotimo, aĝotimo: fakte, mi havas nun mian *Torschlusspanik*. Ne kiam mi aĝis 40 aŭ 50 jarojn. Sed kvazaŭ 54 jaroj estus ia sojlo, kvazaŭ poste mi perdus ĉiun ŝancon trafi homon kun kiu vivi la ceteron de mia vivo...

3 aŭg.

An. demandas ĉu mi uzas interretajn parul-trovajn servojn. Surprizas min ŝia demando. Sed kial trovi tion stranga? Ankaŭ P. uzas tiajn, sukcese... eĉ konatiĝis kun M. tiel. Supozeble do An. mem uzas...

6 aŭg.

Ofte mi demandas min ĉu mi ŝatus revivi la pasintecon ekde iu aŭ alia momento. Rilate la 6an de aŭg. 2017, mia respondo antaŭ unu jaro estus jesa. Nun malpli. Antaŭe mi emus revivi tagojn kun Fabienne vivanta; nun mi ne sukcesas vidi tiun tempon malkuna de la periodo kiu sekvis, kaj ne emus revivi tiujn tristajn monatojn – kvankam tiam, vivataj, ili ne estis nur tristaj. Plia signo kiel diluiĝas funebro...

* * *

V. diras ke tro fruas por mi okupiĝi pri trovado de iu nova, laŭ ŝi mi estas ankoraŭ tro fragila. Male, mi sentas ke ne fruas, la tempo eĉ premas... Ĉu mi sentas tion ĝuste ĉar mi estas fragila?

10 aŭg.

The Year of Magical Thinking de Joan Didion. Frape multe similas jam sur la unuaj 25 paĝoj, sed ĉu povus esti alie? Jen la nepro kompreni kaj noti ĉiujn detalojn de la edza morto, jen la bezono reverki notojn kaj memorojn laŭe al la evoluo de la funebro... Sed multaj detaloj lasas min indifereanta. Okazos same al la legantoj de ĉi tiuj notoj.

* * *

Tiom da etaj faktoj mi neniam plu memoros el nia kunvivo de 26 jaroj... Ekzemple – eĉ! – ĉu mi kutimis doni al ŝi kison je ĉiu hejmenveno?

11 aŭg.

Tro mallonga dormo. Definitive vekas min bildo kun libro de Pamuk, kaj la penso, subite turmenta: mi nun ne scias, neniam plu scios, kion B. estas leganta.

* * *

Mi rapide ellernas vortliston de nomoj de ĉambroj, mebloj kaj hejmaĵoj en la lingvo de B. Sed kiucele?

13 aŭg.

Komento de P.: kiam ŝi ekkonis min, mi aĝis dek jarojn pli. Mi jam prenis tion kiel komplimenton, sed ŝi celas: en mia kapo. Pli respondecas, pli familipatra ol nun.

* * *

Diversaj stadioj por la animo:

Unue nenio krom Fabienne kaj la malĝojo. Iom da konsola ĉeesto virina bonvenas, ĉefe de patrinaj figuroj kaj de virinoj kiujn mi delonge amikas. Ses monatojn poste, mi unuafoje rimarkas realan virinan ĉeeston: S. daŭre revenadas al mi dum la E-kongreso, kaj poste min frapas kiom belas Z.

Pasas du-tri pliaj monatoj: A. rekondukas min al la socia vivo. Mi remalkovras la plezuron de vesperaj eliroj, eĉ se ŝi volas esti nur amiko. Aliaj geamikoj aperas el ŝia konataro.

Fulmotondro en majo: B. meteoras en mian vivon. Mi skribas al ŝi: “Okazis al mi, eĉ en la lasta jaro, rigardi en la okulojn de virino kaj senti min sub jugo. Sed ne okazis al mi senti same fascinan ĉeeston de la tuta individuo.”

Lasta etapo: dank’ al B., mi sentas min denove kapabla je amrilato. Sed nun tio restas teoriaĵo, en miaj koro kaj menso mi (ankoraŭ?) ne povas disiĝi de B.

15 aŭg.

De post ŝia morto mi apenaŭ legas. Kvindek librojn en dek ok monatoj – multaj fakte estas nur broŝuroj. Antaŭe mi legis centon da libroj en tia daŭro, kaj junaĝe eĉ pli. Kulpas malplia kapablo koncentriĝi, sed ankaŭ iu interna streĉo, eble la sama kiu kaŭzas mian sendormecon – io diras al mi, false: dum vi legas, vi ne vivas.

* * *

Enamiĝante, mi tro hastis; mia ne tute konsciata ambicio jam estis plenigi la breĉon lasitan de Fabienne. Kaj malantaŭ miaj nunaj kontaktoj kun aliaj... latentas la celo elamiĝi el B.

* * *

Ne pensi pri B., ne rigardi ŝiajn WhatsApp-statuson, FB-profilon, fotojn, nian antaŭan korespondecon. Ne plu malfermi foton ŝian ĉe ĉiu enŝalto de komputilo. Trafas min sensencaj samtempecoj: dum Fabienne pasigis sian lastan tagon hejme, B. feriiis kun la edzo en Venecio.

20 aŭg.

Mi vivas en medio kie mi ĝuas grandan liberecon rilate miajn decidojn. Plej multaj en la homara historio tute ne ĝuis tiajn kondiĉojn. Timigas imagi ke eĉ funebradon plej multaj devas travivi ne laŭ siaj propraj sentoj kaj ritmo, sed laŭ reguloj socie antaŭkondiĉitaj.

22 aŭg.

Kia perversaĵo. Mi preskaŭ plezure redaktas tekston pri suferoj.

* * *

Vi estas ĉiam tiel gaja, tiel vigla – diras la bibliotekistino. Kiel leĝere ŝi recenzas min! Ŝi ne vidas la ĉapitrojn interne, nur mian kovrilon.

* * *

Kiam mi survojis renkonti B., la aviadilo malfruis. Ŝi insistis ke pasaĝeroj devas povi “renkonti la virinon de sia vivo”. Ŝi tamen kromklavis ridetan vizaĝon.

23 aŭg.

Eksciinte pri mia teksto, P. proponas helpon de neatendita speco. Ŝi pre-
tas konigi al mi siajn notojn de psikologo pri mi ekde la komenco, t.e.
aprilo 2018. Nekutime pasigi kun ŝi horon preskaŭ nur aŭskultante ŝin.
Kiu mi estis, estas, laŭlonge de 16 monatoj, en la spegulo de ŝiaj notoj?
Ŝi vidas klaran dislimon. Komence min obsedis devoj kaj ŝarĝoj, aliulaj
atendoj, la zorgo pri la gefiloj – iugrade mi eĉ rifuzis agnoski proprajn
funebrobezonojn. Mi bezonis multe paroli pri Fabienne, ofte ploris. Sed
poste, laŭgrade de mia reveno inter la homojn, mi komencis malfermiĝon,
akceptis kaj eĉ invitis konsolojn, kontaktojn. P. kuraĝigis tiun evoluon,
kiu ja estis iompostioma eliro el la profunde funebra fazo. En la lastaj
monatoj la pendolo svingiĝis al la alia ekstremo: mi mem estas la centro
de mia atento (pri tio atestas – diras mi– eĉ la fakto verki ĉi tiun tekston),
venis fazo narcisisma, ekstreme esprimiĝanta en la rilato kun B.

Fotis: Alina Fedorchenko



24 aŭg.

La ekstrema malfacilo kompreni ke nun inter B. kaj mi regas absoluta silento, kruel-kompare al la reciprokaj mesaĝtorentoj antaŭ nur kelkaj semajnoj. Ĝuste kiam mi verkas ĉi-tekste pri niaj amnoktoj, mi vidas ŝin aktiva en WhatsApp – sed utilas por nenio. Plia funebro.

Hodiaŭ, ĝuste dum pri ŝi mi verkas, ŝi almenaŭ deziras al mi feliĉan naskiĝtagon – sed eliras tuj, ne eblas pli mesaĝi. (Kompensete, venas bondeziroj de A. – dum mi skribas pri ŝi.)

Laŭ plano Atlantide eksa, mi revidos B. post kelkaj semajnoj. Eble por dudek minutoj.

* * *

Mi finas verki ĉi tiun tekston en mia 54a naskiĝtago. Kaptas min sento de malvarmo kaj malpleno: ĉu mi ne plu verkados ĉi tiajn notojn? ĉu mi forĵetos ĉi lambastonojn kaj lernos marŝi sola?

Miquel Martí i Pol

Senvorte

(el la kataluna tradukis István Ertl¹)

El mia solo aspra mi vin pensas.
 Neniam plu vi vidos la foliojn
 de l' poploj kiujn kune ni rigardis
 de nia sojlo doma.
 Tiom multe
 perdiĝis kun vi ke apenaŭ restas
 la spaco de mi mem por vin memori.
 Sed la potenca vivo ja eksplodas
 eĉ en medio tiel ĉi malvasta.
 Ne plu vi estas, kaj la poploj verdas;
 kolor' krianta vivon kaj esperon,
 kaj vivas mi, vivanta povas pensi
 vin, kun mi vin kreskigi, ĝis silento
 englutos min, glutinta vin por ĉiam.

¹ Vd. ankaŭ la tradukojn de la sama poemo fare de Antonio Valén, Abel Montagut kaj Jorge Camacho sur p. 116-117.



ORIGINALA POEZIO

Jardeko¹

78

de Miguel Bento

Dek jaroj nin disigas kaj hezito flugas dube –
 ĉu ne indas neniigi moralaĵon aliulan,
 forbruligi la balaston, malpermeson fifastigan?

Neŭrone solidiĝas jam malnova dorno ŝtala,
 elvenas dolornaŭze fumkurteno naftalena,
 en ŝveb' riproĉa, rikan' antaŭĉagrena,
 titolinte sin malanimala.

Sed soifo igas nin frakasi arbitrajn limojn!
 Malgraŭ mokridontoj kaj tabuoj longradikaj
 vanuos la restrikt', fontinta el malkontento.

Nur neŭroze oni neas la soifon –
 per ŝablonoj konstruitaj
 pro kialoj polvdronintaj
 por kaŝi vivofrustron.

La ŝtonecon de la silko sugestias menso,
 sed, se la ideo estas kolektiva,
 oni nomas ĝin vero, ne frenezo.

Kial do cindruloj
 rifuzus plaĉan am-inviton?

1 Poemo ricevinta la unuan premion en la konkurso Poezio Tut'libera de 2019. Ni prezentas ankaŭ ĝian francigon.

Décennie

Dix ans nous séparent et une hésitation fait planer ses doutes —
ne vaut-il pas mieux défaire la morale aux autres
incendier le ballast, l'interdit qui fait crever la dalle ?

Au sein des neurones s'installe déjà une désuète épine aciérée,
un rideau de fumée nauséabond de naphthaline tombe
dans un flottement de reproche, un ricanement annonçant le chagrin
qui s'appelle tout sauf animal.

Mais la soif nous fait exploser ces frontières arbitraires !
En dépit des moqueries et des tabous enracinés
les restrictions nées du mécontentement s'estomperont.

Seul un névrotique nie la soif —
par des modèles construits
pour des raisons empoussiérées
pour cacher la frustration de la vie.

Même la soie se trouve pétrifiée par une suggestion mentale,
mais si l'idée est partagée par tous
on l'appelle vérité et non frénésie.

Pourquoi alors ces esprits encendrés
refuseraient-ils une douce invitation à l'amour ?

Tradukis al la franca: Jesper Lykke Jacobsen

Ekpensoj

80

de Gerrit Berveling

Kion do faris la Di' postkreade?

Di' ekripozis, diras la pia imago:

Di' laciis

- ĉu laci Di' povis?

Ĉu eblas ja ĉi blasfemaĵ'?

Ĉion ĉi portas sola la Di'

- kaj do laci - ĉu eblas?

Di' eksidis, rigardis ĉirkaŭen,

miris, ke ĉion Di' kreis - nur sola.

Ĉefe Di' miris, ke la homo - ina kaj vira

- la hom' do - ekkreis la kredojn,

pensmanierojn, mondbildojn,

eĉ religiojn

- kaj pleninterese

ĉion Di' gvatis, observis, pesis kaj...

trovis negrava, sed bele trovita,

ĉar postkredade, en feri' ĉi unua,

ĉion ĉi miris la Di'.

Ĉar postkreade la Di' ripozis...

Ni en ĉi riĉaj landoj

Ĉi-okcidente, kiu ne loĝus
Sodome?
“Bezonojn negi, pri malriĉ’
ne zorgi, vivi
en ĝu’ pri troabund’:
ĉu ne Sodomo?”
Pri ĉio ĉi rezigni ho
Francisk’ ja kapablis,
persone mi konfesu: mi ne,
sekuro ŝirmas.

Vidu: Jeĥezkel 16:49-50

Ni vivas en tempo ne-nia

La vivon ricevis ni de l’ antaŭuloj
de avoj, avinoj
la vivon ni uzas sencele drivante
sed foje konscie
la vivon ni lasos al nia idaro
ke ĝi espereble pli juste ĝin vivu
sed kiel ajn gvati:
l’ idaro la vivon ne kreis
nek niaj prauloj
nek ni
ĝi estas kaj restas
donaco

ne-nia

Mia vivtempo estas ekstra

Du jardekojn pli ol la patro
mi jam vivas
ĉiutage li sportis, tablotenise,
sed mi neniam:
du jardekojn pli ol panjo
mi jam vivas

tion konscie, mia vivo por mi
estas ekstra

donace
ne antaŭvidite

dankoplene ĉiutage mi vivas

La homa strangeco

Birdo neniam plendas
pri sia beko nek plumokoloro,
eĉ se apenaŭ ĉerpi
akvon ĝi povas aŭ flugi:
ĝi ja simple rigardas
l' eksteron nur donitaĵo
plene hazarda. Ĝi
neniam rasajn konfliktojn
povus kompreni de homoj,
ja tiom inter si samaj,
pleje kun haŭtdiferenc' aŭ
la nombr' neegala de haroj...

Konversacio interreligia

Preskaŭ neniam eblas
simple aŭskulti,
kio l' alian inspiras,
ĉar ofte serĉatas kiamaniere
superruzi l' alian.
Tiu homa tendenco
eble eĉ senscie
multe detruas
da homa bonvolemo.

Pura ĉagreno

L' animon foje tuŝas bedaŭrinde
 pura ĉagreno
 la pleja amekstazo neniam
 nin povas sanigi
 funde ni ĉiuj restas ja solaj
 rekoni ja en okul' aliula
 la puran ĉagrenon
 jen ĉeftasko de l' homa amo.

Naskiĝtago fratina

Miaj fratoj, fratин' mia,
 vivis entime dumvive gepatroj:
 «jen venos la Rusoj, Hungaruj' estis prov' nur»,
 daŭre time hantataj vivis gepaĉjoj.

Miaj fratoj, fratин' mia,
 jen riska operaci', korpumpil' artefara,
 vi ade glutante ja novajn pilolojn:
 vivas ni ĉiuj en tempo ne-nia,

sed tamen ni vivas
 ĝuas liberon.

Ne la unuaj estas ni

Ne la unuaj estas ni
 kiuj pri viv' malesperas
 nek kiuj iĝas amaraj,
 studante historion homaran:
 ĉu vere tiaj ni estas, ni homoj?
 Ĉu tiaj nin la gepatroj revis,
 Projektis kaj planis
 esperis en siaj vizioj?
 Sed tiam, Jesuo, mi pensas pri vi,
 pri via profunda solec' forlasita,
 ke eĉ la Patro ne aŭdi vin ŝajnis,
 ke ĉiuj amikoj vigilante ekdormis
 ĉirkaŭ via helpkrio.
 Sed tamen vi restis plu vi,
 nur vi.

Ja ne la unuaj estas ni,
 kiuj same daŭrigas ĉi-monde:
 ŝvite klopodas ni niavizaĝe
 baraktas, penadas,
 kaj iel ni tamen vivas, fidas,
 esperas, kun pinĉpreno
 da amo.

Larmis la edzino

Neniam ĝis nun la edzin' la ĵurnalon
 priploris spektante;
 sed nun, informite ke Trump elektiĝis,
 spektante ŝi ploris:
 kaj plurajn minutojn l' estonton ŝi timis:
 ĉu sekvos milito,
 ĉar li – prezidento – pripalpi kapablos,
 murdige, senpardone,
 startilon tutmonde efikan pri buĉo
 pli vasta ol homoj
 imagi kapablos: ĉu li atombombojn
 dissendos Usone
 je – nur – neniig' malamika plururba
 aŭ tuj la ĵurnalo
 jam devos raporti pri mondeniigo?
 L' edzino spektante l'
 ĵurnalon matenan-ĉi ploris nun-foje.

Kial ekkonversaciis Dio kun Adam

Konvinkis Serpent', ke mirindas la frukto
 ... kaj ambaŭ ekmordis.

Adam ekkonsciis pri sia nudeco
 kaj volis sin kaŝi
 sed paŝis hazarde en tiu mateno
 la Dio Edene:
 do kiel sin kaŝi, ke Di' lin ne vidu?
 "Vi kie, Adam? Vi
 ho kie vi estas do? Kie vin kaŝas?
 Ho kie, Adam, vi?"

Legonto miregos en fora estonto:
 ĉu Dio senscia
 pri kie Adam en Edeno sin kaŝas,
 ĉu Dio ne scius?

Sed Tertuliano klarige-eksplike
 replikas ke Dio
 nur vokas Adamon, ke tiu eklernu
 agadi laŭ Dio,
 la homo ja vivu agante laŭ spuroj
 de Dia deziro,
 zorgeme komplete ŝirmante l' estonton
 por vivi amplene.

Noto: *Genezo 3 + Tertuliano – Kontraŭ Marciono II:25*

Postaj generacioj

Multe ni faris malĝuste, ho ĉi nia generaci':
 ne sciis transdoni la ĝuon vivadi.
 Rezultojn vi vidas ĉie ĉirkaŭe:
 la junajn – preskaŭ ja ĉie – divorci vi vidas,
 la ĝuon vivi en kuno ne sciis transdoni ni...
 Ĉie vi vidas homojn
 sen fid' je l' estado, je l' vivo, je Di'...
 eĉ tiugrade, ke ĉie amase jen sinmortige
 homojn vi vidas murdi aliajn senkulpajn,
 teroriste sen ajna kialo, nur porvorte miskomprenne...
 Ne sciis ni peri la vivosoifon, la amon je Di'...,
 forgesis instrui per nia ekzemplo
 sopiravidi la vivon.
 Kulpas pri mondkatastrofo
 nur ni, ĉi generaci' kiu mem
 kreskis sub la nuklea inkubo.

Silento

Dumnokte profunde ja dormas la domo,
neniu susuro,
neniu kraket' surŝtupare aŭ vitro-
tintado fenestre:
eĉ mus-moviĝeto kun pen' percepteblus.
Sed musoj ĉu dormas?

Morna vetero

Nek pluvas nek sunas, nur mornas vetero;
nenion mi emas.

Rendevua paĝaro

Ĉu inon serĉante ĉu viron, ne gravas:
nur donu la ĝustajn datenojn.

Sentitole

Kion vi vidas dumsonĝe?
Ke plumo mi estas.
Kion vi faris dumplume?
Ne scias mi: dormis...
Kion do fiŝo dumreve?
Ke revo mi estas.
Kion vi faris dumvive?
Nur scias mi: vivis...



TRADUKITA PROZO

Iter Lapponicum – Vojaĝo al Laponio

88

de Carolus Linnaeus

(el la sveda tradukis kaj komentis Sten Johansson; helpis pri latinaĵoj István Ertl)

Carolus Linnaeus (Lineo, Carl von Linné, 1707-1778) estis filo de kampara pastro el la provinco Smolando en suda Svedio. Li studis medicinon kaj botanikon interalie en Upsalo kaj en Nederlando kaj evoluigis la modernan botanikon, unue per sia verko *Systema Naturae* el 1735. Jam en 1732 scienca akademio sendis lin en kvinmonata vojaĝo tra norda Svedio (inkluzive Laponion kaj okcidentan Finnlandon) por trovi utilajn resursojn ekspluateblajn laŭ la regantaj merkantilismaj ideoj de la epoko. La vojaĝa notlibro de Lineo enhavas miksaĵon de ĉiaj rimarkigoj, ne malplej etnografiaj. Ĉio interesis lin, sed evidente la vivo de sameoj estis por li aparte fascina. Ĝi estas verkita svede sed farĉita per latinaĵoj, ne nur botanikaj sed ĉiutemaj. Poste li faris plurajn similajn esplorvojaĝojn tra aliaj partoj de Svedio. Plurajn disĉiplojn li sendis en vojaĝojn tra la tuta mondo. Ĉi tie sekvas kelkaj eltraĵoj el lia *Vojaĝo al Laponio* kun du el liaj propraj desegnoj.



Linnaeus, desegno de Lars Roberg
proks. 1730

O ENS Entium miserere mei!

[Ho estaĵo de estaĵoj, kompatu min!]

Akceptite la 2-an de majo por vojaĝi al Laponio por ilustru tiun en 3 *Regna Naturae* [Regnoj de la Naturo], mi sekve aranĝis miajn aferojn kaj vestis min per la sekva ekipaĵo.

[...]

Tiel mi ekiris de l' urbo Upsalo la 12-an de majo 1732, kiu estis vendredo, je l' 11-a antaŭtagmeze, kiam mi estis 25 jarojn aĝa krom duono de tag-nokto. Nun la tuta tero komencis ĝoji kaj rideti, nun la bela Flora venos dormi ĉe Febo.

*“Omnia vere vigent et veris tempore florent
et totus fervet Veneris dulcedine mundus.”*

[Ĉio vere bonfartas kaj floras printempe,
kaj la tuta mondo bolas pro l' dolĉeco de Venuso.]

La vintra sekalo jam altis 1 kvaron-ulnon¹ kaj la hordeo ĵus aperigis folion. La betuloj nun ekverdis kaj ĉiuj foliarboj ekmontris siajn foliojn, krom ulmoj kaj tremoloj.

Mi ekiris sola de Upsalo, la malnova gubernia ĉefurbo posedanta kastelon, kiu en 1702 estis ruinigita de fajro, kies egalan vidaĵon oni devas serĉadi. Ĉirkaŭe la ebenaĵo, proksimume ĝis kvaron-mejlo², etendiĝas verda pro Ceres; ĉirkaŭas ĝin montoj kaj fine arbaro.

[...]

La alaŭdoj kantis al mi dum la tuta vojo, tremante en la aero

Ecce suum tirile, tirile, suum tirile tractat.
[Jen sian trilon, trilon, sian trilon ĝi kantas.]

La ĉielo estis serena kaj varma, la okcidenta vento freŝigis per agrabla blovado, kaj malhela koloro el okcidento komencis kovri la ĉielon.

Okstad 5 kvaron-mejloj. Jen la arbaro komencis pli kaj pli superregi, la dolĉa alaŭdo, kiu ĝis nun distris niajn orelojn, forlasis nin; sed tiam en la arbaro akceptas nin alia kun egala komplimento, nome la kantturdo *Turdus minor*, kiu ludante al sia amatino de sur la plej alta picea pinto permesas ankaŭ al ni ĝui tion, jes, ĝi tiel laŭte ludas per siaj diversaj tonoj, ke ĝi ofte superas la najtingalon, majstron de kantistoj.

[...]

En la arbaro ĉie kreskis *Anemonoides* [blankaj anemonoj], kiun kelkaj tro erare distingas de *Anemone* [anemonoj], kaj ili ŝajne neniam vidis anemonojn, krome *Hepatica* [hepatiko], *Oxys* [oksalido]. Sed kurioze estas ke ĉiuj hodiaŭ estis fermitaj; kiu do donis al la herboj la prudenton kovri sin kontraŭ pluvo, jes, ofte kiam la vetero en momento ŝanĝiĝas de sunbrilo, en kiu ili etendas siajn tapetojn, denove en momento kiam ekfalas pluvo, kuntiras ĝin, kiel ĉe tiu triopo?

Nun unuafoje aŭdigis sin la kukolo, kiu aŭguras la dolĉan someron.

[...]

1 sveda ulno = 59 cm

2 sveda malnova mejlo = 10,7 km

HELSINGIA [Helsinglando]

Da herbejoj estas tre malmulte. La pliparto de l' tero konsistas el rokaj montoj, kiuj estas *inhabitabiles* [neloĝeblaj], kaj do nur en la valoj videblas bienoj, kiuj havas iom da herbejoj, tamen malmulte da altsituaĵ, sed plejparte marĉaj herbejoj.

La popolon mi ĉi tie trovis ĝenerale pli alta ol aliloke, precipe la virojn; mi demandis, ĉu oni mamsuĉas pli ol aliaj, al kio oni respondis ke du jarojn kaj ofte du kaj duonon. Brando ĉi tie ne ĉiam akireblas. Mi kredas ke Adamo kaj Eva estis gigantoj, *ratione ab ovo in ovo, paupertate Israelitarum et Amonitorum magnitudine, Laponum structura etc.* [se konsideri la heredon, la malriĉecon de Izraelidoj kaj la grandecon de Amonidoj, la staturon de Sameoj k.t.p. (?)]

La popolo estas humana, havas belajn domojn interne bonordajn kaj purajn, pli bone konstruitajn ol aliloke.

[...]

Apude mi vidis *Hepatica fl. purpureo, alias rarissima* [hepatikon purpurfloran, cetere raregan], kaj ŝatus baldaŭ malkovri la tezon de ĝardenistoj, kiuj asertas, ke *colorata terra* [kolorhava tero] ŝanĝas *colorem floris* [la koloron de floro].

[...]

Tuj antaŭ ol veni en la arbaron, mi atingis 7 sameojn, kiuj pelis siajn 60 ĝis 70 boacojn, kiuj kunhavis siajn etajn idojn. La kornoj de l' plimulto jam defalis kaj novaj komencis aperi sur la plej multaj. Mi demandis ilin, kial ili alvenis ĉi-malsupren. Ili diris ke ĉi tie ĉe l' marbordo ili naskiĝis kaj ĉi tie volas morti, parolis bone la svedan.

[...]

MEDELPADIA [Medelpado]

Kiam mi proksimiĝis al la gastejo de Dingersjö, mi ekvidis la grandan *Aconitum hirsutum galea angusta* [vilan akoniton kun malvasta kasko], kiun la kamparanoj nomis *kaskofloro*, kiu poste dum la tuta tago fariĝis same ofta kiel erikoj. Neniu bruto manĝas ĝin, sekve ĝi kreskas tre riĉe, ĉar kiam la aliaj estas formordataj, ĝi havas okazon pli multe prosperi. Do oni vidas, ke la senanimaj bestoj lernis el la naturo, kio estas danĝera aŭ utila, *nullo docente* [sen instruisto], sed la homo ne.

[...]

La 26-an ekiris el Umeå en pluva vetero, kiu daŭris la tutan tagon, mi iris laŭ la vojo okcidenten, celante al la Samea lando de Lycksele. Nun mi malhavis la antaŭe ĝuitan avantaĝon mendi ĉevalon en la gastejoj, kion eksteruloj konsideras nenia favoro ĉi tie en Svedio, ĉar nun mi devis kun multaj manipuloj petegi pri ĉevalo. La vojo fariĝis al mi ĉiam pli kaj pli mizera, tiel ke mi rajdis la ĉevalon dum vivdangero, kiam ĝi stumblis inter ŝtonoj je ĉiu dua paŝo. Mi nun estis kondukata laŭ flankvojoj, por ke la diablo ne retrovu min. Nun mi komencis deziri kamaradon aŭ posedi la liberon esti skuata de ĉevalo sur la vojo, tiel ke la koro nepre malfiksiĝas. La popolo parolis kun forta akĉento kaj ĉiam iom mallongigis *adjectivum* [la adjektivon], kiu finis la parolon³.

Hodiaŭ mi vidis nenion tre kuriozan krom sablo apud la rivero tuj ĉe Gubbele, kiu situas apud Brattby, kiu estus valora por fanduja sablo.

[...]

Vespere mi petis pri manĝo; oni prezentis al mi brustaĵon de urogalo, kiu estis mortpafita en la pasinta aŭtuno kaj tiam kuirita; ĝi vere ne aspektis tre bele kaj mi supozis ke ĝi ne gustos pli bone, sed mi spertis ion tute alian, ĉar ĝi gustis delice kaj mi miris pri l' malprudento de multaj, kiuj ricevante pli da birdoj ol ili bezonas, lasas ilin malfreŝiĝi, kiel ofte okazas en Stokholmo, kaj mi vidis kun plezuro kiel *paupertas* [malriĉeco] instruas pli bone uzi *bona Dei concessa* [la bonaĵojn donatajn de Dio] ol aliaj. Kiam la brustaĵo estas senplumigita kaj purigita, malfiksita de l' cetera parto, oni tranĉas ambaŭflanke ĉe *carina sterni* [la brusta ostoj] apud *basis longitudinaliter* [la bazo, laŭlonge]; ĉi tion oni unue peklas per subtila salo dum kelkaj tagoj, poste oni ŝutas iom da faruno sur la suban flankon, por ke ĝi ne algluiĝu, poste metas en bakfornon, post kiam oni bakis, por esti malrapide sekigata, kion oni poste metas sub la tegmenton de provizeja domo por sekiĝi, estas lasata kaj restas same bona, eĉ se oni konservas ĝin dum 3 jaroj.

Mi nun ne plu atingis foren pro superflua pluvado, sed devis resti ĉi tie dumnokte. Surlite kuŝis kelkaj kusenoj plenaj de boac-haroj anstataŭ fojno; sur la littuko kuŝis boac-felo kun haroj, la haroj rigardis supren, sur kiu mi kuŝis tre mole.

27-an. Matene mi estis malhelpita de pluvo ĝis tagmeze. Ĉi tie mi vidis *Salices arboreae, glabrae, cortices superiores glabrae conscisse* [kapran salikon, glatan, kun supra ŝelo glata detranĉita] (senvalora estas la mal-

3 Jen dialekta trajto restanta eĉ hodiaŭ

glata, kiu sidas malsupre sur la trunko), kiun oni ĉi tie uzas por tani sian ledon.

Tagmeze mi ekiris sur vojo, pri kiu mi konfesas ke ĝi estis tiel malfacila, ke mi neniam konis egalan, ĉar ĉiuj elementoj kontraŭis min. La vojo estis ŝtono sur ŝtono kun grandaj implikitaj arbradikoj, inter kiuj estis profundaj kavoj akvoplenaj, ĉar la pluvo kaj la frostigita tero, kiu nun estis degelanta, kunhelpis. [...]

Nenie mi ricevis ion ajn alian ol akvon por trinki.

Sur la muroj sidis *Agaricus pedis eqvini facie* [poliporo (?)] por pinglokuseneto.

Kontraŭ pluvo oni uzis kolumon el betulŝelo fiksitan per pinglo ĉirkaŭ la kolon.

La virinoj lavis la plankon per la dekstra piedo, sur kiun ili metis sekan piceofaskon, tiel kurante tien-reen.

[...]

LAPPONIA LYKSELENSIS [Laponio de Lycksele]

La 31-an post finita diservo mi ekiris for de Lycksele, celante al Sorsele. La posedaĵo de l' sameoj konsistas *in multitudine Rangiferorum* [el amaso da boacoj]; kiu havas grandan boac-forton *ut vocant* [kiel oni diras]. La plej malriĉaj havas 50 ĝis 100, bonstataj 300 ĝis 700, riĉaj 1000.

La terposedaĵoj mezuras diametre 3 ĝis 5 mejlojn.

Sovaĝaj boacoj malofte troveblas en Laponio, ĉefe troviĝas kelkaj sur la komuna tero inter Granön kaj Lycksele. Ofte okazas ke tiuj, kiuj havas sufiĉe multajn boacojn, perdas kelkajn, kiujn oni en la sekva jaro retrovas kaj pelas al la grego; se ili tamen ne volas sekvi, oni mortpafas ilin.

Laponio multloke estas loĝata de setlantoj, *id est Finnonnes* [tio estas finnoj], kiuj ĉi tie *jussu et permissu regis* [laŭ reĝaj ordono kaj permeso] ekloĝas, kreas kampojn kaj herbejojn, kiuj donas ioman imposton al la ŝtato, poste estas liberaj de ĉia eksterordinara elspezo, same la sameoj, subtenante nek teran nek flotant soldaton, restante egale kontentaj ĉu regas paco aŭ milito, ĉar ili havas neniom da pagodevoj.

Estas al ili permesite, kie ajn ili volas setli en Laponio, kie ili povas evoluigi tiaĵon, tiel ke estas nenia dubo, ke la plejparto de Laponio iom post iom fariĝos kultivata kamparo.

Al la preĝejoj venas sameoj kaj setlantoj je Kristnasko, Pasko, Pentekosto kaj ĉiuj 4 pentotagoj. Alveninte, ili restas dum la tuta festo, pro kio ili havas siajn sameajn kabanojn apud la preĝejo. Sed la setlantoj

krome alvenas je Somermezo, Mikaelo, Mateo kaj Anunciacio. La plej proksimaj ĉiun duan dimanĉon, kiam oni predikas, sed ĉiun duan oni faras nur preĝadon por la domanaro.

Nun je Pentekosto neniu sameo estis ĉe l' preĝejo, ĉar la ezokoj plej bone frajis, kio estas ilia rikolto; nun ili plejparte estis en la montaro kaj ĉiu sur sia tero.

[...]

Ambaŭflanke de l' rivero mi vidis sameajn kabanajn, en kiuj sameoj loĝis somere, tiel ke restinte en ĉiu loko maksimume 8 tagojn, ili migras pro l' paŝtado de l' boacoj; ankaŭ ili mem ne longe bonfartas en unu loko. Ili pelas la tutan gregon kun idoj kaj ĉiuj por naĝi trans la riveron, ĉar la boacoj naĝas bone, kvankam la rivero nun mezuris 8 fusilpafojn laŭlarĝe. Vespere kantis turdo, kaj grandaj glacioj kuŝis ĉe l' norda flanko de l' arbaro sur la riverbordo.

El betuŝelo la sameoj faras telerojn, ĉerpilojn en la boatoj, ŝuojn, salkuvojn en kiuj pekli fiŝojn, korbojn.

[...]

La sameoj volonte drinkas brandon, *qvod notabile est in omnibus piscatoribus. Nescio qvid venando et piscando Lapponibus anteferendum sit* [kio estas rimarkebla ĉe ĉiuj fiŝistoj. Mi ne scias, kio por sameoj estus preferinda al ĉasado kaj fiŝado].

La 1-an de junio. Naviginte kun granda peno dum la tuta nokto (se mi rajtas tiel diri, ĉar la lumo ne malkreskis, sed la suno forestis dum horo kaj duono, kaj sufiĉe malvarme), ĉar la setlanto devis paŝi tra torento trenante post si la boaton $\frac{1}{2}$ mejlon unufoje, por kio li faris al si betuŝelajn ŝuojn; ni matene surteriĝas por akiri sendoton, *missionarius s. lappon* [senditon aŭ sameon], por akompani min pluen. Ni tuj trovis senhoman kabanon, de kiu ni rapidis 1 kvaron-mejlon al la dua, kiu estis same senhoma, fine $\frac{1}{2}$ kvaron-mejlon al 3-a, same *vacua* [malplena], poste mi sendas la viron al 4-a por trovi lin, se li estas tie.

[...]

Ĉe siaj loĝlokoj la sameoj ĉiam aranĝas tiel, ke ili havas provizon de freŝa akvo el bonaj, malvarmaj naturaj fontoj.

Ĉiuflanke de l' fajro oni kuŝas, la homoj kuŝas tute nudaj, nur kun boacfejoj sur si. Ankaŭ ne hontas viroj aŭ virinoj stariĝi nudaj por vesti sin.

[...]

Kankroj aŭ puloj ne ekzistas en Laponio.

Vespere ni venis al insulo, sur kiu estis fiŝistoj, kiuj estis terkulturistoj el Granön, 8 mejlojn for de ĉi tie. [...]

Ili restadis ĉi tie de 6 semajnoj kaj intencis resti ankoraŭ 14 tagojn, dum la ezokoj frajos. Ili manĝas plejparte nur fiŝaĵon, t.e. frajon kaj aliajn internaĵojn.

Pro tio ili pagas neniun imposton al la ŝtato, nek al la sameo, kiu posedas la akvon, kiun ili forpelas, kvankam li pagas imposton. Li eĉ ne kuraĝas tie enakvigi la plej malgrandan reton, ĉar tiam ili elakvigas ĝin, ĵetas ilin inter la arbojn, *ut saepius fecisse retulerunt* [kiel ili rakontis ke ili ofte faris].

La kompatinda sameo, kiu mem ĉi-sezone devas vivi sole el fiŝoj kaj per tio subteni sian familion, nun jam havas apenaŭ unu aŭ 2 fiŝojn. Mi demandis, kial li ne plendas, sed li diris ke li unufoje demandis la superulon (la distriktan juĝiston), kiu diris ke tio estas bagatelo. Li estimas *dicta illorum* (de l' ŝtataj funkciuloj) *qvasi ex tripode Apollinis dicta essent, nec fallere possent* [iliajn ordonojn kvazaŭ ili estus direktaj el la tripiedo de Apolono kaj ne povus erari]. Li respektas sian reĝon kvazaŭ Dion, tamen pensante ke se la reĝo sciis, kio okazas, li ne tolerus tion.

2 junio. La arbaro estis plena de pinegoj, tute vane, ĉar neniu faras el ĝi domon kaj neniu ĝin manĝas. Ŝajnis al mi ke ĝi povus servi, se oni per bruligo farus el ĝi peĉon kaj gudron.

Setlantojn, kiuj ekloĝas inter la sameoj, ili amas, volonte montras al ili, kie eblas kolekti fojnon, kiun ili mem ne bezonas, ĉar la boaco prefere manĝas en sekaj lokoj; ĉar ili opinias ke eblos aĉeti de li farunon kaj lakton.

[...]

Neniuj setlantoj loĝas pli supre ol ĉi tie.

Ni alteriĝis por iom ripozu ĉe kabano. Ĉi tie antaŭ jaro la patro mortigis sian filinon, por ke la bofilo ne heredu.

Hodiaŭ blovis tre malvarme de norde.

[...]

Tuj poste komenciĝis marĉoj, kiuj plejparte estis sub akvo; tra tiuj ni devis paŝi plenan mejlon, imagu kun kia peno; je ĉiu paŝo la akvo atingis la genuon, kaj se ni ne trafis tufon, eĉ pli alten. [...] Se mi devus suferi tion pro *delictum capitale* [mortmerita krimo], tiu puno estus kruela, sed kion mi nun diru? Mi tiam deziris neniam entrepreni ĉi tiun vojaĝon. [...] La

tuta lando de ĉi tiu sameo estis plejparte marĉo, *hinc vocavi Styx* [sekve mi nomis ĝin Stikso]. Neniam la pastro povus tiel priskribi la inferon, ke ĉi tio ne estus pli terura. Neniam la poetoj povus tiel malbele pripentri Stikson, ke ĉi tio ne estus pli malbela. *Stygium penetravi* [mi trairis Stikson]. Ni iris al sovaĝejo, ne sciante kie. [...] La sameoj, kiuj naskiĝis por suferi, kiel birdoj por flugi, ĝemis ke ili neniam spertis ion tian; mi kompatis ilin.

[...]

Mi demandis, kial la sameoj ne konstruas al si 16 ĝis 20 dometojn, en kiuj ili povus stari rekte, ĉar la arbaro ĉirkaŭas ilin. *Sed respondent* [sed ili respondas], somere ni estas en unu loko, vintre en alia, eble 20 mejlojn for de ĉi tie, kie ni trovas muskojn por niaj boacoj. *Qvaerebam, cur non colligant aestate muscum rangiferorum, ut eum praebeant hyeme in epula? Negant, quia aestate versantur ubi pisces, hyeme longe abhinc ubi crescit* [mi demandis, kial ili somere ne kolektas kladonion⁴, por povi vintre doni ĝin al ili kiel nutraĵon? Ili diris ke ne, ĉar somere ili restas, kie estas fiŝoj, sed vintre fore de ĉi tie, kie ĝi kreskas].

Inter la sameoj estas ampleksa manĝado de viando, ĉar familio el 4 personoj facile manĝas unu boacon en semajno, ekde kiam ĉesas la fiŝoj, ĝis ili rekomencas fraji kaj migri. *Qvaeritur* [oni demandas], ĉu ne eblas ekonomii pri l' mastrumado? Kiam li ne ricevas fiŝojn, li devas aŭ mal-satmorti, aŭ buĉi boacojn somere. Da brutoj aŭ bestoj li posedas neniom krom la boaco kaj la hundo; aliajn li ne povus treni kun si. Li manĝas, kiam li sukcesas mortpafi ilin, gulon, sciuron, marteson, urson, kastoron, jes, ĉiujn *excepto vulpe et* [krom vulpo kaj] la lupo, tiel ke lia tuta nutraĵo estas boacaĵo, birdaĵo, fiŝaĵo kaj akvo.

[...]

LA MONTARO

La 6-an de julio. Posttagmeze ekiris de l' altforno⁵, kaj 1 kvaron-mejlon de tie mi havis la monton Vallavari, kies alteco mezuris pli-malpli ¼ mejlon. Kiam mi venis sur ĝian flankon, mi imagis esti portita en novan mondon, kaj veninte sur ĝin, mi ne sciis, ĉu mi estas en Azio aŭ Afriko, ĉar la terkvalito, la situo kaj ĉiuj herboj estis nekonataj al mi. Mi nun venis sur la montaron. Tute ĉirkaŭis min neĝaj montoj; mi paŝis sur neĝo kvazaŭ en plej severa vintro. Ĉiuj raraj herboj, kiujn mi antaŭe vidis kaj admiris, ĉi

4 Lineo skribas "boacan muskon", sed fakte temas pri likeno.

5 la vilaĝeto Kvikkjokk

tie aperis kvazaŭ miniature; jes, krome tiel multaj, ke mi mem teruriĝis, kaj ŝajnis al mi ke mi havos pli multe por fari ol mi kapablos.

[Sekvas listo de 30 plantoj kun priskriboj, inter kiuj du variantoj de andromedo, kies nomon Lineo ĉerpis el antikva rakonto pri Andromedo, la bela filino de Kasiopeo. En sia notlibro li desegnis la filinon kaj la floron.]



La altaj montoj, starantaj unu sur la alia, ne estis krutegaj, sed surŝutitaj per ŝtonoj. Ĉiuj ŝtonoj estis *fissiles, hinc facile distingvibiles* [skistaj, sekve facile distingeblaj]. La neĝo kuŝanta surmonte, tiel ke duono de l' tero estis kovrita, senĉese ellasis akvon, por refreŝigi nin vojaĝantojn, kvazaŭ fonto; estis sufiĉe bongusta, kaj kvazaŭ rivero tranĉis sian vojon tra l' profunda neĝo.

La malgrandaj montaj lagopoj, *scolopacino colore, alis albis* [en koloro de skolopo, kun blankaj flugiloj] havis siajn idojn. Mi prenis unu, la patrino kuris ĝis mi, tiel ke mi povus kapti ŝin, senĉese kuradis ĉirkaŭ mi; senpene mi povus jam 100-foje mortigi ŝin, se mi ne domaĝus igi la etajn idojn senprotektaj en ilia junaĝo kaj ne pripensus la korinklinon de patrinoj. Mi redonis al ŝi ŝian filon.

La 7 julio. Paŝinte dumnokte, 4 ĝis 5 mejlojn, mi kuŝiĝis matene en kabano.

[...]

Matene revenis hejmen kelkmil boacoj, estis melkataj de viroj kaj virinoj, starantaj sur unu genuo.

[...]

Oni donis al mi selakton por manĝi, *id est serum post caseum excoctum quod coagilatur ad instar zytogale* [tio estas selakto post kiam kuire el-iĝas la kazeo, kiu koaguliĝas simile al lakta biero]. Fariĝas tre malmola, gustis bone kaj satige, sed la apetito iom malkreskis pro l' lavado de l' kulero, ĉar la mastro enbuŝigis akvon kaj ŝprucigis sur ĝin, frotis kaj viŝis per fingro, sed la edzino lavis la ujon, en kiu antaŭe estis lakto, per fingro, kiun ŝi lekis post ĉiu streko.

[...]

Ok herboj hodiaŭ trovitaj [sekvas listo].

Ĉie en la tero estis truoj en deklivo fositaj de ruĝaj musoj. Lemingoj.

Leporoj troviĝas montare, somere grizaj.

Neniu herbo nek arbo altas pli ol 1 kvaron-ulnon plej supre surmonte, malsupre en valoj apenaŭ 2 ĝis 3 futojn.

[...]

Vespere ni serĉis kabanon (*Gotti*) malfruege nokte sed trovis neniun; ni vidis ĉie en la marĉoj piedsignojn de boacoj, kiuj gvidis nin jen tien jen ĉi tien; mi paŝis ĝis mi apenaŭ povis stari kaj estis proksima al perejo, kuŝiĝis por prefere elteni la malvarman ŝtormon ol plu paŝi. Finfine la sameo, kiu akompanis min kaj la serviston, trovis boac-fekaĵon; li prenis ĝin enmanen, knedis, flaris, igis la alian preni kaj flari, jes, volis eĉ doni ankaŭ al mi, interpretis el ĝi ke la sameo foriris (t.e. transloĝiĝis) kaj postsekvis la piedsignojn, kiuj videblis jen kaj jen en la neĝo. Fine post ½ mejlo ni trovis lin, kiu migris hieraŭ, tiel ke mi povis ripozi.

[...]

Rhenones [la boacoj] estis nekalkuleblaj kiel arbaro, estas pelataj hejmen matene kaj vespere por esti melkataj. [...]

Mi miris, kiel la melkantoj povas scii, kiujn ili jam melkis kaj kiujn ne, kaj kiel oni povas rekoni ilin. Ĉar tuj melkinte, oni lasis ilin. *Resp.* Ĉiuj boacoj havas siajn difinitajn nomojn, kiujn oni konas tute distinge, kio ŝajnis al mi strange, ĉar la figuro estas *eadem, color similis, qui singulo mense variat, variat magnitudo pro aetate* [sama, la koloro simila, varia monaton post monato, la grandeco varias laŭ la aĝo], kaj koni tian pelmelon, kiel formikojn en formikejo, estis al mi tute strange.

10-an. Ĉi tie mi rigardis la *summa tranqvilitas* [plej grandan trankvilon], kiun posedis la popolo. Post kiam oni melkis kaj la edzino faris siajn fromaĝojn, boligis la selakton ĝis densiĝo, oni manĝis kaj kuŝiĝis por

dormi aŭ ripozi; *crede mihi, qvi bene latuit, bene vixit, raro ulla contentio* [kredu min, kiu bone kaŝiĝas, bone vivas⁶, malofte ia disputo]. La vilaĝaj najbaroj lokis siajn tendojn kune en vico, de oriento al okcidento, aŭ *alio modo* [alimaniere].


Kiam alvenis mia servisto, li klinis sian nazon al la nazo de l' alia, kiun li volis saluti, kvazaŭ por kisi, kun la malnova esprimo de sano "Purist". Mi demandis, ĉu li kisis, *Rp.* ke ne, sed nur almetis la nazon, kio aplikiĝas sole inter parencoj.

Unu knabo iris kolekti plenkaldronon da *foliis acetosae majoris, cum petiolis sive caulibus* [folioj de okzalo, kun petioloj aŭ tigoj], kiujn oni metis en la kaldronon, verŝis iom da akvo sur la fundon, kirlis, kovris dumlonge ĝis ĉio solviĝis, poste oni miksis kun lakto en grandaj bareloj, kio post kelka tempo ekhavis agrablan acidecan guston tute alian ol kiam ĝi estas freŝa, kaj la barelojn oni poste metis en terajn kavojn, masonitajn por tio aŭ alie fositajn, ĉirkaŭ kion oni metas betuŝelon, por ke musoj ne manĝu ĝin.

Alia venis kun brakpleno da *caulis Angelicae* [tigoj de angeliko], kies floroj ankoraŭ ne malfermiĝis. Oni detiris la foliojn kaj ties membranon per tranĉilo, kaj ĝi rompiĝis kiel ŝnuro, poste ĉiuj manĝis ĝin kiel pomon kun la plej granda delico, ankaŭ mi ricevis mian parton.

[...]

La infano kuŝis en sia leda lulilo, super la kapo estis leda ekrano, sed sube drapo, 2 *valvae sibi incumbentes* [klapoj kuŝantaj unu sur la alia], kiujn oni fermis per ŝnuro. Ĉirkaŭ la supra parto de l' infano kuŝis boac-feloj, sed la ŝultroj, brusto kaj kapo nudaj. Tiel ĝi kuŝis en la malvarma tendo dumnokte kaj en la malvarma vento subĉiele nenion dirante, tamen ĝi ne malvarmis.



6 citaĵo el 'Tristia' de Ovidio

[...]

Dumnokte oni ĉiam metis min inter 2 boac-felojn.

La virinoj fumis tabakon same kiel la viroj, jes, ankaŭ plej ofte surhavis pantalonon.

Ĉi tie la viroj ordinare kuiras, la virinoj faras nur fromaĝon kaj okupiĝas pri laktaĵoj, sed ĉiujn fiŝaĵojn kaj viandon la viro; kaj se la edzino ne ĉeestas ankaŭ la laktaĵojn kaj fromaĝon.

11-an. Frumatene ni ellitiĝis, baldaŭ (post $\frac{1}{4}$ mejlo) ni venis sur la altan glacimonton, kiu estis sufiĉe alta monto, tute kovrita de ĉiama neĝo. Mi vidis ke la neĝo estas tute malmola, kvazaŭ frostigita; ni marŝis parte sur la krusto, parte suben tra l' krusto, egale kiel se ni paŝus sur sablo. Jen kaj jen estis riveroj fluantaj sub ĝi, kelkloke ĝi estis rompita, tiel ke videblis *strata supra strata* [tavolo sur tavolo], sufiĉe multaj. Ĉi tie la riveroj komencis flui okcidenten, signante ke ni jam estas en la norvega Laponio. La dolĉa verda tero, kiu antaŭe alternis kun la neĝo, ne plu videblis, la dolĉaj floroj ne aperis ĉi tie, sed la tuta areo estis kovrita de blanka neĝo. La malvarma vento el oriento pelis nin rapide kaj devigis nin gardi la manojn kontraŭ frosto kaj surmeti duan palton. Ni iris ĉe l' norda flanko de l' montoj, la vento pelis nin, tiel ke ni ofte renversiĝis kaj falis longan distancon malsupren sur la deklivo. Unufoje mi falis la distancon de fusilpafo, kaj tiam ne multe mankis ke mi trafus la randon kaj finus la komedion, tiel forta estis la vento. La pluvo, kiu falis sur la flankoj, ĉi tie estis glacikaĉo, kiu fiksiĝis kiel glacia krusto sur la ŝuoj kaj la dorso. Se ni havus tiun venton kontraŭ ni, ni neniam eltenus tiel longan kaj penan vojon. Post kiam ni do preterpasis 3 aŭ 4 mejlojn, ekvidiĝis la montaj tamen sterilaj rokoj. Finfine inter la rokoj la okcidenta maro. *Antea habuimus perpetuum ver, nunc hyems perpetua, deinde aestas perpetua* [antaŭe ni havis ĉiaman printempon, nun ĉiaman vintron, poste ĉiaman someron].

[...]

Kiam ni finfine venis malsupren, kian plezuron mi ricevis por mia laca korpo! Tiam mi venis el malvarma kaj frosta monto, malsupren en varman kaj bolantan valon (mi sidiĝis por manĝi fragetojn), anstataŭ neĝo kaj glacio mi vidis verdajn herbojn en ties plej dolĉa florado (tiel altan herbon mi neniam vidis aliloke), anstataŭ forta vento riĉan odoron de *Trifolio florente* [floranta trifolio] kaj aliaj herboj. *O formosissima aestas!* [ho, plej bela somero].

[...]

En Laponio mi vidis neniujn muŝojn, sed tuj kiam mi venis en Norvegon, ili superfluis en la domoj. Tamen la sufiĉe multaj kuloj tute malaperis.

[...]

La altvalora akvo klara kaj bongusta ĉiam dependas de l' neĝo. Ĉar la neĝo konservas la akvon, kiel salo viandon. Oni vidas ke akvo, ju pli ĝi staras en varmo, des pli ĝi malfreŝiĝas, kaj *vice versa* [inverse] en malvarmo. Ĉi tio konservas la sameojn same bone kiel eĉ la plej delica vino. Mi vidis ke oni nun en Stokholmo komencas trinki akvon laŭ la maniero de portugaloj, sed estas diferenco kaj pri l' akvo kaj pri l' varmo. Krome ĝi gustas ekstreme delice. Kiam mi navigis en Norvegio, mi rigardis kun plezuro mian sameon, kiu servis min, ke tuj varmiĝante, li prenis per ĉerpilo akvon el la maro kaj intencis trinki en sia antaŭe kutima maniero, sed ricevis salan akvon anstataŭ dolĉa. La sameoj ĉiam kunportas grandan ĉerpilon, per kiu ili, tuj kiam ili iĝas sekaj kaj varmegaj, trinkas akvon por refreŝigi sin sen timo pri malsaniĝo. Ankaŭ mi faris tiel. Se mankus ĉi tiu mirinda akvo, neniu povus vojaĝi ĉi tie, eĉ preskaŭ neniu loĝi, ĉar Bakĥo kaj Ceres ambaŭ estas nekonataj ĉi tie, *non tamen friget Venus* [tamen Venuso ne frostas]. El monta akvo originas ankaŭ la plej multaj riveroj kaj fontoj, ĉar kiam estas varme en la montaro, la riveroj fluas duoble, jes, 3-oble pli grandaj.

[...]

La 16-an ni transiris la glacimonton. Veninte kelkan distancon supren, ni ekvidis densan nubon el nordoriento. Ni vidis ĝin kaj supre kaj sube, finfine ĝi atingis nin kiel densa nebulo kaj igis ĉiujn niajn vestaĵojn humidaj, sed la harojn, *qvod notabile* [kio notindas], tute malsekaj, jes, ĝi tiel rabis de ni la horizonton ke ni vidis nek sunon nek lunon, nek la ĉirkaŭajn montpintojn. Ni nun ne sciis kien turni nin, timante trafi unuflanke la randon kaj kiel unu sameo antaŭ kelkaj jaroj tie sammaniere fini nian komedion trans la fluo, kiu tranĉis tra l' neĝo tiel profunden, ke oni povis kapturniĝi rigardante suben. Ni vidis ne 2 ulnojn antaŭ ni. Ni tiam estis kiel mallerta maristo, metita en la sovaĝan maron, kie li vidas neniun teron kaj ĉiuflanke devas timi ŝtonrokojn, nek havas kompason. Eĉ la sameoj tiam ŝajnas havi plej severan luktadon, kiam ili trafas en similan situacion. Sed bonŝance ni, kiuj ne havis gvidiston, trovis piedsignojn de boacoj, kiujn iu antaŭe uzis por porti aferojn al Norvegio, kio montris al ni la vojon.

[...]

17-an. Nokte ni transiris la lagon Virijaur, kiam estis malvarme kaj falis malvarma nebulo; matene alvenis al la komisaro Kock, kie mi miris ke la homoj kun nigraj vizaĝoj havas neĝe blankajn korpojn, kiuj ege superas ĉiujn virinojn.

Ĉi tie mi ankaŭ povis vidi la lemingojn, *Lummick* samee, kies *corpus* [korpo] estas *griseum, facies nigra, humeri nigri et regio epilumbaris nigricans, cauda et aures brevissimae, edit* [griza, vizaĝo nigra, ŝultroj nigraj kaj lumba regiono nigreca, vosto kaj oreloj mallongegaj, manĝas] herbon kaj kladonion, *non editur* [ne estas manĝataj], vivas precipe en la montaro; iujare 1000-oj venas malsupren en la arbaran landon, iras rekte antaŭen sur lago, marĉo kaj kotejo, *hinc multi* [sekve multaj] mortas, ne estas tre timemaj, sed en siaj truoj bojas al preterpasantoj kiel hundo. *Pullos* [idojn] 5 ĝis 6; fosas truojn en la tero, $\frac{1}{2}$ kvaron-ulnon.

La sameoj ĉiam sidas kun la kruroj aŭ kruce ĉe l' postaĵo aŭ kun unu fleksita kaj unu rekta.

18-an. [...] Irante sur la montoj, ni soifis, la akvo gustis je tero, kvankam kuŝis sufiĉe da neĝo kaj glacio, el kiu ĝi fluis. La sameo per tranĉilo dehakis glacion, kaj suĉis el la glacio akvon, kiu bongustis, kaj mi kaj li bone trinkis. Li diris ke ĝi utilas al la brusto. *Aqua enim pura nil nocet, si moderato sumitur, licet frigida potatur, didici a lappis et experientia* [ĉar pura akvo ne malutilas, se modere prenata, eblas trinki ĝin malvarma, mi tion lernis de sameoj kaj sperto].

Mi volis havi linajn vestaĵojn lavitaj, kion oni ne komprenis pli ol bovino muskaton. Ĉar iliaj vestaĵoj estas neniam el peco da lano, ĉar estante *Sarcophagi* [viandmanĝantoj], ili estas ankaŭ el bestoj vestataj, ĉu per felo, ĉu per drapo, kiun ili aĉetas.

Vintre ili paŝas per sameaj botoj, kiuj atingas ĝis meze de l' femuroj, havante neniun ŝtrumpon, sed sube ĉe l' piedo ŝu-herbojn. Ĉirkaŭ la korpo unue jako el drapo, poste pelto kun la haroj internen sed somere eksteren, la botoj de l' virinoj ne superas la genuon.

[...]

23-an. Vespere forlasis la montaran regionon, celante de l' altforno malsupren reen al Lule laŭ akvovojo. [...]

Ĉi-nokte mi unuafoje vidis stelon; antaŭe neniu videblis al mi, post kiam mi venis sub solsticon, tamen ne estis pli mallume, ol ke mi povis skribi kion mi volis. [...]

Je l' sunsubiro ni atingis al Purkijaur, kie estis neniu boato, do ni devis fari floson. La nokto iĝis tute malluma pro nebulo, tiel ke ni ne povis vidi

3 klaftojn antaŭ ni. Fine ni venis mezen de l' fluo, kiu preskaŭ pelis nin kaj la trunkojn disen. Fine el la vivdanĝero ni venis al la bieno, kiu situis sur insulo, naviginte duonon de mejlo en tia maniero. [...]

27-an. Botnianoj kaj setlantoj kutimas kontraŭ la kuloj ŝmiri sin per gudro kaj fiŝgraso aŭ alia graso, meti tion en kornon kaj porti ĝin ĉe l' flanko, sed pri tio la sameo ne zorgas. [...]

1 aŭg. Intencis vojaĝi al Tornio, se ne granda pluvo kaj timiga fulmo-tondro kun knalo kaj krako, fajro kaj fulmo, tute enfermus min. [...]

Alvenis vespere al Töreå. La vetero estis belega. [...]

3-an. Kiam mi forlasis Sangis, mi forlasis ankaŭ mian gepatran lingvon; en Seivis estis puraj finnoj, kiujn mi ne komprenis. [...]

6-an. [...] La finnaj knabinoj havas grandajn mamojn, la laponinoj malgrandajn *et qvales cruda servat puella marito* [kaj kiajn la knabino prezentas freŝaj al la fianĉo].

OSTROBOTHNIA [Orienta Botnio]

12 septembro. [...] La popolo, kiu lastjare suferis pro malbonega rikolto, tranĉas la paniklon kaj la plej superan parton de l' pajlo en kiel eble plej subtilan hakaĵon, muelas kaj bakas panon el tio; aliaj bakas pinan ŝelon. [...]

17-an. La kamparanoj iras en senkamentubaj dometoj, la fumo plenigas al ili la okulojn, je kio iliaj okuloj larmas, tamen ili pli domaĝas la varmon ol la okulojn. [...]

30-an. Alvenis vespere al la urbo Åbo (Turku), kiu estas same granda kiel Örebro, bone konstruita, ofte ruinigita de l' malamikoj, ofte brulinta, kio ne povus okazi alie ol pro l' senkamentubaj fundometoj. [...]

8 oktobro. Transiris la Alandan⁷ maron.

[...]

10-an. Feliĉe alvenis ĉe-aŭ la 1-a horo tage al Upsalo.

7 Alando = insularo inter Svedio kaj Finnlando

Nigrino¹

de Lukiano
(el la latina tradukis Gerrit Berveling)

103

Lukiano al Nigrino: bondezire!

Diras la proverbo *strigojn al Ateno*,² ĉar se iu volus porti tien strigojn, estus io ridinda: tie oni ja havas jam multe da strigoj. Se nun do mi ŝatus montri mian elokventon kaj tiucele verkus libron por sendi al Nigrino, mi same povus ridindigi min, kiel vera importante de strigoj. Sed mi nur volas montri al vi mian menson, kiel nun mi statas, kaj kiel forte min trafis viaj paroloj; tial oni probable pardonus al mi pri la kulpigo de Tucidido, ke sencio faras la homojn trokuraĝaj, sed rezonado zorgemaj, ĉar estas klare, ke ne nur sencio estas kialo de ĉi tiu mia trokuraĝo, sed minimume ankaŭ mia emo al paroloj!

Fartu bone!

La Saĝeco de Nigrino

1 Amiko: Kiel plej impresa kaj digna vi estas depost via reveno! Vi ne plu degnas rekoni nin, se ni renkontiĝas en homamaso: vi ne plu partoprenas nian konversacion, sed subite vi ŝanĝiĝis kaj kondutas komplete superece. Volonte mi aŭdus de vi, kial vi agas tiel fremde: kio estas la kialo?

Lukiano. Ho bona amiko, kio estus, se ne bonŝanco?

Amiko: Kion vi celas?

Lukiano: El mia vojaĝo mi revenas tute ŝanĝita: feliĉa kaj benata persono – por uzi teatrecan esprimon: trioble feliĉa.

Amiko: Ho Heraklo! En tiel ete da tempo?

1 Historie nenio certas pri tiu ĉi filozofo Nigrino en Romo. Foje oni sugestis, ke efektive temus pri certa Albino.

2 Cito el la teatraĵo Birdoj de Aristofano (verso 30l).



Lukiano: Certe.

Amiko: Kaj krome? Kial tiel gravece vi kondukas? Iom pli kontentigu nin: havigu al ni iom pli da detaloj, lasu nin aŭdi la tutan historion.

Lukiano: Je Zeŭso, ĉu vi ne trovas mirakla, ke iam sklavo, nun mi liberas, iam povra, nun mi riĉas; iam sensciulo kaj konfuzita, nun mi ja estas mense sana?

2 Amiko: Jes estas miraklo! Sed mi ne jam komprenas, kion vi volas diri.

Lukiano: Nu, mi ekiris rekte al Romo, ĉar mi volis vidi okulkuraciston. Mi ja ekhavis pli kaj pli da problemoj pri la okuloj.

Amiko: Tion mi scias detale kaj mi esperis ke baldaŭ iun vi trovos.

Lukiano: Nu, ĉar mi decidis respekte saluti Nigrinon, la Platonan filozofon, kion longe mi ne plu faris, mi do tre frumatene leviĝis, kaj kiam mi alvenis kaj frapis je lia pordo, sklavo anoncis min, kaj mi estis invitita

eniri. Enirante mi trafis lin kun libro en la manoj kaj ĉirkaŭe estis portretoj de praaj filozofoj. Antaŭ li kuŝis skribtableto kun sur ĝi geografiaj desegnoj, kaj globo el kano, farita, mi kredas, por prezenti la tutan universon. **3** Li tre amike salutis min, kaj demandis, kiel mi fartas. Mi ĉion rakontis al li, kaj kompreneble miaflanke mi demandis, kiel li fartas, kaj ĉu li jam decidis denove vojaĝi al Greklando.

Sed li klarigis ĉion dekomence, tiel detale, amiko, ke sufiĉe da ambrozia parolado li verŝis sur mi por forgesigi pri la famaj Sirenoj³ (se tiuj iam efektive ekzistis) kaj la najtingaloj⁴ aŭ la lotuso de Homero⁵: vere mirinda viro! **4** Li pluiris al laŭdado de la filozofio kaj la libereco, kiun ĝi prezentas, kaj al mokado de ĉiuj aferoj, kiuj estas ĝenerale konsiderataj kiel benoj – riĉo, famo, potenco kaj honoro, krom tio ankaŭ oro kaj purpuro –, kiujn la plimulto kredas dezirindaj, kaj ĝis tiam same kredis mi. Ĉion ĉi avide mi ensuĉis, mense tute malferma, kaj en tiu momento mi ne povis imagi, ke tiel povis okazi al mi; tute konfuzita mi estis. Unue mi sentis ĉagrenon, ĉar tion mi kritikis, kio estu kara al mi – riĉon kaj monon kaj famon –, kaj mi preskaŭ ploris pro ilia kolapso; kaj tiam ilin mi prenis por malindaj aŭ ridindaj, kaj ĝojis rigardi supren, tiel dire, el la mucida atmosfero de mia antaŭa vivo al helbrila ĉielo kun granda lumo. Sekve mi

3 Odiseado 12,39; 167.

4 Odiseado 19,518.

5 Odiseado 9,94.



Spekulativa portreto de Lukiano en gravuraĵo de William Faithorne el la 17a jarcento. – Fonto: *Wikipedia*

serioze forgesis mian okulon kaj ĝiajn malsanojn – ĉu vi ne kredus tion? – kaj iom post iom mi fariĝis pli klarvida en mia animo: ĉion mi ekvidis, kion tute senkonscie mi estis ĉirkaŭ-portinta ĝis tiam tute blinda. **5** Mi iris plu kaj plu kaj tiel atingis la staton, kiun ĵus vi riproĉis al mi: kion Nigrino diris al mi, tio faris min fiera kaj unuvorte mi ne plu atentis pri detaloj. Mi supozas, ke similan sperton mi havis pri filozofio, kiun laŭdire havis la Hindoj pri vino, kiam unuafoje ili ĝin gustumis. Ĉar denature ili estas pli varmsangaj ol ni, do, ricevinte tiel fortan drinkaĵon ili tuj fariĝis violentaj, kaj per la senakva drinkaĵo⁶ ili fariĝis duoble pli perfortemaj ol aliaj homoj. Jen do! Mi ĉirkaŭiras ebria de la vino de liaj paroloj.

6 Amiko: Ho! Tio ne estas ebrio, tio estas sobreco, malebrio! Volonte mi aŭdus ĝuste kion tiu Nigrino diris, se eblas. Longe, ja longe for estas de pravo, miaopinie, esti avara pri tiu eldiro, precipe, se la koncernato, kiu volas aŭdi ĝin, estas amiko kaj havas similajn interesojn.

Lukiano: Kuraĝon, amiko! Vi pelas ĉevalon obean, kiel tion nomas Homero⁷. Mi ja ĵus estis atestonta al la mondo, ke mia frenezo havas kialon. Samtempe mi kun plezuro povas diri, ke fariĝas kutimo al mi ripeti liajn samajn dirojn du- aŭ trifoje tage, eĉ se neniu ĉeestas por aŭdi ilin. **7** Amanto, al kiu mankas la ĉeesto de la amata knabo, rememoras liajn dirojn, liajn farojn, daŭre reiras al tiuj kaj dum horoj li forpelas la tempon per lia imagata ĉeesto. Kelkfoje li imagas, ke li estas vizaĝo kontraŭ vizaĝo kun li; paroloj, kiujn antaŭ longe li aŭdis, ree venas de liaj lipoj; li ĝojas; lia animo ĝojas pri la rememorado pri pasinto kaj ne havas la tempon por la problemoj reale ĉeestantaj. Filozofio estas longe for, sed mi aŭdis diron de filozofo. Mi ĉion kombinas kaj kaŝas en mia koro, kaj tio konsolas min. Nigrino estas la gvidmarkilo, meze de la oceano, en la nigreco de la nokto, sur kiun mi fiksas mian rigardon; ĉe ĉio, kion mi faras, mi imagas lin ĉeesta; daŭre liajn dirojn mi aŭdas. Kelkfoje, ĉe granda koncentriĝo, mi vidas lian vizaĝon, mi aŭdas lian voĉon en miaj oreloj. Pri li prave oni povus diri, kiel oni diras pri Periklo⁸: Pikilon li postlasis en ĉies koro.

8 Amiko: Haltu, ho entuziasmulo! Bone spiru, kaj nove komencu: mi volas aŭdi de vi, kion diris Nigrino. Vi nur iritas min.

Lukiano: Vi pravas, mi devas komenci, kiel vi diras. Kaj tamen...
Diru al mi, ĉu neniam tragedion vi spektis (pri komedioj ne statas pli

6 En la klasika epoko kutime vinon oni trinkis nur miksitaj kun akvo.

7 Iliado 8, 293.

8 Eŭpolo, Demoj F 102.5.

bone), kiu estis murdita de aĉa aktorado, dum la aktoroj fine estis forpelitaj de la scenejo pro ilia penado? La teatraĵo mem povas samtempe esti perfekte bona, kaj ofte atingis mirindan sukceson.

Amiko: Jes, tion mi konas, sed kion vi volas diri?

Lukiano: Mi timas, ke antaŭ ol kun vi mi pretos, vi opinios, ke mi malbone faris same kiel ili – ĥaose intermiksante aferojn, foje tute fuŝante per nekonvena lingvaĵo; ke fine vi malbenos la teatraĵon anstataŭ la ludanton. Mian propran honton mi akceptus, sed ĝenus min, se per mia falo ankaŭ mia temo suferus; miaj mankoj ja ne nocu al ĝi! Bone do memortenu: kiom ajn malperfekta estas mia **9** parolado, pro ĝi la aŭtoron oni ne kulpigu; li ja sidas longe for de la scenejo, kaj tute nenion scias pri kio tie okazas. Nur la memoron de la aktoro vi kritiku; mi estas nenio pli aŭ malpli ol la “mesaĝisto” en la tragedio. Ĉe ĉiu eraro en la teatraĵo tio estu via unua penso, ke la aŭtoro probable diris ion tute alian kaj pli trafan; – kaj poste laŭplaĉe vi forpelu min.

10 Amiko: Je Hermeso! Tio estas profesia enkonduko! Vi intencas aldoni, mi supozas, ke via interparolo kun la kliento estis nur mallonga, ke vi venis nepreparita, kaj ke prefere ni aŭdu lin mem rakonti, ĉar vi ja ne povis enmense kunporti ĉion. Ĉu ne ĝuste tion vi estis dironta? Nu, tio ne plu necesas, kiom min koncernas. Ĉiujn ĉi enkondukojn vi konsideru pretaj. Mi staras jen por aplaŭdi: sed se vi lasas min atendi, mi gardos rankoron dum la tuta afero, kaj laŭe prifajfos vin.

11 Lukiano: Efektive, mi volonte estus uzinta ĉiujn argumentojn, kiujn vi menciis, kaj aliajn krom tio ... Mi dirus, ke mi ne havas preparitan oratoraĵon, ĉar tio superas miajn kapablojn; ĉar tiam mi imitus la aktorojn menciitajn. Daŭre, kiam ili ekludas la rolon de Agamemnono aŭ Kreono, aŭ eĉ de Heraklo mem, vestitaj en oraj vestaĵoj, kun fiera rigardo kaj gapanta buŝo, ili parolas en voĉo tiel mizera, eta, ineca, kaj gigante tro mizera por Hekuba aŭ Poliksena. Tial, por ne esti mokata kiel ili, ke maskon mi portas tro grandan por mia kapo aŭ ke mian kostumon mi malhonoras, al vi mi volas paroli kun mia vera aspekto, tiel ke la heroo, kies parton mi ludas, ne devas honti kiam mi stumblas.

12 Amiko: Ĉu tiu viro neniam ĉesos paroli pri maskoj kaj teatro?

Lukiano: Mi haltos. Nun do ek al la temo: Nigrino komencis sian paroladon per laŭdado de Greklando kaj precipe de la Atenanoj, ĉar filozofio kaj malriĉo estas iliaj preferatoj, kaj ili neniun rigardas kun plezuro, kiu strebus enkonduki en ilian mezon luksemon, sed se iam ajn iu ajn

venas al ili kun tia spirita intenco, iom post iom tiun homon ili korektas kaj helpas eduki lin aŭ konverti lin al plej simpla vivstilo.

13 Ekzemple, li menciis pri riĉegulo, kiu venis en Atenon kun la vulgara brilo de sekvantaro kaj oro kaj mirindaj vestaĵoj, supozante, ke ĉies okuloj turniĝos al li pro envio pri lia sorto; sed male, ili sincere kompatis lian sorton de povra vermo kaj ekkaptis lian edukadon. Neniu malbona diro, neniu provo rekte interveni: “estas libera urbo; ĉiu vivadu tie laŭ propra prefero.” Sed kiam el si mem li faris publikan ĝenaĵon en la banejoj aŭ en la gimnazio⁹, plenigante ĝin per sia sekvantaro kaj postulante por si la tutan spacon, tuj iu ekflustris, ŝajne flanke, kvazaŭ la vortoj ne devus atingi liajn orelojn: Li timas, ke neniam viva li elvenos de ĉi tie; sed ĉio ja estas pace; neniam bezono pri tia armeo! Tiu rimarko certe estus perceptita, kaj havus sian edukan rezulton. Baldaŭ oni kvietigis lin en lia purpura brodaĵo, per ludema aludo al floroj kaj koloroj. “La printempo ĉi-jare estas frua” – “Ho tiu pavo, kiel ĝi trafis ĉi tien?” – “Mia patrino devas esti luiginta al ĝi la kovrotukon”, – kaj tiel plu. Same pri la cetero, la ringoj, la ellaborita frizaĵo kaj tiel plu. Iom post iom li renormaliĝis, kaj Atenon li forlasis multe profitinta de la publika eduko, kiun li ricevis.

Eĉ sian malriĉon ili ne hontas konfesi; li menciis **14** frazon, kiun li aŭdis unuanime eldirita de la publiko ĉe la Ĉiuatenajaj Festoj: iu civitano estis arestita kaj oni akuzis lin, ĉar li estas vestita en kolorriĉaj vestaĵoj. La publiko flankis je li kaj defendis lin; kaj kiam la heroldo deklaris, ke la leĝon li malobeis estante ĉe la festivalo en tia vestaĵo, ili ĉiuj unuvoĉe ekkriis, kvazaŭ ili interkonsultiĝis, “ke oni pardonu al li pri la portado de tiuj vestaĵoj, ĉar aliajn li ne posedis.”

Nu, ĉion ĉi li laŭdis, kaj ankaŭ la Atenan senpretendan vivstilon, la kvieton kaj la scienculan liberecon, kiujn tiel abunde ili ĝuas. Loĝi inter tiaj homoj, li deklaris, estas vivi en filozofio; kaj tio povas teni la karakteron pura; tiel ke serioza viro, kiu lernis malŝati riĉecon kaj elekti, ke li vivadu kiel estas en si mem bone, tia viro trovos Atenon komplete taŭga por si. **15** Sed viro, kiu amas riĉon kaj kiun sorĉas oro, kaj kiu mezuras feliĉon laŭ purpuro aŭ potenco, kiu ne gustumis liberecon nek spertis liberecon de parolado aŭ atentis la veron, kies daŭraj akompanantoj estas glimo aŭ flatado aŭ sklaveca submetiĝo; viro, kiu senhezite submetis sian animon al ĝuado kaj nur al ĝi pretas servadi, ĝuante pri troigitaj aferoj, daŭre vin-avida aŭ diboĉema, plena je trompemo, mensogo aŭ simile; viro, kiu volas aŭdi muzikadon, flutojn aŭ malvirecan kantadon –

9 Sportejoj.

“tiuj homoj”, li diras, “vivu en Romo, ĉar ĉiu strato kaj ĉiu placo tie estas plenaj **16** je tiaj aferoj, kaj ĝuon ĉiupaŝe tie oni trovas per ĉiuj aperturoj – okule, orele kaj naze, eĉ gorgo aŭ seksume: ankaŭ pri Afrodita ne estas forgesate. Daŭre leviĝas la aĉa fluo tra la stratoj; avaro, perfido, adulto, – ĉiuj malvirtoj troveblas. La animon tio senigas de sinrespekto, virto aŭ justeco; kaj tiam la grundo, kiun ili postlasis kiel dezerton, suferantan je soifo, elkreskigas branĉon, kiu kreskas plezure.

Tia estis Romo, li diras: tiajn ĝuojn Ĝi instruis. **17** Sed mi, li diras, kiam el Greklando mi revenis, kiam mi proksimiĝis al Romo, mi haltis kaj petis min mem, kial tien mi venis, ripetante la faman diron de Homero¹⁰ “Kial, mizerulo, la sunlumon vi ja forlasis?” – Greklandon mi volas diri, kaj tutan ĝian feliĉon kaj liberecon – “por spekti ĉi tie la gigantan kirliĝon – la trompistojn, la arogantajn salutadojn, la frandadojn, la flatadon, la murdojn, la ĉasadon pri heredaĵoj, la ŝajnigadojn, la pseŭdamikecojn? Kaj kion ĉi tie vi faros? Vi ja ne povas eskapi, nek agi same kiel la Romanoj!” Tiel rezonante **18** mi retiriĝis el pafdistanco, kiel faris Zeŭso ĉe Homero pri Hektoro¹¹, for de buĉado, sango aŭ batalmulto; kaj estonte mi decidis resti hejme, elektante vivstilon, kiun multaj opinias ineca kaj sensenca, sed mi konversacias kun Platono, Filozofio kaj Vero, kaj sidas kvazaŭ en teatro plena je nekalkuleblaj miloj, mi spektas, kio estas ludata, kio foje prezentas al mi amuziĝon kaj ridadon, sed foje ĝi pruvas viran stabilecon.

19 Vere (se mi rajtas laŭdi, kio estas malbona) ne kredu, ke ekzistas lernejo pli bona por la virto aŭ pli bona testo por la animo ol vivado en tiu urbo Romo kaj la tiea vivo; ne estas facile, rezisti al tiom da logaĵoj, al tiom da spektajoj kaj sonoj, kiuj tiras onin en ĉiun direkton. Oni simple imitu Odiseon kaj velu preter ĝin; sed ne kun ligitaj brakoj (tio estus malkuraĝe), sed kun oreloj malfermaj kaj kapo neligita, kaj kun spirito de sincera malŝatado. **20** Krom tio sinceran admiron oni ekhavu pri la filozofo, kiu rigardas tiom da stulteco kaj malŝatas la donacojn de fortuna, vidante la teatron de la vivo aktiva kun ĉiuj ĝiaj roloj, en kiu iu homo unue envenas kiel servisto, poste kiel mastro; alia unue kiel riĉulo, poste kiel senhavulo; ree alia jen almuzule, jen kiel satrapo aŭ reĝo; jen kiel amiko de kiu ajn, jen kiel kontraŭulo, jen en ekzilo. Kaj plej mirige estas, ke kvankam Fortuno diras, ke ĝi faras lumon pri la homaj aferoj kaj koncedas, ke ne estas stabileco, kaj malgraŭ la fakto, ke la homoj tion ĉiutage vidas pruvita, ili tamen daŭre strebas al riĉo kaj potenco, kaj ĉiu el ili rondiradas plena je nerealigitaj esperoj.

¹⁰ Odiseado II,93.

¹¹ Iliado II,163.

21 Sed mi diris, ke ankaŭ estis amuzo en la okazaĵo; tion mi klarigu. Unue, ĉu la riĉuloj ne estas ridindaj? Ili pompe montras siajn purpurajn vestaĵojn kaj ringojn kaj senmezuran mankon je bongusto. Ĉu eblas kredi? Ili uzas aliulajn voĉojn¹² por saluti homojn, supozante ke oni estos dankema pro nura rigardo, dum aliaj pli gloraj ol la ceteraj, eĉ postulas esti obeataj: ne dediste, tamen, aŭ laŭ Persa stilo. Ne, vi leviĝu, klinu la kapon, montru vian humilon kaj viajn sentojn, kisante bruston aŭ manojn de la koncernato, dum la homoj, kiuj ne havas tian privilegion, admire nur ĵaluzas! Kaj la koncernato staras tie dum horoj, sed unu punkton minimume mi laŭdas: ili retenas siajn lipojn!

22 Sed se tiaj homoj estas amuzaj, multe pli ridindaj estas tiuj, kiuj vizitas kaj flatas ilin. Ili leviĝas meznokte, vagas tra la urbo, akceptas, ke sklavoj fermas pordojn antaŭ ilia nazo, suferas esti nomataj hundo, flatulo aŭ simile. Kaj kion ili ricevas danke por tio? Manĝadon multe prikomentitan, sufiĉe vulgare, fonto de amaso da mizero. Kiom tie ili manĝas, kiom ili drinkas, kion ili ne deziras, kiom ili diras, kion prefere ili estu ne dirintaj! Fine ili iras for, aŭ koleraj kaj seniluziaj, grumblante pri la festeno aŭ kulpigante la gastiganton pri manko je respekto aŭ pri fieco. Flankstratojn ili plenigas, vomante aŭ batalante antaŭ la pordoj de bordeloj, kaj la plimulto iras litten je tagiĝo kaj donas kialon al kuracistoj por ilia rondirado. Sed ja ne ĉiuj; ĉar kelkaj efektive tempon ne trovas por esti malsanaj.

23 Mi miaparte prenas la flatemulojn por la plej ĝenaj, pli ol tiujn, al kiuj oni flatas, kaj nur ilin oni kulpigu. Kion oni ja atendu, post la laŭdado pri ilia riĉo, la panegiroj pri la mono, la daŭra atendado antaŭ iliaj pordoj, la sklavecaj salutadoj? Se pro komuna konsento eĉ nur mallongan tempon ili detenus sin de tia sklaveca konduto, ĉu vi ne kredas, ke ĉio renversiĝus, kaj ke la riĉaj venus al la pordoj de la malriĉaj por peti ilin, ne lasi tiun feliĉon senatenta kaj iliajn belajn domojn kaj mirindajn ejojn neglektataj? Ne la riĉon mem, sed esti enviataj, tion oni serĉas. Efektive, oro aŭ eburo aŭ belaj domegoj en si mem estas nenio, krom se iu ĝin admiras. Kion oni do faru, por malpliigi la tiranecon de la riĉaj? Konstrui fronte al ilia riĉo muron da malŝato! Sed kiel nun statas, sklavece oni submetas sin.

24 Ĉe simplaj homoj, kiuj ne konsideras sin alte edukitaj, tion oni ne kontraŭu; sed ke homoj, kiuj konsideras sin filozofoj, agu pli

¹² La t.n. *nomenclator* (nomdiranto) estis oficiala funkcio de servisto, kiu menciis al sia mastro la nomon de gastoj, sed ofte tia nomdiranto efektive anstataŭ sia mastro akceptis la gastojn.

ridinde – jen kio estas surpriza! Kiel vi kredas, ke spirite mi min sentas, se kunfilozofon mi vidas, specife se tiu estas jam iom aĝa, meze de amaso da fiuloj? Nur lia vestaĵo distingas lin kaj faras lin rimarkinda. Kio pleje min iritas, estas ke ili ne lasas vidi sian aspekton. Prenu, kiel ili kondukas ĉe la tablo **25** – per kiaj etikaj idealoj ni priskribu tion? Ĉu ili ne plenigas sin pli vulgare, trinkegas pli rimarkeble, forlasas la tablon pli malfrue ol ĉiuj ceteraj, forportante kun si hejmen pli da frandaĵoj ol kiu ajn alia? Kelkaj, iom pli subtilaj ol la ceteraj, eĉ komencas kanti.

Kaj ĉio ĉi, li pensis, estas ridinda; kaj speciale li menciis homojn, kiuj filozofion ludonas aŭ kiuj metas virton kiel varon ĉe sia montrofenestro, por tiel diri: efektive la prelegoĉambrojn de tiaj homoj li nomis vendejoj aŭ bazaroj. Ĉar se iu volas instrui malŝaton pri riĉo, unue li montru, ke mem li staras super gajno aŭ enspezo. **26** Certe tiujn principojn li kutime praktikis, ne nur instruante sen rekompenco al ĉiuj, kiuj nur emis je ĝi; daŭre povrulojn li subtenis, kaj grumblis pri troa riĉo. Tiom for li estis de deziro pri aliies riĉo, ke eĉ kiam lia propra posedaĵo komencis forvanni, li pri tio ne interesigis. Malgraŭ ke ne longe distance de la urbo iam farmejon li posedis, dumlonge li eĉ ne metis tien unu piedon. Eĉ plie, li diris, ke ĝi entute ne estas lia. Lia sinteno estis, mi supozas, ke ni ne estas “posedantoj” de kio ajn laŭ natura leĝo, sed ke por nedefinita tempo laŭ kutimo aŭ heredado ni transprenas la uzadon, kaj estas konsiderataj ĝiaj posedantoj por mallonga tempo; kaj kiam pasis la bonaj tagoj, kiujn ni ricevis, iu alia transprenas kaj ĝuas la aferon.

Same li ankaŭ havigas admirindan ekzemplon al tiuj, kiuj volas sekvi lian filozofion: la ŝparema vivado, la sistemaj kutimoj de korpaj ekzercoj, la modesta konduto, la simplaj vestoj, kaj super ĉio la afableco kaj plaĉa konduto. **27** Siajn sekvantojn li instigis ne prokrasti afablecon, kiel plej multaj homoj kutimas fari: ekzemple ili indiku al si limon de venonta festo aŭ simile, por ke ekde tiu dato ili ne plu mensogu; ĉar li opiniis, ke celado al pli bona vivo ne meritas prokrastiĝon.

Aliflanke li ne faris sekreton de sia kondamno de tiaj filozofoj, kiuj pensas ke estas ia virto, se siajn junulojn ili trejnas elteni “amason da penoj kaj mizero¹³”, plej ofte proponante fridajn banojn, kvankam kelkaj emis flageli ilin, kaj ree aliaj pli rafinitaj forskrapis la supraĵon de la haŭto per rando de tranĉilo. **28** Laŭ Nigrino tian senton kaj malmolecon prefere oni kreu en la animoj de la homoj, kaj kiu intencas doni la plej bonan edukon, tiu havu atenton pri spirito kaj korpo, pri aĝo kaj antaŭaj edukoj, kaj li ne metu la taskojn de la lernantoj super ilia kapablo. Multaj

13 Devas esti cito, sed de nekonata deveno.

(li diris) mortas pro sensenca penado, kaj unu personon mi trafis, kiu spertis la aĉaĵojn de tiu skolo, sed tuj kiam li aŭdis pri vera saĝo, li fuĝis al Nigrino, kaj klare li multe pli bone fartis.

29 Fine forlasante la filozofojn, li reiris al la cetera mondo, rakontis pri la ĥaoso en la urbo, la homamasoj, la teatroj, la vetkuroj, la statuoj pri la kondukistoj, la nomoj de la ĉevaloj, la babiladoj surstrate pri tiaj temoj. La frenezo pri la ĉevalkuroj vere estas grandega, kaj famekonataj homoj grandnombre eksuferis je ĝi.

30 Krom tio ankoraŭ alian homan komedion li tuŝis: homoj, kiuj okupiĝas pri vivo trans la tombo kaj testamentoj, aldonante, ke la idoj de Romo parolas nur unufoje en la vivo la veron (nome en la testamentoj¹⁴), por ke tie ili pluku la frukton de sia fidindeco. Mi ne povis reteni mian ridadon, kiam li diris, ke ili kredis necesa porti sian stultaĵon kun si en la tombon, kaj postlasi sian vanecon notita, kaj ke almenaŭ multaj postlasas instrukciojn plej detalajn, kelkaj eĉ ordonas, ke iliaj vestaĵoj kaj aliaj trezoroj estu kun ili bruligitaj, aliaj, ke iliaj tomboj estu gardataj de specialaj sklavo, aŭ iliaj monumentoj estu kronataj per floroj. Stultaj ili restas eĉ ĉe la morto. **31** Li supozis, ke eblas diveni, kion ili faris dum la vivo, se ili ordonis tiajn aferojn pri post la morto. Sed, li diris, ili aĉetas multekostajn florojn kaj lasas vinon libere flui ĉe manĝoj en lukso de safrano kaj spicoj; ili plenigas sin vintromeze per rozoj, ĝuante pri ties rareco kaj netrovebleco, malŝatante ĉion laŭnature kaj simplan pro la malkareco; mirhon ili trinkas. Kaj en tiu punkto li specife kritikis ilin, ke ili eĉ ne scias, kiel direkti siajn dezirojn, sed troigas en ili, ĉiudirekten fordonante sian animon al luksemo, kiel en tragedioj kaj komedioj oni diras “perforte trovante al si eliron¹⁵”. Solecisma plezuro tion li nomis.

32 En simila spirito estas komento, kiun Nigrino faris imitante diron de Momo¹⁶. Tiu ja Pozidonon atakis, ĉar al la virbovo la kornojn li ne metis antaŭ ties okuloj, do same li kritikis tiujn, kiuj sin kronas ĉe la bankedoj, ke la florkronojn ili ne metas al si je la ĝusta loko: “ĉar, li diris, se la odoron de rozoj kaj simile vi ŝatas, prefere sub viajn nazojn vi ilin metu, por plenplezure ĝui ilian odoron”.

33 Li ankaŭ priridis tiujn, kiuj faris tiel mirindan laboron pri sia manĝaĵo, dediĉante tiom da atento por certigi la variecon de la sukaj kaj

14 Bela ekzemplo estas Petronio, kiu en sia testamento donis sian opinion pri Nerono kaj faris lin sia heredanto.

15 Neniu cito konata.

16 Dio de la mokado.

la novaj specoj de kukoj. Li diris, ke per sia dediĉo al mallonga kaj nur portempa plezuro ili surprenas sur sin multe da penado. Efektive, li montris, ke ĉiun sian penadon ili prenas sur sin pro nura kvarfingro-larĝo, la profundo de la plej granda homa buŝo. Ĉar antaŭ ol manĝi ne estas ĝuo en kion oni aĉetis, kaj post la manĝado la sento de pleneco ne estas pli plaĉa pro la prezo de la manĝo; la plezuro spertata dummanĝade ja tiom valoras. Supozeble pro sia senedukeco, li diris, ili spertos plej grandajn plezurojn, ĉar la filozofio rekomencas tiujn, kiuj elektas penadon.

34 Li multe parolis pri la konduto en la Banejo, la amaso da sklavoj, kaj la fakto, ke kelkaj devas esti portataj de la sklavoj, preskaŭ kvaŝaŭ ili estus kadavroj survoje al la tombejo. Unu aferon li pleje montriĝis malami: unu vaste vastigitan kutimon en la Urbo kaj en la Banejoj: kelkaj el la sklavoj havas la taskon antaŭiri la mastrojn kaj ekkrii kaj averti, ke ili atentu siajn piedojn, kiam ili preterpasas iun altrangan aŭ malaltrangan personon, tiel memorigante ilin, mirige, ke ili estas irantaj! “Estas terure”, li kriis: “Tiuj viroj ne bezonas la manojn aŭ la buŝojn de aliaj por manĝi aŭ la orelojn de aliaj por aŭdi, sed ili bezonas la okulojn de aliaj por vidi, malgraŭ la sano de siaj propraj okuloj, kaj ili lasas al si doni indikojn taŭgajn nur por povraj blinduloj. Ho ve!” li diris: “tio efektive okazas tagmeze sur publikaj placoj, eĉ al urboregantoj!”

Tion li diris kaj multon simile. **35** Fine li silentis. Ĝis tiam mi aŭskultis konsternite, timante ke li haltos. Kiam li ĉesis, mi sentis min kiel siatempes la Feakoj¹⁷, ĉar tute sorĉite mi nur rigardis al li; poste, tute konfuzita kaj ŝvitanta, mi stumblis kaj blokiĝis parole, mia voĉo ne funkciis, mia lango rifuzis soni, mi ekkriis pro embaraso; ĉar la efekto, kiun li havis je mi, ne estis supraĵa aŭ hazarda. Mi estis vundita profunde kaj vitale, pafita plej akurate, ĝi tranĉis, se tiel mi rajtas diri, mian animon en du partoj; ĉar se ankaŭ mi nun rajtas ekuzi la lingvon de filozofo, **36** ŝajnas al mi, ke la animo de viro bontalenta similas je tre tenera celo. Multaj pafistoj, la sagujojn plenajn je vortoj de ĉiu speco kaj senco, pafas al ĝi dum sia vivo, sed ne ĉiurilate trafe. Kelkaj pafas al la kapo kaj flugigas la sagon pli for ol intencite; se la celon ili atingas, la sago tie ne fiksiĝas, se pro sia movo ĝi trairas kaj pluflugas, nur postlasante vundon en la animo. Aliaj, ree, atingas la malon; mem tro malfortaj, ilia arko ne sufiĉe streĉita, iliaj sagoj kutime eĉ ne atingas la celon, sed ofte falas duonvoje; kaj se ili atingas ĝin, ili nur trafas “kun ektuŝo de la haŭto¹⁸”, kaj ne faras profundan vundon, ĉar ili ne estis pafitaj kun granda forto. **37** Sed bona pafisto kiel

¹⁷ Odiseado II,333.

¹⁸ Iliado 17,599.

Nigrino unue tre atente ekzamenas, ĉu la celo estas ekstre mola, aŭ alikaze tro dura por la sago; ĉar ekzistas celoj, kiuj ne estas trapenetreblaj de sago. Tiuteme kontenta li trempas la sagon ne en la venenon de Skitio aŭ Kreto, sed en ian miksaĵon tute propran, kiu estas dolĉa laŭguste kaj plaĉa laŭefike; tiam senplie li pafas. La sago flugas kun bone taksita rapido, ekzakte duonigas la celon, kaj restas tie; kaj la veneno faras sian efikon ĉie. Same la homoj aŭdas liajn vortojn kun miksitaj ĝojo kaj ĉagreno; same okazis ankaŭ al mi, dum la drogo estis softa eniĝanta en mian animon. Tial mi alparolis lin kun diroj de Homero:

Celu; al kelkaj saviĝon vi donos¹⁹.

Ne ĉiu aŭskultanto de la Frigia fluto fariĝas freneza, sed nur tiuj, kiujn Cibela posedas, kaj kiuj pro tio konsciigis per la muziko. Simile kompreneble ne ĉiu aŭskultanto de filozofo estas trafita kaj vundita, sed nur tiuj, kiuj jam portis en sia animo sekretan parencecon kun la filozofio.

38 Amiko: Kiel bela, nobla, ja eĉ Dia estas via rakonto, kara amiko. Mi ne konsciis pri tio, sed certe vi estis plenplena de via ambrozio kaj de via lotuso! Sekve dum vi parolis, mi sentis iaspecan ŝanĝiĝon en la koro, kaj nun kiam vi haltis, mi eliĝis: se paroli en via maniero: mi estas vundita. Kaj ja ne mirinde! Ĉar homoj, kiujn mordis frenezaj hundoj, ne nur mem freneziĝas, sed en sia frenezo aliajn ili traktas kiel la hundoj ilin traktis, kaj same la aliaj fariĝas frenezaj. Io el la malsano kun la mordo transiras; la malsano obliĝas, kaj estas granda kresko je frenezeco.

Lukiano: Vian frenezon vi do koncedas, ĉu?


Amiko: Jes, certe; eĉ pli: mi petas vin elpensi kurac-metodon por ni ambaŭ.

Lukiano: Kion vi celas?

Amiko: Iri al la viro, kiu nin vundis, kaj peti lin sanigi nin ambaŭ²⁰!

¹⁹ Iliado 8,282.

²⁰ Telefon Aĥilo grave vundis per sia lanco. La Orakolo de Delfo sugestis al Telefo "kiu vin vundis, kuracos" – Telefo tion aplikis al si mem, kaj la rusto de la lanco de Aĥilo fine kuracis lin.



TRADUKITA POEZIO

Silente / Senparole¹

116

de Miquel Martí i Pol
(el la kataluna tradukis Abel Montagut / Antonio Valén / Jorge Camacho)

Silente

El mia solo aspra mi vin pensas.
Neniam vi ĉeestos plu kiam folios
la poploj kiujn ni rigardis en silento
de nia sojlo doma.

Tiom mi jam perdis
perdinte vin, ke restas nun apenaŭ
la spaco de mi mem por vin memori.

Sed la potenca vivo jen eksplodas
eĉ en ĉi tiu spaco plej malvasta.

Vi ne ĉeestas kaj la poploj ekfoliis;
la verdo disheroldas vivon kaj esperon,
mi vivas kaj, vivante, povas vin plu pensi,
kun mi kreskigi vin ĝis fine la silento
min glutos for, kiel ĝi glutis vin por ĉiam.

Trad. Abel Montagut

¹ Vd. ankaŭ la tradukon de la sama poemo fare de István Ertl sur p. 76.

Senparole

El mia aspra solo mi vin pensas.
Vi ne plu estos, kiam folioj aperos
sur la poploj, kiujn ni rigardis silente
de nia doma sojlo.

Tiom multe
perdiĝis kun vi, ke restas preskaŭ nur
la spaco de mi mem por vin memori.
Tamen la vivo eksplodas potence
eĉ en la nuna malvasta medio.
Vi ne plu estas, kaj novaj folioj aperis sur la poploj
en verdo diskrianta vivon kaj esperon,
kaj mi vivas, kaj vivante mi povas pensi vin
kaj igi vin kreski kun mi, ĝis fine la silento
englutos min, glutinte vin por ĉiam.

Trad. Antonio Valén

Senparole


El ĉi soleco aspra mi pensas vin.
Vi ne plu ĉeestos kiam eligos foliojn
la poploj kiujn ni rigardis silente
de nia domsojlo.
Tiom multe
al mi perdiĝis kun vi ke al mi apenaŭ restas
la spaco de mi mem por vin memori.
Sed la vivo, potenca, diskrevas
eĉ en sfero tiel ĉi malvasta.
Vi ne plu ĉeestas, kaj la poploj eligis foliojn;
verdo proklamas vivon kaj esperon,
kaj mi vivas, kaj vivante mi povas pensi vin
kaj igi vin kreski kun mi ĝis la silento
englutos min kiel ĝi englutis vin por ĉiam.

Trad. Jorge Camacho

Omaĝa soneto al Vjaso

118

de Paulino Dias
(el la portugala tradukis Suso Moinhos)



Paulino Dias.
Portreto el *No País do Súrria* (1935)

La portugallingva literaturo en Goo havis specifajn trajtojn, kiu apartigis ĝin de ali-teritoriaj koloniaj literaturoj de la portugala imperio – la aŭtoroj estis lokanoj kaj iliaj verkoj ne ĉiam sekvis la atendeblajn regulojn kaj modelojn. La barata kulturo estis revalorigita, kvankam prezentita kiel ekzotisma elemento. Laŭ la opinio de kelkaj kritikistoj, kiel Vimala Devi kaj Manuel de Seabra, tio evidentiĝis *rompon* de la goaj verkistoj: hinduismo, forlasita jarcentojn antaŭe, iĝis esenca fonto de ilia konsciĝo kaj personeco. Paulino Dias (1874-1919) estis la plej konata goa poeto de la t.n. hindaportugala literaturo. Katoliko, kuracisto, verva instruisto, art-amanto, li publikigis versaĵojn dise en pluraj revuoj,

kelkfoje sub la kaŝnomo Priti Das ('Amosklavo'), kaj redaktis la revuon *Revista da Índia*. Post lia morto omaĝ-komisiono arigis nepublikigitajn liajn poemojn kaj eldonis ilin libroforme: *No país do Súrria. Poemas inéditos* (*En la lando de Sŭrya*¹. Neeldonitaj poemoj, 1935).

1 **Sŭrya**: la Sundio, adorata en la Vedoj.

Omaĝa soneto al Vjaso¹

En sonĝo mia staris la himalaja pinto.
Ĝin batis vasta vento. Resonis glava fero,
trumpetoj, leonroroj, marondoj, metaltinto...
en lando Arjavarta², mirindoplana tero!

Mallumo! Jen la monto sin levas gvato-ture...
Sed iu tie batas martelon kaj ĉizilon
per forto nebarebla, senhaste, senmezure,
kaj vundas diserige masivan la profilon.

Do kriis mi skuite, glacie frostotrema:
Ho, kiu en teruro kaj timoj multenombraj
bruadas kaj distondras sur mont' obskure prema?

Lunarko el arĝento dekoris noktoplaton
kaj tiam sonis voĉo el tiuj grundoj ombraj:
jen Vjaso, kiu skulptas ĝis fin' Mahabharaton.

1 **Vjaso** (sanskrite Vyāsa): laŭ hinduaj tradicioj, aŭtoro de Mahabharato.

2 **Arjavarto** (Āryāvarta): en la klasika sanskrita literaturo, nomo kiun ricevas la nordo de la hinda subkontinento, nuntempe Pakistano kaj nordaj Barato kaj Bangladeŝo.

Rumanio

(pastiĉo laŭ Ginsberg)

120

de Petru Ilieșu
(el la rumana tradukis Nicola Ruggiero)



Petru Ilieșu.
Foto: Fejsbuk-profilo de la aŭtoro

Petru Ilieșu estas la pseŭdonimo de Petru Nicolae Ilieș (Timișoaro, 1951), rumana poeto de la t.n. generacio de 80, plurfoje premiita. Li studis filologion en la Universitato de Timișoaro. En 1982 oni arestis lin pro distribuado de manifesto kontraŭ Ceaușescu. La 18an de decembro 1989, dum la revolucio kontraŭ la reĝimo de Ceaușescu, li troviĝis en Bukareŝto; de tie li faris internacian alvokon kaj petis la intervenon de UN pro la mortpafoj al manifestaciantoj en Timișoaro. Tri tagojn poste li estis arestita de la Viglad-servo. Post la revolucio li elreviĝis pri partia politiko kaj komencis energie aktivadi en neregistaraĵoj. Libroj: *Pastel H* (*Paŝtelo H*, 1977), *Autoportret cu foxterrier* (*Memporetro kun vulp-teriero*, 1980), *Întrebare despre întoarcerea acasă* (*Demando pri rehejmiĝo*, 1985), *Confesiunea asupra labirintului* (*Konfeso pri la labirinto*, 1995), *România* (*Rumanio*, 1996), *Petru* (1997), *Revoluția* (*La Revolucio*, 2000), *Jazzul ca stare de spirit* (*Ĵazo kiel spirita stato*, 2009), *În căutarea lui Tank Man* (*Serĉante Tank Man*, 2017).

Rumanio, mi donis ĉion al vi kaj nun mi estas nenio
 Rumanio, en la poŝo mi havas kvarmil ducent levojn –
 la 17an de januaro, 1995.
 Tiom proksimume valoras mia inta kaj nuna metafiziko.

Mi satiĝis de miaj propraj menso kaj imago.

Rumanio, kiam ni haltigos nian saĝan kanibalismen?
 Vi povas lavi la kapon per via postrevolucia venko.
 La Revolucio estis unu afero, kaj la postrevolucio
 estas alia.

La postrevolucio estas tintanta doso¹.
 Blufo kun ĉifon-revoluciuloj kaj
 servilaj parvenuoj.

Ŝu-ciro.

Historia furzo de historiaj furzuloj.
 La malpuro kaj fienco de
 nov-oldaj generacioj de nelavitaj lekistoj kaj lekistoj
 libermerkataj.

Mi ne fartas bone. Mi vomemas.

Mi ne verkos la Poemon ĝis mi reposedos ĉiujn fakultojn.

Kaj tiel mi ne povas reposedi ilin...

Kiam vi rekonsciiĝos, Rumanio?

Kiam vi forĵetos viajn proletkultajn ĉifonojn?

La trivialo de la demokratio kaj la demokratio de la trivialo.

Kiam vi rigardos vin mem el tiu ĉi ŝlima tombejo?

Kiam vi indos je via miliono da poetoj?

Rumanio, kial viaj bibliotekoj plenas je larmoj?

Rumanio, kiam vi sendos misiistojn al Moldavio?

Mi satiĝis pri viaj mafiaj restaŭroj.

Kiam mi povos eniri la paĝon de ĵurnalo
 kun MIA VERO kaj mia propra persona ĉarmo?

Rumanio, finfine la Perfekto estas Vi kaj Mi
 kaj la sekvanta mondo
 kiu fuĝas de ni.

1 **dosoj:** ladskatolo.

Via maŝino min transpasas.
 Vi instigas min ekstertempi. Kaj eble
 mi estas ekstertempa.

Devas ekzisti alia vojo kvietigi la disputon de mia konscienco
 inter mia tereco kaj mia sankta aspekto

Rumanio, vi kaŭzis al vi hemoragion!

Miaj amikoj kaj fratoj disŝutiĝis
 tra la tuta mondo
 kaj mi ne kredas ke ili revenos.
 Tio sinistras.

Rumanio, ĉu vi havas sinistran inklinon
 aŭ tio estas ia ŝerco?

Mi strebas reveni al la temo.
 Mi rifuzas forlasi mian obsedon.
 Rumanio ne vartu min.
 Mi scias kion mi faras.

Rumanio, la prunarabaj infloreskoj jam falas.
 Jen bildo kiun mi kredas inda je mi.

De monatoj mi ne plu legas ĵurnalojn, ĉiutage
 iu estas juĝata pro ajnaspeca delikto
 kiu estas formetita en arkivon.

Rumanio vi ekestas kazo formetita en arkivon.

Aliflanke, Rumanio, mi sentas kor-inklinon por
 la emeritoj de **CAP**²

Mi sentas kor-inklinon por la emeritoj
 kaj la knabetoj fordrivantaj.

Ĉu vi scias, Rumanio, mi kutimis hipiumi knabaĝe
 Mi portis uzitajn ĵinsojn, florĉemizojn
 kaj aŭskultis **The Doors**³.

Mi ne pentas.
 Ankoraŭ nun mi noktumas en la ĵazklubo
 kiam la okazo prezentigās.

Tuttage al mi plaĉas resti hejme

2 *Cooperativă Agricolă de Producție* (Agrikultura Produktad-Kooperativo).

3 Usona rokmuzika grupo (1965-73).

kaj kontempli la rozojn de la politika trogo.
Kion malbonan faris al vi la floroj, Rumanio?

Kiam mi pasas inter la apartamentaj blokoj
mi emas ebriiĝi kaj fariĝas mizogino.
Mi detenas min paroli pri
humanismo.
Pri tio mi estas rezoluta. Alvenas problemoj.

Vi devus vidi kiel mi legis la ĵurnalon *Scînteia*⁴.
Mia **SRI**-gardaĝelo⁵ opinias ke mi tute pravas.
Mi ne diros “Patro nia” kiel la aliaj
antaŭ la televidaj kameraoj.
Mi havas mistikajn viziojn kaj kosmajn vibradojn.

Rumanio, mi ankoraŭ ne rakontis al vi kion ŝtelistoj faris
al mia najbaro
reveninta el la Revolucio

Rumanio, mi ankoraŭ ne rakontis al vi kiel
oni vere mortas en Revolucio

Rumanio, mi ankoraŭ ne rakontis al vi kiel
oni vere mortas post Revolucio...

Al vi mi parolas.

Ĉu vi planas lasi vian emocian vivon
sub gvido de *Rumana Radio-Televideo*?
Min obsedas “Rumanaradiotelevideo”
Ĉiun vesperon mi spektas la “novaĵojn”.
La ekrano fiksrigardas min ĉiun fojon
kiam mi malaperas post la angulo de la biblioteko.
Mi sekvas la elsendojn en la vestiblo de la Urba Magistratejo.

La klozeto zumas senpacience
por spekti la gazetarajn konferencojn.
Mia littuko malsekas pro la dumdorma turniĝado.

Mi inkubsonĝas pri politika nealiancitateco.

4 De 1953 skribita Scînteia (*La Fajrero*), oficiala ĵurnalo de la Rumana Komunista Partio.

5 *Serviciul Român de Informații* (Rumana Inform-Servo) estis sekreta ŝtatservo dum la socialisma periodo.

Mi havas konscienciproĉojn
pro kriteri-manko.

Ĝi ĉiam parolas al mi pri respondeco.
Negocistoj seriozas.
Politikistoj seriozas.
Honoraj civitanoj seriozas.
Ĉiuj – krom mi – seriozas.

Mi freneziĝis.
Mi ekpensas ke mi reprezentas Rumanion.

Mi parolas al mi mem ankoraŭ:

Hungario ekstaras kontraŭ mi.
Eŭropo povas esti senŝanca afero.
Pli bone estus rekonsideri la naciajn resursojn.
Miaj naciaj resursoj konsistas el
du-tri nodoj en la animo
kelkmil noktoj sendormaj kaj
nepublikigebla
netranskribebla
konfidenca literaturo moviĝanta je '89 000 kilometroj hore
kaj 25 000 000 aziloj por frenezuloj

Mi havas nenion por diri pri la intervjuoj
de *Securitate*⁶
nek pri la milionoj da subprivilegiuloj
vivataj en la dosieroj de mia humanitara fondaĵo
sub la netuŝebla brilo de miriado da sunoj.

Mi nuligis la aliron al gazetoj kaj libroj
en la montaraj regionoj
Mi abolis la diskretan miraklon de amikeco
La Viglad-Departemento havas novan sidejon.
Timiŝoaro⁷ estas re la venonta loko al kiu mi iros.
Mia ambicio: fariĝi prezidento
kvankam mi estas ortodoks-ekumena.

6 "Sekureco", sekreta rumana polico (1948-89).

7 La urbo Timiŝoara (hungare: Temesvár).

Rumanio, kiel mi povus verki sanktan psalmon
laŭ viaj stultaj, sentantaj akordoj?

Plu estu kiel “la riĉiĝintoj de la Revolucio”.

Miaj strofoj apartas kiel iliaj firmaaj ŝildoj
kaj krome estas bluasangaj.

Rumanio, mi vendos al vi strofojn po 25 000 levoj por ĉiu,
500 levojn malpli ol via indeksita strofo ŝima

Rumanio, liberigu nin de la senhonta maskerado de fantomaj
partioj. Kalkulu ĝis dek kaj haltu!

Rumanio, savu la moldavajn lojalistojn.

Rumanio, niaj intelektuloj ne devas elmigri

ĉar poste ni diros inter ni: “stupid people”⁸...

Rumanio, mi estas la dorno de politikaj sendependuloj!

Jen konfeso:

Rumanio, kiam mi aĝis dek

la *Partio* faris min pioniro

kondukis min al la **Grandaj Naciaj Paradoj**,

mi manĝis kolbasojn grandajn kaj etajn kun mustardo,

sukervaton kaj rostitajn sunflor-semblojn,

mi mungis min per la **ruĝa koltuko**⁹

mi kantis patriotajn kantojn ĝis violiĝi

kaj mi fikse rigardis la aktivulojn

kaj ni ĉiuj estis anĝelaj kaj sentimentalaj rilate

la laboristojn

ĉio estis tiel sincera

vi ne imagas la bonecon de la **Partio** en la jaro ‘68

Gheorghe Maurer¹⁰ estis impona maljunulo

vera gvidanto

Ceaușescu plorigis min poste pri Ĉeĥoslovakio¹¹.

8 Stultuloj (angle).

9 La uniformo de la pioniroj havis ruĝan koltukon, kiun oni menciis kaj en la pionira himno kaj en la ĵuro por fariĝi pioniro. Al la socialisma Organizo de Pioniroj apartenis infanoj 8- ĝis 14-jaraj.

10 Gheorghe Maurer (1902-2000) estis ĉefministro de Rumanio inter 1961-74.

11 Rumanio ne partoprenis, kune kun Albanio, en la invado al Ĉeĥoslovakio la 20an de marto 1968, kiun faris la landoj apartenantaj al la Varsovia Traktato por sufoki la Pragan Printempon kaj la reformojn de la registaro de Alexander Dubček.

Iam mi klare vidis eĉ Ion Iliescu¹².
Ĉiu el ili devis esti “homo de sia tempo”.

Poste mi komprenis: el ĉiuj ruĝaĵoj,
mi ŝatas la vinon.

Mi diras al mi mem:

Rumanio, vi vere ne volas fari minist-protestojn

Rumanio, tiuj estas la fiaj fremduloj.

Tiuj estas la fremduloj, tiuj estas la fremduloj kaj
tiu, la Reĝo

kaj tiuj estas la fremduloj.

Okcidento volas engluti nin vivajn. La forto de Okcidento
frenezas.

(Ĝi ja frenezas)

Ĝi volas kaperi Caracal¹³

La Reĝo volas ŝteli de ni
niajn laboristajn kvartalojn

Li bezonas *România Liberă*¹⁴ “pri la familio”

Li volas ke niaj metalurgiaj uzinoj estu en Svislando

ke lia giganta familio posedu niajn **Staciojn de Agrikulturaj Maŝinoj
kaj Traktoroj**¹⁵

Tio ne bonas. Pa!

Li igos la ciganojn studi la kodon de la civila socio kaj arkitekturon.
Por demokratio li bezonas grandajn nigrajn ciganojn
en grandaj nigraj aŭtomobiloj. Uuuuuuu.

Li igos la ceterajn labori ok horojn tage. Helpon!

Rumanio, tio ja seriozas!

Rumanio, tio ja estas tro!

12 Ion Iliescu (1930-), iama membro de la Komunista Partio de Rumanio, fariĝis la unua prezidento post la falo de socialismo (1989-1996) kaj estis jarojn poste reelektita (2000-2004).

13 Agrikultura urbeto en suda Rumanio, vere malgranda sed kun nacia teatro, monumentoj, muzeoj kaj parkoj.

14 Grava ĵurnalo rumana, konservativa.

15 La *Staĵuni de Maŝini ŝi Tractoare*, poste nomitaj *Staĵuni de Maŝini Agricole*, estis ŝtataj parkoj de kultiviloj dum la socialisma epoko. Ili grave rolis dum kolektivigo (1949-62).

Rumanio, tio ĉi estas la impresoj kiun mi havas spektante la televidan kanalon

Rumanio, ĉu tio ĝustas?

Pli bone estus, kiel vi diras, meti manojn al la laboro formeti bagatelojn kaj perlabori honestan monon.

Mi havas tro da tempo

Mi tro senpacienca.

Tamen estas vere ke mi ne volas rekrutiĝi en

la *Nacian Sav-Armeon*

nek glorigi la utilecon

de la *evolugita internaciismo*

Mi estas ĉiukaze presbiopa kaj obsedita


kaj apenaŭ povas spiri.

Rumanio

per mia tuta amo

mi donas mian gregulan helpman manon por la fluo de via destino.

Reklamo



Belarta rikolto 2019

la premiitaj tekstoj de la Belartaj Konkursoj 2019 de UEA kaj la raporto de la prezidanto de la Belartaj Konkursoj, Miguel Fernández.

ISBN 9781595693938 (aperos oktobre 2019).

Mendu ĉe UEA, via libroservo, en ekstermovadaj retejoj aŭ ĉe www.librejo.com

Perlo

(I-IV)

128

de Nekonata
(el la mezangla tradukis Marjorie Boulton)



Marjorie Boulton en 1999. Fotis Philip Brewer.
Fonto: Vikipedio

Edmund Grimley Evans, en sia Antaŭparolo al la baldaŭ ĉe Mondial aperanta libro, konstatas ke li “tute akcidente iĝis editoro de ĉi tiu verko. Kiam Marjorie Boulton forpasis la 30-an de aŭgusto 2017, ŝi heredigis siajn Esperantajn librojn al Esperanto-Asocio de Britio (EAB), kaj aliajn aferojn al sia kolegio Somerville en Oksfordo... Dum mi estis en ŝia domo en Oksfordo, mi ekvidis faskon da surtajpitaj flav-oranĝaj paperoj..., kiun mi tuj rekonis kiel manuskripton de ŝia neeldonita traduko de *Perlo*, menciita en la enciklopedio de Geof-

frey Sutton (Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto, 2008) kun la informo, ke ĝi ankoraŭ atendas publikigon... Entute la verko havas interesan historion. La 101-strofa, 1212-versa poemo estis verkita en la malfrua 14-a jarcento de aŭtoro, kies nomon oni ne scias, en nordokcidenta dialekto de la mezangla. Ĝi priskribas songon aŭ vizon, en kiu patro renkontas sian mortintan filinon, kiun li nomas ‘perlo’... Laŭ siaj notoj, Marjorie Boulton ricevis la finan stimulon eklabori pri la traduko per la morto de sia studgvidanto la 20-an de marto 1976. Ŝi ‘faris voton’ kaj dum du jaroj tradukis, se eble, unu strofon ĉiun dimanĉon, pro ‘iasence religiaj motivoj’, atingante la finan version la 7-an de novembro 1982.”

Pri la enhavo de la verko mem, **Humphrey Tonkin** klarigas en sia Enkonduko: “‘Cetere, la regno de la ĉielo similas al komercisto, serĉanta belajn perlojn; kaj trovinte unu multevaloran perlon, li iris kaj vendis ĉion, kion li posedis, kaj aĉetis ĝin.’ Tiel Jesuo, en la Evangelio laŭ Sankta Mateo, klopodanta klarigi la kompletecon de la ĝojo kiu akompanas sindediĉon al Dio. Tiu rakonto pri sankta mistero fonas la tutan nunan poemon... La poeto endormiĝas. Ensonge li trovas sin en bela, lumoplena arbaro... Apude estas kampo, kaj preter la kampo la poeto trovas sin ĉe la bordo de rivero. Li volas transiri al la paradizo ĉe la alia riverflanko, sed ne kapablas... Ĉe tiu

alia bordo staras junulino... La junulino parolas: ŝi estas lia perdita perlo kaj ĝuas eternan vivon en Paradizo. Sed nia poeto, anstataŭ ĝoji pri ŝia stato kiel edzino de Dio – plene ligita al Dio en tiu senpeka pretermonda loko – fiksiĝas je la propra malfeliĉo. Li sin demandas: Kial ŝi, kiu mortis juna, ĝuas tian staton, dum mi, maljuna kaj batita de la skurĝoj de surtera vivo, ne povas atingi ĝin? Ĉu mi ne estas pli merita, ĉar pli elprovita, ol ŝi?... La debato kiu sekvas inter la poeto kaj la junulino tuŝas fundamentan elementon de la kristana teologio, nome la rilaton inter devo unuflanke kaj graco aliflanke.”

BA publikigas ĉi tie la sekciojn I ĝis IV, kiuj servas kiel prologo. En ili, la rakontanto, trista pro la perdo de sia perlo, endormiĝas en verda ĝardeno kaj komencas songi pri alimonda ĝardeno, en kiu li promenas rande de bela rivero, ĉe kies alia flanko li supozas la Paradizon. Dum la serĉo por transirejo, li ekvidas junan knabinon, en kiu li kredas rekoni sian perlon. Ŝi salutas lin.



Manuskript-
penetraĵo.
Fonto: Vikipedio

I

1.

1 Perle, plesaunte to prynces paye
 2 To clanly clos in golde so clere,
 3 Oute of oryent, I hardyly saye,
 4 Ne proued I neuer her precios pere.
 5 So rounde, so reken in vche araye,
 6 So smal, so smoþe her syde3 were,
 7 Quere-so-euer I jugged gemme3 gaye,
 8 I sette hyr sengeley in synglere.
 9 Allas! I leste hyr in on erbere;
 10 Þur3 gresse to grounde hit fro me yot.
 11 I dewyne, fordolkeð of luf-daungere
 12 Of þat pryuy perle wythouten spot.

2.

13 Syþen in þat spote hit fro me sprange,
 14 Ofte haf I wayted, wyschande þat wele,
 15 Þat wont wat3 whyle deuoyde my wrange
 16 And heuen my happe and al my hele.
 17 Þat dot3 bot þrych my hert þrange,
 18 My breste in bale bot bolne and bele;
 19 3et þo3t me neuer so swete a sange
 20 As styлле stounde let to me stele.
 21 For soþe þer fleten to me fele,
 22 To þenke hir color so clad in clot.
 23 O moul, þou marre3 a myry iuele,
 24 My priuy perle wythouten spotte.

3.

25 Þat spot of spyse3 mot nede3 sprede,
 26 Þer such ryche3 to rot is runne;
 27 Blome3 blayke and blwe and rede
 28 Þer schyne3 ful schyr agayn þe sunne.
 29 Flor and fryte may not be fede
 30 Þer hit doun drof in molde3 dunne;
 31 For vch gresse mot grow of grayne3 dede;
 32 No whete were elle3 to wone3 wonne.
 33 Of goud vche goude is ay bygonne;
 34 So semly a sede mo3t fayly not,
 35 Þat spryngande spyce3 vp ne sponne
 36 Of þat precios perle wythouten spotte.

1 Perl' por plezuro princa inda,
2 por munti orde en brila or',
3 mi arde asertas: el riĉo hinda
4 ne estis egala en ega glor'.
5 Tiel gaja, ĝlata, malgranda, linda,
6 ronda, rara en ajna rol',
7 ke en juvelaro juste juĝinda
8 mi taksis ŝin tute unika trezor'.
9 Ve! sur gazono ŝi glitis for,
10 tra herbo haste al fund', forkura;
11 mi velkas vundite, pro am-dolor'
12 pro Perlo propra kaj senmakula.

13 Ek de l' eksig' kiam Perl' forsaltis,
14 mi plore petadis perditan belon,
15 kiu sendis sanon kaj min ekzaltis,
16 en malluman menson briligis helon.
17 Brulado en brust' neniam haltis,
18 kaj koro konstante suferis ŝvelon;
19 sed miela muziko mistere altis,
20 kviete konsolis mian orelon,
21 multfoje mildigis mizer-muelon
22 pro karaj koloroj en kot' obskura.
23 Argil', vi aĉigas amindan juvelon,
24 ho Perlo propra kaj senmakula!

25 Spicplantoj sprosos sur tiu tero,
26 per putranta Perlo bela burĝon',
27 floroj flavaj en freŝa partero,
28 bluaj kaj ruĝaj, brilos al sun';
29 ne vane velkos floro aŭ bero
30 kie ĝi glitis tra grunda brun';
31 nuliĝo necesas por nova grenero,
32 ke tritiko troviĝu por nia farun';
33 bono baziĝas ĉiam sur bon';
34 grenero glora ne iĝos nula;
35 spicplantoj sin montros en sia sezon'
36 el Perl' plej kara kaj senmakula.

4.

37 To þat spot þat I in speche expoun
 38 I entred in þat erber grene,
 39 In Augoste in a hy3 seysoun,
 40 Quen corne is coruen wyth crokez kene.
 41 On huyle þer perle hit trendeled doun
 42 Schadowed þis worte3 ful schyre and schene,
 43 Gilofre, gyngure and gromlyoun,
 44 And pyonys powdered ay bytwene.
 45 3if hit wat3 semly on to sene,
 46 A fayr reflayr 3et fro hit flot.
 47 Þer wonys þat worþyly, I wot and wene,
 48 My precious perle wythouten spot.

5.

49 Bifore þat spot my honde I spenned
 50 For care ful colde þat to me ca3t;
 51 A deuely dele in my hert denned,
 52 Þa3 resoun sette myseluen sa3t.
 53 I playned my perle þat þer wat3 spenned
 54 Wyth fyrce skylle3 þat faste fa3t;
 55 Þa3 kynde of Kryst me comfort kenned,
 56 My wreched wylle in wo ay wra3te.
 57 I felle vpon þat floury fla3t,
 58 Suche odour to my herne3 schot;
 59 I slode vpon a slepyng-sla3te
 60 On þat precios perle wythouten spot.

II

6.

61 Fro spot my spyryt þer sprang in space;
 62 My body on balke þer bod in sweuen.
 63 My goste is gon in Gode3 grace
 64 In auenture þer meruayle3 meuen.
 65 I ne wyste in þis worlde quere þat hit wace,
 66 Bot I knew me keste þer klyfe3 cleuen;
 67 Towarde a foreste I bere þe face,
 68 Where rych rokkez wer to dyscreuen.
 69 Þe ly3t of hem my3t no mon leuen,
 70 Þe glemande glory þat of hem glent;
 71 For wern neuer webbez þat wy3e3 weuen
 72 Of half so dere adubbenente.

37 Al tiu tomb' de miaj kantoj
 38 mi triste trenis min dum tago
 39 fruktfesta, kiam la falĉantoj
 40 tritikon tranĉis per akra hako.
 41 Ornamis kaj ombris la tombon plantoj
 42 brilaj kaj belaj: zingibro, borago,
 43 peonioj plurloke kaj spic-diantoj,
 44 kie kuŝis la kara post ŝia ekvago;
 45 ariĝis aromoj, parfuma pago,
 46 kiel koloroj por ĝojo okula;
 47 tre taŭgis tie, laŭ mia imago,
 48 por perl' plej kara kaj senmakula.

49 Ĉe tiu tomb' mi manojn tordis;
 50 frosta funebro min forprenis;
 51 racio feble en mi fortis,
 52 sed vasta veado venka enis.
 53 Sovagaĵaj sentoj en mi malordis,
 54 pro perlo kiun la ĉerko ĉenis.
 55 Kvankam Kristo konsolon portis,
 56 mia vanta volo de ploroj plenis.
 57 Mi falis sur florojn; al cerbo venis
 58 tia odoro tute satura
 59 ke subite en songon mi sinke svenis
 60 pro perlo propra kaj senmakula.

61 Subite saltis spirito mia,
 62 dum korpa karn' ĉe la tombo daŭris;
 63 anim' aventuris per graco Dia
 64 kie mirindaĵoj malordinaris.
 65 Pri la loko aŭ lando mi staris senscia,
 66 sendita al klif' kiu alte remparis;
 67 al arbaro mi iris, kie radia
 68 riĉa rokaro tre strange staris.
 69 Preter penseblo la lumo klaris,
 70 kun brila bel' kiel blanka flamo;
 71 neniuj homoj teksaĵon faris
 72 kun eĉ ero de l' oro de tia ornamo.

7.

73 Dubbed wern alle þo downe3 syde3
 74 Wyth crystal klyffe3 so cler of kynde.
 75 Holtewode3 bry3t aboute hem byde3
 76 Of bolle3 as blwe as ble of Ynde;
 77 As bornyst syluer þe lef on slyde3,
 78 Pat þike con trylle on vch a tynde.
 79 Quen glem of glode3 agayn3 hem glyde3,
 80 Wyth schymeryng schene ful schrylle þay schynde.
 81 Þe grauayl þat on grounde con grynde
 82 Wern precious perle3 of oryente:
 83 Þe sunnebeme3 bot blo and blynde
 84 In respecte of þat adubement.

8.

85 The adubbemente of þo downe3 dere
 86 Garten my goste al greffe for3ete.
 87 So frech flauore3 of fryte3 were,
 88 As fode hit con me fayre refete.
 89 Fowle3 þer flowen in fryth in fere,
 90 Of flaumbande hwe3, boþe smale and grete;
 91 Bot sytole-stryng and gyternere
 92 Her reken myrþe mo3t not retrete;
 93 For quen þose brydde3 her wynges bete,
 94 Þay songen wyth a swete asent.
 95 So gracios gle coupe no mon gete
 96 As here and se her adubbement.

9.

97 So al wat3 dubbet on dere asyse
 98 Pat fryth þer fortwne forth me fere3.
 99 Pat derþe þerof for to deuyse
 100 Nis no wy3 worþe þat tonge bere3.
 101 I welke ay forth in wely wyse;
 102 No bonk so byg þat did me dere3.
 103 Þe fyrre in þe fryth, þe feier con ryse
 104 Þe playn, þe plontte3, þe spyse, þe pere3;
 105 And rawe3 and rande3 and rych reuere3,
 106 As fyldor fyn her bonkes Brent.
 107 I wan to a water by schore þat schere3 –
 108 Lorde, dere wat3 hit adubbement!

73 Ĉirkaŭis ĉiujn montetojn tie
 74 kristalaj klifoj de klar' mirinda;
 75 brilis arbaro arĝent-folie,
 76 kun trunkoj belaj per bluo hinda;
 77 flirtis, frotiĝis, folioj radie,
 78 dense dancante sur branĉo tinta.
 79 Kiam sun' speguliĝis sur arboj ĉie,
 80 la lumo ludanta min lasis blinda.
 81 Ĉiu gruzero sur grund' grincinta
 82 estis pura perlo; la suna flamo
 83 ombris obskure el sfero cindra,
 84 kompare kun brilo de tiu ornamo.

85 Ornamo mirinda de l' montoj gloraj
 86 el aflikto animon tiris trankvile;
 87 fruktoj frandindaj kaj freŝ-odoraĵ
 88 konsolis la korpon tre facile;
 89 jen buntaj birdoj plej bril-koloraj,
 90 egaj kaj etaj, flugadis trile;
 91 harpoj kaj citroj plej belsonoraj
 92 por ĝojo kaj ĝuo ne ĝustus simile;
 93 dum la belaj birdoj flirtis flugile,
 94 ili kantis klare per rava gamo;
 95 belus nenia ĝoj' pli brile
 96 ol koloroj kaj kantoj de tiu ornamo.

97 L' ornam' de la loko estis tia
 98 en forst' kiun mi fortune frandis,
 99 ke nenies lango plej poezia
 100 indete ion tian prikantis.
 101 Nenio min ĝenis; mi ĝojebria
 102 pluen kaj pluen facile plandis,
 103 ĉio min ravis des pli radia,
 104 plantoj kaj piroj pli diamantis;
 105 brilegis bordoj, riveron randis
 106 kiel orfadenoj sur oriflamo;
 107 mi rigardis riveron kiu meandris;
 108 aĥ Kristo, la karo de tiu ornamo!

10.

109 The dubbemente of þo derworth depe
 110 Wern bonke3 bene of beryl bryzt.
 111 Swangeande swete þe water con swepe,
 112 Wyth a rownande rourde raykande aryzt.
 113 In þe founce þer stonden stone3 stepe,
 114 As glente þur3 glas þat glowed and glyzt,
 115 As stremande sterne3, quen stroþe-men slepe,
 116 Staren in welkyn in wynter nyzt;
 117 For vche a pobbel in pole þer pyzt
 118 Wat3 emerad, saffer, oþer gemme gente,
 119 Pat alle þe lo3e lemed of lyzt,
 120 So dere wat3 hit adubblement.

III**11.**

121 The dubbement dere of doun and dale3,
 122 Of wod and water and wlonk playne3,
 123 Bylde in me blys, abated my bale3,
 124 Fordidden my stresse, dystryed my payne3.
 125 Doun after a strem þat dry3ly hale3
 126 I bowed in blys, bredful my brayne3;
 127 Þe fyrre I fol3ed þose floty vale3,
 128 Þe more strengþe of ioye myn herte strayne3.
 129 As fortune fares þer as ho frayne3,
 130 Wheþer solace ho sende oþer elle3 sore,
 131 Þe wy3 to wham her wylle ho wayne3
 132 Hytte3 to haue ay more and more.

12.

133 More of wele wat3 in þat wyse
 134 Þen I cowþe telle þa3 I tom hade,
 135 For vrþely herte myzt not suffyse
 136 To þe tenþe dole of þo gladne3 glade;
 137 Forþy I þo3t þat Paradyse
 138 Wat3 þer ouer gayn þo bonke3 brade.
 139 I hoped þe water were a deuyse
 140 Bytwene myrþe3 by mere3 made;
 141 By3onde þe broke, by slente oþer slade,
 142 I hoped þat mote merked wore.
 143 Bot þe water wat3 depe, I dorst not wade,
 144 And euer me longed ay more and more.

109 Ornamo pompa de l' flu' profunda
110 estis belaj bordoj el brila berilo;
111 kirliĝe, karese, rivero abunda
112 milde murmuris en lirla trilo.
113 Ŝtonoj starantaj sur subo funda
114 flamis kiel fajro tra vitra ŝirmilo,
115 kiel, dum dormas homar' nur grunda,
116 vintre sur volbo stelara milo;
117 ĉar ĉiu ŝtoneto ŝajnis safiro,
118 smeraldo, alia ŝatinda gemo;
119 la tuta lageto lumegis en brilo
120 pro klaro kaj karo de tiu ornamo.

121 Pro ornamo de arboj, alto, valo,
122 klifoj kaj kampoj kiujn mi trovis,
123 fontis feliĉo, forfluis galo;
124 belego funebbron el kor' formovis;
125 mi sekvis riveron laŭ fluo-falo
126 dum pensoj la cerbon preme plenblovis;
127 ju pli tra la roĵo-riĉa novalo
128 mi iris, des pli ĝi la koron ravis.
129 Kiam fortun' ies fortojn provis,
130 ĉu per premego, ĉu per premi',
131 tiu, kiun ŝi teste ŝovis,
132 spertis la samon pli kaj pli.

133 Pli plaĉis plezuroj de tiu gloro
134 ol mi povus priskribi dum jar' feria,
135 ĉar ne kapablas surtera koro
136 por dekono de l' ĝoja ĝojo tia;
137 do mi pensis ke Paradiz' en foro
138 brilis kontraŭe sur bord' alia;
139 ke rolis river' kiel bela baro
140 inter ĝoj-ĝarden' kaj ĝardeno plia;
141 mi pensis, ke preter la roĵo radia
142 sin montras muroj de l' urbo de Di';
143 tro profundis la akvo por vado mia,
144 kaj mi ĉiam sopiris pli kaj pli.

13.

145 More and more, and zet wel mare,
 146 Me lyste to se þe broke byzonde;
 147 For if hit wat3 fayr þer I con fare,
 148 Wel loueloker wat3 þe fyrre londe.
 149 Abowte me con I stote and stare;
 150 To fynde a forþe faste con I fonde.
 151 Bot woþe3 mo iwysse þer ware,
 152 Þe fyrre I stalked by þe stronde.
 153 And euer me þo3t I schulde not wonde
 154 For wo þer wele3 so wynne wore.
 155 Penne nwe note me com on honde
 156 Þat meued my mynde ay more and more.

14.

157 More meruayle con my dom adaunt:
 158 I se3 byzonde þat myry mere
 159 A crystal clyffe ful relusaunt;
 160 Mony ryal ray con fro hit rere.
 161 At þe fote þerof þer sete a faunt,
 162 A mayden of menske, ful debonere;
 163 Blysnande whyt wat3 hyr bleaunt.
 164 I knew hyr wel, I hade sen hyr ere.
 165 As glysnande golde þat man con schere,
 166 So schon þat schene an-vnder shore.
 167 On lenghe I loked to hyr þere;
 168 Þe lenger, I knew hyr more and more.

15.

169 The more I frayste hyr fayre face,
 170 Her fygure fyn quen I had fonte,
 171 Suche gladande glory con to me glace
 172 As lyttel byfore þerto wat3 wonte.
 173 To calle hyr lyste con me enchace,
 174 Bot baysment gef myn hert a brunt.
 175 I se3 hyr in so strange a place,
 176 Such a burre my3t make myn herte blunt.
 177 Penne vere3 ho vp her fayre frount,
 178 Hyr vysayge whyt as playn yuore:
 179 Þat stonge myn hert ful stray atount,
 180 And euer þe lenger, þe more and more.

145 Pli kaj pli, preter l' rivero
 146 mi plueniri pli sopiris;
 147 se plaĉis permesita tero,
 148 la preterejo pli altiris.
 149 Mi staris, strebis kun espero;
 150 vidi vadejon mi deziris;
 151 sed des pli kreskis la danĝero
 152 ju pli mi timtremante iris;
 153 tamen la timo malutilis;
 154 racie mi risku por rava sci'.
 155 Pro io nova mi nun ekmiris,
 156 kio movis la menson pli kaj pli.

157 Rav' pli kaj pli racion skuis:
 158 sur l' alia bordo de l' akvo bela,
 159 brila kristala klif' situis,
 160 radiis rojale per lumo hela.
 161 Sur la strando super la roj' kiu fluis
 162 sidis virta virgino, gracia, ĝentila;
 163 brilege blanka mantel' kongruis;
 164 mi rekonis ŝin per memor' fidela.
 165 Kiel orbendaro por bildo stela,
 166 sur la bord' sub klifo brilegis ŝi;
 167 rigard' pli longa, des pli rivela,
 168 igis min koni ŝin pli kaj pli.

169 Ju pli mi vidis la vizaĝon,
 170 kaj ŝin, trovinte, ekzamenis,
 171 des pli ĝi peris ĝojan plaĉon;
 172 tian ĝis tiam mi poka prenis.
 173 Volo ŝin voki vekis kuraĝon,
 174 tamen konfuzo la koron ĝenis;
 175 al vido mi faris strangan vojaĝon;
 176 pro forta frapego la koro svenis;
 177 la belan frunton ŝi alte tenis,
 178 kiel blanka eburo brilegis ŝi.
 179 Al mi aplombo ne apartenis –
 180 vidante, mi dubis des pli kaj pli.

16.

181 More þen me lyste my drede aros.
 182 I stod ful styлле and dorste not calle;
 183 Wyth y3en open and mouth ful clos
 184 I stod as hende as hawk in halle.
 185 I hoped þat gostly wat3 þat porpose;
 186 I dred onende quat schulde byfalle,
 187 Lest ho me eschaped þat I þer chos,
 188 Er I at steuen hir mo3t stalle.
 189 Þat gracios gay wythouten galle,
 190 So smobe, so smal, so seme sly3t,
 191 Rysez vp in hir araye ryalle,
 192 A precios pyece in perlez py3t.

IV**17.**

193 Perlez py3te of ryal prys
 194 Þere mo3t mon by grace haf sene,
 195 Quen þat frech as flor-de-lys
 196 Doun þe bonke con bo3e bydene.
 197 Al blysnande whyt wat3 hir beau biys,
 198 Vpon at syde3, and bounden bene
 199 Wyth þe myryeste margarys, at my deuysel,
 200 Þat euer I sez zet with myn ene;
 201 Wyth lappez large, I wot and I wene,
 202 Dubbed with double perle and dy3te;
 203 Her cortel of self sute schene,
 204 Wyth precios perlez al vmbepy3te.

18.

205 A py3t coroune zet wer þat gyrlle
 206 Of mariorys and non oþer ston,
 207 Hize pynakled of cler quyt perle,
 208 Wyth flurted flowrez perfet vpon.
 209 To hed hade ho non oþer werle;
 210 Her here leke, al hyr vmbegon,
 211 Her semblaunt sade for doc oþer erle,
 212 Her ble more bla3t þen whalle3 bon.
 213 As schorne golde schyr her fax þenne schon,
 214 On schyldere3 þat leghe vnlapped ly3te.
 215 Her depe colour zet wonted non
 216 Of precios perle in porfyl py3te.

181 Senvoĉe en silenta staro,
 182 pro troa timo senmezura,
 183 senfara kiel falk' en halo,
 184 mi miris, muta, larĝokula.
 185 Mi emis kredi ke l' kialo
 186 estis signif' supernatura.
 187 Dum tenos min tiu timo-baro
 188 jam fuĝos ŝi, de mi forkura...
 189 la dolĉa damo senmakula,
 190 glata, gracia, eskvizita,
 191 leviĝis, la reĝinfigura,
 192 person' per perloj ornamita.

193 Perloj perfektaj por princin'
 194 per Dia grac' vidiĝis vere
 195 kiam malsupren sur l' ravin'
 196 la linda lilio venis libere.
 197 Blankega brilis la bisin'
 198 ĉe flankaj fendoj, kaj fiere
 199 pli pompaj perloj garnis ĝin
 200 ol vidis mi vekita, tere;
 201 sur la manikoj vicopare
 202 perlar' paradis purkvalita;
 203 mantelo harmoniis hele,
 204 per pliaj perloj ornamita.

205 Sur ŝia kapo staris krono
 206 kun perlaĵ pinakletoj palaj,
 207 perloj sen ajna plusa ŝtono
 208 en flor-figuroj pur-petalaj;
 209 grave kiel grafo aŭ barono
 210 mienis ŝi, dum or-vualaj
 211 helis la haroj kiel fono
 212 sen lig' liberaj, longe falaj;
 213 pli brile blankaj ol rosmaraj
 214 dentegoj, la vizaĝ' invita
 215 mem perle palis pli ol paraj
 216 perloj sur orlo ornamita.

19.

217 Pyzt wat3 poyned and vche a hemme
 218 At honde, at syde3, at ouerture,
 219 Wyth whyte perle and non oþer gemme,
 220 And bornyste quyte wat3 hydr uesture.
 221 Bot a wonder perle wythouten wemme
 222 Inmydde3 hydr breste wat3 sette so sure;
 223 A manne3 dom mo3t dry3ly demme,
 224 Er mynde mo3t malte in hit mesure.
 225 I hope no tong mo3t endure
 226 No sauerly saghe say of þat syzt,
 227 So wat3 hit clene and cler and pure,
 228 Pat precios perle þer hit wat3 pyzt.

20.

229 Pyzt in perle, þat precios pyece
 230 On wyþer half water com doun þe schore.
 231 No gladder gome heþen into Grece
 232 Þen I, quen ho on brymme wore.
 233 Ho wat3 me nerre þen aunte or nece;
 234 My joy forþy wat3 much þe more.
 235 Ho profered me speche, þat special spece,
 236 Enclynande lowe in wommon lore,
 237 Ca3te of her coroun of grete tresore
 238 And haylsed me wyth a lote lyzte.
 239 Wel wat3 me þat euer I wat3 bore
 240 To sware þat swete in perlez pyzte!

217 Ĉe ĉiu orlo kaj ekstrem'
218 blankis sur vestoj brile blankaj
219 perlo post perl', la sola gem'
220 ĉe pojnoj, gorĝ', aŭ fendo flankaj;
221 firme fiksita sur brusto, jen
222 perlego princa, la plej senmanka;
223 penso pereus sub la prem',
224 mezura mens', pro miro stranga;
225 ne eblus esprimado langa;
226 vanus vortaro, deficitaj;
227 pro perfektego plej altranga,
228 rava sur robo ornamita.

229 Rave, renkonte, en ravin',
230 kontraŭe stari ŝi komencis;
231 neniu ĝojis, ĝis Aten',
232 ĝojegon, kiu en mi intensis;
233 pli ol onklino aŭ nevin'
234 proksima, mia perl' parencis;
235 kronon deprenis ŝi dum klin',
236 kiel digna damo riverencis;
237 ŝi min salutis; kaj mi pensis
238 nun ke naskiĝis mi elita;
239 ŝi por paroli aŭdiencis,
240 pura, per perloj ornamita!



La vivo kaj verkoj de Vesna Skaljer-Race

Dua parto

de Suso Moinhos

145

3. La poemoj 3.1. Unuaj poemoj

Ankoraŭ dum la E-kurso en 1955, Skaljer-Race komencis verki poemojn kiel hejmtasko por praktiki la lingvon. Ŝia unua publikigita poemo, unu el tiuj laboraĵoj, estis *Printempo en Beograd*, aperinta en *La Progreso*, n-ro 27, de majo 1956. La sekvajn jarojn, kun parentezo en 1958, ŝi publikigis siajn poemojn en tiu gazeto kaj ankaŭ en *La suda stelo*. Nur kelkajn el ili ŝi elektis, jarojn poste, por *Maristo surmaste*, kaj ŝi aperigis ilin modifitaj, post perfektigema polurado. Endas do konsideri tiujn unuajn versaĵojn kiel provojn komfortiĝi en la lingvo, ekregi ĝin sufiĉe bone por fari el ĝi verŝajnan esprimilon.

Tamen certa nombro el tiuj unuaj poemoj aperis en la antologio *Reeĥoj. Jugoslavia poemaro* (Ĝivoje 1961). Temas precize pri *Sklavoj*, *Virino*, *Plendo*, *Krepusko* kaj *Mateno*. Kredeble ili viciĝis en la libro laŭ kronologia ordo de produktado, ĉar la du unuaj aperis en *La Progreso* en 1957, kaj *Plendo*, en *La suda stelo* en 1959. La saman jaron ŝiaj unuaj politikaj poemoj aperis en *La suda stelo – Prometeo* (Skaljer-Race 1961); ili entute estas sep poemoj, el kiuj kvar havas daton: aprilo 1960. Unu temas pri la naskiĝo de la Nealiancita Movado en la Konferenco de Bandungo, Javo: *Bandunga spirito*. Tiu epoko estis markita ankaŭ de la fino de kolonioj en Afriko: Ganao sendependiĝis en 1957 kaj Togolando en 1960, kaj al tiuj landoj Skaljer-Race dediĉis respektive la poemojn *Saluton, Gana!* kaj *Ablaĝe, Togo!*. Pro siaj strukturo kaj temo, ili estas kompareblaj al similaj poemoj en aliaj literaturoj. Tamen, eble ĉar ili estas forte ligitaj al preciza epoko, la aŭtorino ne elektis ilin por sia poemaro aperinta naŭ jarojn poste.

La lingvo montriĝas jam pli matura, kapabla krei intensajn strofojn per abunda uzo de personaj formoj de verboj, adverboj, aktivaj participoj kaj gerundioj, kaj takta ritmo:

Senhalte vastiĝas la granda inundo,
 torente fluas liberem' boliganta,
 muĝante forkirlas la rokojn!
 (el "Bandunga spirito")

3.2. *Maristo surmaste (1969)*

En 1969 Skaljer-Race publikigas sian unuan libron en Esperanto, 63-paĝan. La 51 poemoj de la libro estas dividitaj en kvar partojn, kaj ĉiu el ili estas anoncita per ilustraĵo de tiam ankoraŭ junaj studentoj pri belarto en la Universitato de Beogrado. La unua, kiu malfermas la libron, estas primilita desegno de Rodoljub Karanović (1948 –), kaj la ceteraj estas malgrandaj vinjetoj faritaj de Velizar Krstić (1947 –). Nuntempe Krstić estas rekonata artisto kaj profesoro en tiu menciita institucio.

La poemoj estas organizitaj laŭ temoj. Aperu laŭ kronologia ordo ebligus al ni trastudi la evoluon de la aŭtorino; tamen la laŭtema dispartigo klare montras, al kiuj aspektoj Skaljer-Race preferas turni sian atenton. En sia mallonga recenzo Baldur Ragnarsson (1969) karakterizas la kvar partojn de la poemaro: la unua, kiu arigas politikajn poemojn, estas por la islandano "reagoj, ĝenerale de indigno, kontraŭ krudaj realaĵoj en interhomaj rilatoj", la duan konsistigas "sentoj kaj pensoj ligitaj al la persona 'mondo de la deziro'", la tria enhavas poemojn pri la naturo kaj la lasta temas pri metafiziko. Ragnarsson prave konsideras, ke la plej sukcesaj poemoj estas tiuj de la lasta parto.

Mi unue analizos la politikajn poemojn. Laŭ Scully (2017) oni devas distingi inter disidenta poezio kaj protesta poezio. Kelkaj trajtoj de la protesta poezio estas la unutemeco, ĝia karaktero elektera kaj spektanta, la fokusiĝo pri la viktimoj, kaj la nemencio de la reagoj de ekspluatatoj kaj subprematoj. Kontraste, la disidenta poezio forviŝas la limojn inter publika kaj privata mondoj, parolas je la nomo de la silentigitoj, kaj kontestas la maljuston kiel parto de la mondo, ne kiel ĝia spegulo. La poemoj de Skaljer-Race apartenas al la unua grupo, la subĝenro protesta. Ŝi dediĉas poemojn al lokoj, kie oni suferas militojn aŭ kie okazas sendependiĝoj (la batalo de Solferino, Biafro kaj, pli amplekse, Vjetnamio kaj Afriko) kaj al gravaj personoj de la internacia politika areno (Patrice Lumumba, John Kennedy, Martin Luther King kaj Robert Kennedy). Krom la batalo de Solferino (1859) la ceteraj lokoj kaj personoj situas ŝian literaturan produktadon en tre precizan momenton historian, koincidantan kun la tempo de verkado. Ŝia atento centriĝas sur la tiamajn aktualaĵojn, kio evidentiĝas

firman decidon prezentiĝi kiel aktuala, moderna verkistino, sur sama ondolongo kiel poetoj de naciaj literaturoj.

Kelkaj el tiuj poemoj estas menciindaj. En *Floras ruĝe*, la aŭtorino uzas trafajn, kvankam konvenciajn, figurojn metaforajn (konsternaj okuloj – ŝtonoj, sango – floroj):

Ĉirkaŭ la granatarbo la bestoj
blasfemas kaj ridas en sangotempestoj.
Ne, ŝi ne timas! Ŝi devas trovi lin.
Ne krevu, koro, en suferkulmin'!

[...]

Minacas la krioj de la rabobestoj.
Ree de l' pafiloj aŭdiĝas la festoj:
Kunfluas la sangoj. Jen ŝi trovis lin.
Floras, floras ruĝe la patrina sin'.

En *Solferino*, Skaljer-Race uzas tiun tempe distan batalon por doni al ĝi universalan, sentempan karakteron – temas pri denunco de la terura karaktero de milito. Per tiu aktualigo ŝi pravigas la esceptan uzon de pasinta historia okazintaĵo kiel temo por la poemo. Ŝi fine diras la vorton “koloro”, veran ŝlosilon de la tuta poemo, kiu utiligas malhelajn tonojn por signifi kruelon kaj morton:

Ĉu vere alie
trankvilon portas vespero,
aŭ estas ĉie nur muŝoj kaj korvoj
en nigra, obskura aero?

Rilate la formon, Skaljer Race ĝenerale pledas por abolo de striktaj formoj metrikaj, sed tenas rimojn. Alivorte, kutime la versoj en ŝiaj poemoj estas diverslongaj, kaj ŝi dise uzas rimojn sen fiksj kombinoj. Tiu mezvoja starpunkto donas apartan karakteron al ŝiaj komponaĵoj, kiuj ne tute forlasas la tradicion. Tamen la politikaj poemoj, kies formoj estas pli regulaj ol tiuj de alitemaj versaĵoj, efikas pli intense, ĉar tiu reguleco ebligas pli emfazan karakteron en la strukturado de la denunca mesaĝo. Tiel okazas, ekzemple, en *Ĉe la limo* kaj en *Aŭgusto*, kies versoj baziĝas sur anaforoj. *Aŭgusto* apartenas al tre specifa poemtipo, karakteriza de la protesta poezio, en

kies kadro ĝi estas uzata kiel kontrapunkto al la elmontro de krudeco trovebla en la apudaj poemoj: ĝi montras male nostalgion pri pasinteco, t.e., la perditan paradizon¹:

Iam aŭgustis la koroj,
arbare, ĉemare,
liberaj je zorgoj,
posten'.

Iam aŭgusto signifis
ĝojon kaj ludon
en senzorga natura festen'.

En aliaj poemoj, tamen, la manko de strukturo igas la mesaĝon perdiĝi, faciligas la balastiĝon de la poemoj per nenecesaj vortumoj kaj kondukas al tro da analizaj, ne sintezaj strukturoj (ekz. per trouzo de prepozicioj). Tio malrapidigas la poemojn kaj malfortigas la ritmon, kaj do ankaŭ la rezulton. Tiu estas la kazo de *Al Afriko, Biafro* aŭ *Vjetnamio*.

Malgraŭ tio, indas valorigi la politikajn poemojn de Skaljer-Race (kaj ankaŭ tiujn de aliaj esperantaj poetoj), ĉar ili kreas ligan al realaj temoj, kaj tio signifas literaturan kreadon laŭ modernaj perspektivoj.

La dua parto de la libro, pri deziroj, prezentas poemojn pli tradiciajn en la temoj. Inter ili, du temas pri patrineco, respektive nuna kaj estonta: *Sklavoj en mi* kaj *Gratulo*, kiuj memorigas pri la verkoj de Clelia Conterno Guglielminetti. Simil-tamaj estas *Ne sufiĉas la vortoj*, kiun la poezia voĉo dediĉas al sia patrino, kaj *For, belaĵo*. Ĉi tiu estas aparte interesa el la retorika vidpunkto, ĉar ni ĉeestas drastan rifuzon de objektoj konsiderataj belaj, kio evidentiĝas paradokso, t.e., stranga ideo kontraŭa al la ĝenerala pensmaniero. La efiko estas potenca:

For, blankrozaj vi petaloj!
For, vi frostaj,
pinobranĉaj prujnkristaloj!

Temas sendube pri unu el la plej bonaj poemoj de la kolekto. La artifiko nei la belon de la naturo ne estas nova, kaj ĝi traspureblas ĉe pluraj aŭtoroj. Jen ekzemple la versoj de la galega romantika poetino Rosalía de Castro (1993), ankaŭ prezentantaj tiun oksimoron:

¹ Jen ekzemplo el alia literaturo: la poemo *La regno* en Ferreiro (2018).

Ódiote, campo fresco,
 cos teus verdes valados,
 cos teus altos loureiros
 i os teus camiños brancos²
 [...]

Sed Skaljer-Race uzas retorikon el la klera tradicio ne nur por konstrui siajn versaĵojn. Ŝi enplektas en ilin ankaŭ elementojn el la eŭropa folkloro, kiel ekzemple alparolo al verdaj branĉoj aŭ folioj. Tiel, la poemo *Ĉu?* komenciĝas per:

Ĉu vere mi vin ne plu vidos,
 branĉoj verdaj?
 Ĉu per vento plue vi nur ridos
 al oreloj spertaj?

En ĝi resonas popolaj kantoj balkanaj, kiel la rumanaj kaj moldavaj komenciĝantaj per la vortoj *foaie verde* aŭ *frunză verde* ('verda folio'), vortoj retroveblaj en la popolecaj poemoj de Ion Creangă aŭ en la versaĵoj de Nichita Stănescu. Lige kun la sama tradicio, mezepoka kanto de la Reĝo Dom Dinis el Portugalio diras (Tarracha Ferreira 1975):

Ai flores, ai flores do verde ramo,
 se sabedes novas do meu amado!
 Ai Deus, e u é?³

Sekvas en la libro parto dediĉita al prinaturaj poemoj. Ĝia ekzisto pravas la gravecon, kiun Skaljer-Race donis al la naturo; tamen ili ne pritraktas la naturon per deekstera rigardo, kiel ĉe Hilda Dresen, nia granda poetino pri tiu temo. Ĉi tie Skaljer-Race turniĝas al la naturo konsiderante sin parto de ĝi, kiel plia elemento en la pejzaĝo. Tiel la poezia voĉo estiĝas rilatojn kun arboj, akvo, ŝtonoj, same kiel Walt Whitman, kiun kredible konis Skaljer-Race, diplomito pri angla(lingva) literaturo. En kelkaj poemoj denove aperas la rifuzo de la belo de naturo, kiun la poezia voĉo trovas troa, sed temas pri milda rifuzo, ĉar la rilato kun la naturaj elementoj ŝanĝiĝis en ĉi parto de la poemaro, kaj tiuj ne plu estas rigardataj kiel fremdaj. Tiucele funkcias prozopopeo, kiu vidigas fratecan, intiman ligan

2 Mi abomenas vin, verda kampo / kun viaj verdaj heĝoj, / kun viaj altaj laŭroj / kaj viaj blankaj vojoj.

3 Ho, floroj, ho, floroj de la verda branĉo, / ĉu vi scias novaĵojn pri mia amato? / Ho, dio, kie li estas?

al la naturo. Ekzemple, en la poemoj *Cipreso* kaj *Ĉu ni estas ĝemeloj*, havantaj plurajn komunajn aspektojn, la poezia mio sin turnas al arboj per rektaj demandoj. En la due menciita poemo, ĝi tiagrade identigas kun la naturo de poplo, ke ĝi demandas, ĉu la arbo kaj ĝi estas ĝemeloj – verdire temas pri rekono de la patrino rolo de la Tero. Pro la karakterizo de la arbo per negativaj ecoj (“muta”, “sen kompanio”, “vane” sopiranta la ĉielon), la tuta poemo memorigas unu el la plej konataj versaĵoj de la hispana poeto Antonio Machado: *A un olmo viejo*, kiun Fernando de Diego esperantigis kiel *Al seka ulmo*. Krom la efektiva similo inter la arboj specioj ulmo kaj poplo, kelkaj fragmentoj de la du poemoj havas multon kompareblan:

Vin kisas la sunaj radioj,
salutas la lasta nubo vin flama,
sed ĉiam vi, ĉiam restas la sama,
poplo muta, sen kompanio.
(el *Ĉu ni estas ĝemeloj*)
Al ulmo duonputra kaj maljuna,
kiun la fulmoj vundis,
l'aprilo pluva kaj la majo suna
iomon da folioj verdaj pruntis.
(el *Al seka ulmo*)

Elstara poemo en ĉi tiu sekcio de la libro estas *Ĉemare*, ĉar ĝi inkludas diakronian perspektivon; per okulfermo (“fermitaj estas miaj okuloj” dufoje aperas) la fandiĝo de la poezia voĉo kun la naturo kompletiĝas – ĝi intence egaligas al aliaj neanimitaj naturelementoj. Aliflanke, la poemo *Adiaŭo (II)*, malgraŭ premiigo en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1964 (Auld kaj Benczik 1977), perdas sian ĉarmon pro iom altrudita plilongiĝo kaj pro la graveco donita al rimado.

La metafizikaj poemoj en la lasta parto forme diferencigas de la ceteraj, ĉar ili ne havas titolon kaj ĉar la aŭtorino nun definitive forgesas ankaŭ rimon. Ĝian lokon tamen jen kaj jen okupas ritmo kaj metriko, en decida veto je pli modernismaj formoj:

KIOM da lampoj, tapiŝoj,
kiom da floroj, ornamoj,
antaŭ la fendoj kaj truoj
de la vermoplenaj bretoj.

La poemoj (manke de titolo, mi citas la unuajn versojn) “Kiam okazis ke mi enterigis min” kaj “Kiam eniris mi ĉi talpokoridoron” estas teme tre simi-

laj, kaj forme tre sukcesaj. La sama sento pri enfermiteco aperas ankaŭ en verso de alia poemo: “Mi estas” (“mi brilas, / ĝemas en karcero”). La poezia voĉo ĉesas esti naturelemento por ekzisti ene de la propraj limoj; se la naturo aperas, tio estas metaforo (“ĉiu el ni estas konko perla”). La vortekonomio estas plia instrumento en la manoj de la poetino, kiu evitas ĉian balaston kaj tenas nur la esencon, kreante densajn sed fajnajn poemojn, en kiuj la artikolo ofte havas sencon ĝeneraligan, universalan:

SOLA mi estas,
tute sola.

Ĉirkaŭ mi
maro,
vakuo,
nenio.

En la flor' mi estas,
en la rid',
en la lanco
kaj stelo.

Bolas la vivo ĉirkaŭe,
la mort'.

Mi ploras fremdajn larmojn,
ridas fremdajn ridojn.

Kaj sola mi restas,
sola.

Vakuo,
maro,
nenio.

Tabelo 1. Premiitaj verkoj de Vesna Skaljer-Race en la Belartaj Konkursoj de UEA.

LOKO	JARO	BRANĈO	PREMIO	VERKO
	1962 (47a, Kopenhago)	Dramo	3a	Kafo
	1963 (48a, Sofio)	Dramo	3a	Ebriuloj
	1964 (49a, Hago)	Poezio	1a	Adiaŭo
	"	"	2a	Ĉemare
	"	"	3a	Forto
	1965 (50a, Tokio)	Poezio	Laŭda	Iu ekkredas
	"	Prozo	2a	Lumoj
	"	Dramo	3a	Rendevuo
	1966 (51a, Budapeŝto)	Dramo	Laŭda	Aventuroj de Nasradin
	1976 (61a, Ateno)	Poezio	2a	La manoj de l' homo
	"	"	3a	Turniĝas la rado de l' historio
	1977 (62a, Rejkjaviko)	Poezio	1a	La blankaj perloj
	"	Teatraĵo	2a	Post vizito
	"	"	3a	Iketo
	1978 (63a, Varna)	"	2a	En juĝejo
	1979 (64a, Luzerno)	"	3a	En policejo
	1980 (65a, Stokholmo)	Porinfana	3a	Kial
	1981 (66a, Braziljo)	Porinfana	Laŭda	Kuracisto
	1987 (72a, Varsovio)	Teatraĵo	Honora	Progreso

 Aperis en *Maristo surmaste*

 Aperis en *El la vivo*

 Konservita en la CO

 Aperis en la revuo *Esperanto*

 Perdita originalo nepublikigita

3.3. Poemoj ekde 1970

Post la apero de *Maristo surmaste* en 1969, Skaljer-Race plu verkis poemojn, kiujn ŝi ne arigis libroforme. En 1976 ŝi ricevis la duan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA pro sia poemo *La manoj de l' homo* (Skaljer-Race 1976a), en kiu pulsas la voĉo de la kroata nacilingva poeto Vesna Parun (kaj ŝia tre fama poemo *Ti koja imaŝ ruke nevinije od mojih*). La strukturo, simpla, kun anaforoj laŭ la kutima versfarado ĉe ŝi, dividas la poemon en du partojn: laŭdan kaj malŝatan pri la homa naturo (la manoj estas metonimio, kiu substrekas la karakteron de fabrikanta, kreanta homo, latine *homo faber*). La dua parto montriĝas kiel denuncio de malsato kaj milito, kio igas la tuton plia politika poemo de la aŭtorino.

De la sama jaro estas la dua premio: *Turniĝas la rado de l' historio* (Skaljer-Race 1976b), pri desapontiĝo rilate la homan historion. En la dua parto de la poemo la ĉiuversa rimado, kiun ŝi sukcese provis ankaŭ en *Adiaŭo (II)*, kune kun escepta fiksa metriko, efikas tro insiste, tro mar-tele:

Turniĝas la rado,
jen sanga, flama –
uragan' titana –
jen kvietelana,
kvazaŭ lud' infana.

Turniĝas la rado.
Restos fine nur memoro
pri la korangoro,
pri senlarma ploro
pro la sanga floro,
pri la senhonoro
de l' sklavec' iama.

En 1977 ŝi ricevis la unuan premion en la samaj konkursoj per *La blankaj perloj* (Skaljer-Race 1977b). En ĝi videblas du unuaj strofoj kun anafora demando, turniĝo al “vi”, kaj krona, lasta kaj malgranda strofo, kiu denove rememorigas pri Georgo Deŝkin (precize, pri la parto I de la poemo *Maraj skizoj*):

Jen
dise kuŝas sur blua surfaco
la blankaj mevoj...

En la kolekto de soci-politika poezio *Sub la signo de socia muzo* (Auld kaj Maul 1987) aperis tri poemoj de Skaljer-Race. *Lasu nin* (1960) kaj *Al UNO* (1960) unue publikigis en 1961 en *La suda stelo*, kaj *Kuŝante en herbejo*, kiu surhavas la indikon "(Ĉe la rivero Nidelva, Trondheim 17.8.80)", unue legeblis en la revuo *Fonto* (Skaljer-Race 1981c). *Lasu nin* estas la unua versio de *Postulo*, aperinta en *Maristo surmaste*.

4. Prozo: El la vivo (1977)

Ok jarojn post sia unua libro, Skaljer-Race publikigis duan. Tamen tiufoje ŝi volis diskonigi sian prozan kreaĵon, entute dek kvin diversspecajn novelojn, kiujn elektis kaj provlegis Ivo Rotkvić, kiel ŝi mencias en la komenco. Denove la eldonon faris la aŭtorino mem, sed sen ilustraĵoj. La titolo elokventas: granda parto el la tekstoj baziĝas sur ŝia propra vivo kaj sur la vivo de proksimuloj, de samlandanoj.

Al ŝiaj propraj spertoj apartenas "La vizito", pri la disiĝo de ŝia familio kaj la manko de la onklo, kies kaŭzo ne eksplicite aperas, sed estas lerte komprenigita al la leganto. Skaljer-Race elektas rakonti per mozaiko da fragmentoj, en formo de rapidaj vidoj, kvazaŭ temus pri provo kunmeti izolitajn memorojn. Ĉiuj fragmentoj estas unuapersonale rakontitaj de infano en prezenco, kio provizas ilin per vivanteco. Du fragmentoj ne rilatas la agadon montritan en la ceteraj. Unu el ili situas komence, kiel enkonduko, kaj temas pri la maro, same kiel poemoj el *Maristo surmaste*; la priskribo de la maro

Frapadas ĝi kontraŭ la bordon. Mi malsupreniras, proksimiĝas al ĝi. Kaj ĝi klopodas veni supren, atingi min. Mi tuŝetas ĝin per miaj fingroj, surprizite, varme.

Tio do estas la maro!

Ĝi karesas min.

Mirige: mi sentas ke ĝi apartenas al mi. Ĝi volas aparteni al mi.

Mia maro!

rememorigas pri poemoj de Walt Whitman:

You sea! I resign myself to you also – I guess what you mean,
 I behold from the beach your crooked inviting fingers,
 [...]

I am integral with you, I too am of one phase and of all phases⁴.

Alia ero, kiu interrompas la kunĉenigon de la ceteraj, parolas pri la monto Uĉka super Opatio kaj pri tiu urbo mem, naskiĝloko de Skaljer-Race. Ambaŭ fragmentoj rolas kiel ankroj al pasinteco, al la deveno (la maro simbolas tion ankaŭ biologie). La dekodado de la literatura mesaĝo en la tuta novelo postulas iom pli aktivan intervenon de la leganto, sed la efiko estas sukcesa. Ĝi estas esperanta versio de la novelo “Posjeta”, aperinta en *Istro ukradeni zaviĉaju*. Tiu serba-kroata versio estas pli riĉa en informoj: la sceno okazas en somero 1925, en Rijeka, kiam la Libera Ŝtato Fiume estis jam aneksita de Italio, kaj la familio venis el Subotica, kie ĝi loĝis, por renkontiĝi kun la onklo. Tiam la rivero Rječina estis la landlimo inter la urboj Rijeka kaj Sušak, kaj samtempe inter Italio kaj Jugoslavio. De Rijeka videblas la alta monto Uĉka kaj Opatio. En la esperanta versio Skaljer-Race evitas mencii la nomon de la urboj, kaj pri la rivero ŝi donas nur la komencan literon:

La virino tie transe, ĉu ŝi iun atendas? Ŝi staras kun la bebo en siaj manoj, ŝi nur staras mute kaj rigardas ĉi tien. De temp’ al tempo ŝajnas al mi ke ŝi ploras. Sen larmoj. Ĉu ŝi iun atendas?

Membaliografiaj aspektoj aperas ankaŭ en “Nekonataj terenoj”, kie rolas iu doktorino Dino, aliformiĝo de Drina, la fratino de Vesna. En ĝi la rakontmaniero el duondialogo, en kiu ni nur legas la voĉon de la rolulino kaj devas image rekonstrui la parolojn de la aliaj, abrupte ŝanĝiĝas al unuapersona rakontado. Temas pri sufiĉe aŭdaca artifiko, sed reveno al la duondialogo donus pli cirklan, ronde finitan aspekton al la teksto.

Ankaŭ la lasta novelo, “Soleco”, estas membiografia. La titolo estas deklaro pri unu el la ĉefaj temoj en la kreado de Skaljer-Race, aparte trovebla en ŝia poezio. La rolulino, avino identigenda kun la aŭtorino mem (ŝi mencias la premiitan poemon “Perloj”), adiaŭas la nepojn Iĉjo kaj Voĉjeto (fakte, nacilingve, Iztok kaj Vojko), kiuj forŝipas post ferioj. Laŭ la biografiaj notoj, kiujn ni disponas, ni scias, ke temas pri la domo en Premantura,

4 Mia traduko: Vi, maro! Mi fordonas min ankaŭ al vi – Mi divenas, kion vi celas diri / De la strando mi vidas viajn tordajn, incitajn fingrojn / [...] Mi estas parto de vi, unufaza kaj multfaza kiel vi. (el Whitman 2006).

kie Vesna somerumadis ekde 1968, do plej probable la novelo estas la atesto de la unua adiaŭo al la nepoj, el serio da someraj disiĝoj. La alvoko al kortuŝo de la leganto montriĝas, kiam la avino ne sukcesas malgraŭ siaj klopodoj observi la foriron de la ŝipo. Ĉioscia rakontanto malkovras al la leganto la malkvieton de la avino, kies ascendan gradacion montras la sintakso – al la fraza mallongeco aldoniĝas fine elipso de verbo kaj krio:

Ŝi rapide iras returne, al la hejmo. Eble ŝi sukcesos atingi ĝin ĝustatempe. Eble ŝia filo memoros kiel ili antaŭ deko da tagoj per intermita lumigado de la teraso salutis ŝian forveturantan fraton. Eble hazarde li ekpensos ke ŝi ankaŭ al ili povus tiamaniere sendi siajn salutojn. Kaj eĉ se neniu rimarkos ĝin, eĉ tiam ŝi mem sentos la varmon de sia propra saluto. Ofte ja okazas ke homoj al kiuj ni volas fari komplezon, iun ajn agrablaĵon, tute ne rimarkas ĝin kaj la solaj personoj al kiuj estas bele kaj varme, estas fakte ni mem, ĉar ni ne scias ke neniu rimarkis nian faron.

Ankoraŭ kelkcent paŝoj kaj la ŝtuparo. Tamen, la ŝipo jam ŝanĝas sian direkton, ĝi turniĝas al la haveneto malantaŭ la promontoro. Jen, ŝi malfruas, ŝi ne atingis!

“Mia juneco” enhavas konsiderojn pri la vivo kaj la naturo, kaj estas la novelo de la libro kun plej multe da lirika kaj ontologiaj elementoj, eble lokita en la komenco ne hazarde sed kun la celo ponte roli kun la antaŭa libro de la aŭtorino en Esperanto: “En mi troviĝas ĉio estinta iam ajn, ek de la komenco. Ek de la praa komenco”. En la frazo “Kaj mi estas tiom juna!” eĥas la poemo *Mi volus esti sola* de Georgo Deŝkin.

Alia temo en la literatura produktado de la aŭtorino estas la absurdaĵoj de milito. Profunde kontraŭmilita estas la novelo “Letero”, pri anekdoto, en kiu humaneco superas la malamikecon alportitan de milito. Pri milito temas ankaŭ “Iĉjo”; en ĝi Skaljer-Race uzas la saman teknikon uzitan en “La vizito” por elmeti antaŭ la leganton la krudajn rezultojn de milito: la serion da unuopaj scenoj disigas mezaj elipsoj, en ĝusta ekzerco de ŝparado de superfluaĵoj informoj, nenecesaj por kompreno. Temas pri esperantigo de ŝia nacilingva novelo “Ive”, premiita en 1959 kaj aperinta en *Istro ukradeni zaviĉaju*.

En “Akcidento” la aŭtorino denove montras sian konon pri rakont-teknikoj. Diversaj personoj parolas pri okazinta trafikakcidento, ĉiu el malsama vidpunkto: kun nea sinteno; kun zorgo pri la viktimo; kun fokuso sur la viktimo; kaj eskapa, kun fokuso sur si mem. Ŝi uzas internan monologon kaj duon-dialogon por bone diferencigi la rakontantojn. “Saluto”

estas bone verkita novelo, ronda, pri universala temo: miskompreno ama. La protagonisto estas virino enamiĝinta al viro, kiu subite ŝanĝis sian sintenon pri ŝi. La virino turniĝas al li, sed verdire temas ne pri alparolo sed pri interna monologo.

Aliaj noveloj estas simpatiaj anekdotoj (“Nia Marko” pri roto de gejunuloj en Bosnio, estas frua teksto, aperinta unue en *La suda stelo* en 1961; “Lumo”, pri lumturo en nokto, temo traktita ankaŭ en la poemo *Krepusko* de *Maristo surmaste*, sed nun tra humura prismo) kaj sensignifaj verkezercoj. Clelia Conterno (1978) tiel esprimis sin en sia recenzo: “Kelkaj el la eroj estas trafaj, kelkaj estas malfortaj”.

En la komenco de la 80aj jaroj aperis tre malmultaj, novaj prozaj tekstoj de Skaljer-Race en la revuo *Fonto*, kiel “Kiso” (Skaljer-Race 1981a), kaj rakonto por infanoj en *Monato*: *Hundido*.

5. Teatro

Vesna Skaljer-Race verkis ankaŭ teatraĵojn, kiuj ne aperis libroforme. Ni scias nur pri la tekstoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA. El la naŭ premiitaj teatraĵoj, nur kvin konserviĝas en la Centra Oficejo de UEA – la ceteraj estas perditaj. Do, mia analizo limiĝos al tiuj kvin verkoj: *Post vizito* (1977), *Iketto* (1977), *En juĝejo* (1978, ne konfuzebila kun la samtitola novelo en *El la vivo*), *En policejo* (1979) kaj *Progreso* (1987). Ili estas kondiĉitaj de du aspektoj. Unue, ili estas konkursaĵoj, do ilia longeco estas devige limigita. Due, plej ofte la celo, por kiu oni verkas teatraĵon, estas efektiva prezentado, kaj tiusence la esperanta teatro (la spektaklo, ne la literatura ĝenro) havas propran karakteron. Ĝi devigas al konstanta lokŝanĝo, kio nepre signifas havi malgrandan, transporteblan aŭ eĉ nulan scenografion. Aliflanke, ofte pro la diseco de la aktoroj, provludado povas fariĝi komplika, kaj tio favoras la aperon de monologistoj.

Eble tial, el la kvin verkoj, nur *Iketto* ne estas monologo, kaj nur ĝi montras dividon de la drama agado, kelkfoje tro rapida por tiom mallonga tempo de la verko, t.e., por la eta daŭro de la prezentado. Tiu divido kreas kvin *bildojn* aŭ scenetojn. La temo estas planita blago de eksaj studkolegoj al alia. La nombro de la roluloj estas ankaŭ tro alta: naŭ entute por teatraĵo, kiu facile resumiĝus en skeĉo. Tamen lokaj kaj agaj didaskalioj estas tre trafaj, kaj la ŝanĝo de objektoj sur la scenejo fare de la aktoroj mem estas rapida kaj brila solvo por la paso de unu al alia sceno, donanta aparte viglan kaj modernan karakteron al la tuto:

Miro – Jes, nature: do, Marjeta estas mia – mi diru amikino kaj – Nu, Juliŝka, ne komprenu la aferon tiom serioze! Ĝi estas nur ŝerco. Mi igis ŝin ĝisatendi nin tiamaniere, mi simple volis ke ni iomete ridu –

(Iko rigardas lin kun ia malentuziasmo)

Juliŝka – (en ŝia voĉo la emo ekkredi) Ĉu vere? Do vi mendis la scenon?

Miro kaj Gezo – Jes, certe!

Juliŝka – Ĉu vi ne opinias ke vi iom troigis, Miro? Imagu kia honto por mi – antaŭ la tuta publiko!

Miro – (piketante) Ĉu vi preferus ke ili du estu solaj en iu ĉambro?

Ĉiuj aliaj kvar verkoj havas kiel komunan temon *diferenco inter generacioj*, traktitan laŭ diversaj manieroj. En la teatraĵoj *Post vizito* kaj *En policejo* oni reliefigas la kulturalan distanciĝon, estigitan de tempopaso, inter la gepatroj, loĝantaj en la kamparo, kaj la filoj, absorbitaj de la moderna urba vivo. Vere, ambaŭ verkoj estas nova manifestiĝo de la obsedo pri soleco ofte renkontebla en la poeziaj verkoj de la aŭtorino. La nescio de la gepatroj pri modernaĵoj (telegramo, elektro) donas amar-humuran karakteron al la tekstoj, kvankam kelkfoje tio povas aspekti neverŝajna (kiel ankaŭ la absoluta misinterpreto de matĉo en la novelo “Hokeo” aperinta en *El la vivo*).

En la teatraĵoj *En policejo* kaj *En juĝejo*, Skaljer-Race uzas teknikon jam provitan en la novelo “Nekonataj terenoj”, el la supre menciita verko. Oni prezentas dialogon, el kiu tamen la spektanto povas vidi kaj aŭdi nur la duonon. Tio devigas al detala klareco en la respondoj de la sola efektiva rolulo, por plena kompreno. La risko krei tekston pli prozan ol dramon fariĝas evidenta. En juĝejo la temo, aŭ temaro, estas pli komplika. Al tempopaso kaj diferenco inter generacioj (la preskaŭ analfabeta patro havas klerajn filojn) aldoniĝas diskriminacio kontraŭ romaoj.

Laste, *Progreso* denove temas pri malsamaj kutimoj inter generacioj, sed ĉi-foje kun aparta rigardo al diskriminacio kontraŭ virinoj. Ĝia intensa feminisma karaktero igas ĝin aparte interesa, sed samtempe ĝi estas la plej proza el ĉiuj kvin teatraĵoj. Absoluta manko de ajnaspecaj didaskaliaj kaj foresto de strukturo kontribuas al tio: ĝi konsistas el sinsekvo de anekdotoj kaj epizodoj sen aga aŭ tempa rilato inter si. La fojfoja rekta demando al la publiko, aŭ aludo al ĝi, ne kompensas tiujn misojn.

6. Konkludoj

La situacio kadre de la esperanta literaturo de Vesna Skaljer-Race, verkistino tre premiita kaj rekonita antaŭ pluraj jardekoj, sed nuntempe preskaŭ forgesita, ŝuldiĝas al pluraj faktoroj. Ĉefe la decido eldoni mem siajn librojn, anstataŭ publikigi ilin en Stafeto, signis la postan disvastigon de ŝiaj tekstoj. Krome, oni devus demandi sin, ĉu la fakto, ke ŝi estis virino, helpis al la stompigo de ŝia figuro kaj, sekve, al ŝia foresto aŭ tre modesta apero en antologioj. Malgraŭ tio, ŝia voĉo estas ankoraŭ atentinda: la politikaj versaĵoj, la metafizikaj poemoj en la lasta parto de *Maristo surmaste*, kaj pluraj ŝiaj noveloj meritas pli altan konsideron en la historio de la esperanta literaturo. Estinte mem rifuĝinto el Istrio, atestanto de diversaj militoj ĝis la fino de sia vivo, ŝi sentis sin tre engaĝita en diversaj luktoj por la homa digno. Tiu postlasaĵo devas esti revalorigita laŭ ĉiuj siaj dimensioj.

Bibliografio:

- Auld, William, kaj Benczik, Vilmos (ed.) 1977: *25 jaroj: Antologio de Belartaj Konkursoj*. Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio. 71.
- Auld, William, kaj Maul, Stefan (ed.) 1987: *Sub la signo de socia muzo*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo. 64 kaj 90.
- Conterno, Clelia 1978: Gracia simpla. En: *Esperanto* n-ro 869 (majo 1978). 98.
- De Castro, Rosalía 1993: *Follas novas* 'Novaj folioj'. Vigo: Galaxia. 323.
- De Diego, Fernando 1969. Hispana liriko. Al seka ulmo. En: *Boletín*, n-ro 176 (decembro). 5.
- "Diplomirani 1933 - 1937" 'Diplomitoj 1993 - 1937), en: <http://stariweb.mef.hr/studmef/diplomand/svi-diplomirani/diplomirani-1933-1937.html>
- Ferreiro, Celso Emilio 2018: Naŭ poemoj. En: *Beletra Almanako 31*. Mondial: Novjorko. 66-75.
- Ĝivoje, Marinko (ed.) 1961: *Reeĥoj. Jugoslavio poemaro*. La Laguna: J. Régulo.
- Hawkesworth, Celia 2000: *Voices in the Shadows. Women and Verbal Art in Serbia and Bosnia*. Budapest / New York: Central European University Press. 258.
- "Hrvatski list", en http://ino.com.hr/digitalizirana-grajda/info/hrvatski_list.html
- InfoSEL*: "Vesna Skaljer-Race". En *InfoSEL*, n-ro 55, marto 1999.
- "Ivezić, Ljubica", en *Istrapedia*, <http://www.istrapedia.hr/hrv/1250/ivezic-ljubica/istra-a-z/>
- "IZLOŽBE. Rodoljub Karanović" ' EKSPOZICIOJ. Rodoljub Karanović', en: www.arhiva.sdkultura.org.rs/rodoljub-karanovic/

- Janičić, Dimitrije 2013: "Cent jaroj de originala Esperanto-literaturo en Serbio". En: *Belarta rikolto 2013*. Nov-Jorko: Mondial, 64-82.
- Kešac, K: "Narodni domovi", en *Istrapedia*. Istarska županija / Regione istriana. <http://istrapedia.hr/hrv/356/narodni-domovi/istra-a-z>
- LP: *La Progreso* 1956: "Novuloj ĝoju, malnovuloj ĝuu". N-ro 28 (junio), 1.
- Malovec, Miroslav, kaj Hršel, Mgr. Zdeněk 2001: *Cent jaroj de Esperanto en Brno. 1901-2001*. Brno: Esperantista Klubo en Brno. <http://esperanto-brno.cz/malnova/centjaroj.pdf>
- Martinov, Zlatoje 2008: Kurta trarigardo de la Esperanto literaturo monda kaj serba. En: *Beograda Verda Stelo. Kongresa numero. Unua kongreso de serbiaj esperantistoj*. 27.
- Matijašić, R: "Pola", en *Istrapedia*. Istarska županija / Regione istriana. <http://istrapedia.hr/ita/736/pola/istra-a-z>
- M[ilojević], S[imo] 1969: "Vesna Skaljer-Race aperigos sian poemaron". En: *La Suda Stelo*, 1/1969.
- Perović, Branko 2010: *Austrougarske vile i kuće u Puli. vraća memorije gradu*. 'Austraj-hungaraj vilaoj kaj domoj en Pula: redoni la memoron al la urbo'. Pula: K. Perović Marković. Fragmento legebla en: "Doktor Lovro Škaljer u Narodnom domu" 'Doktoro Lovro Škaljer en la Nacia Domo'. En: *Regional Express. Nezavisni istarki portal*. www.regionalexpress.hr/site/more/doktor-lovro-kaljer-u-narodnom-domu
- Pleadin, Josip 2006: *Ordeno de Verda Plumo. Leksikono pri Esperantlingvaj Verkistoj*. Đurđevac: Grafokom. 214.
- Ragnarsson, Baldur 1969. Sentoriĉa kaj Liberforma. En: *Esperanto* n-ro 769 (decembro 1969).186.
- Scully, James 2017: Observaciones en torno a la poesía política (extractos de una charla) 'Rimarkoj pri la politika poezio (fragmentoj el prelego)'. En: *El verso por asalto. Poesía, desobediencia y construcción antagonista*. Madrid: Tierradenadie Ediciones. 9-15.
- Skaljer-Race, Vesna 1961. "Se batalas hom' por sia idealo, lia forto estas senmezura...". En: *La Suda Stelo - Prometeo*, printempo, 2.
- 1965: *Adiaŭo*. En: *Monda Kulturo*, n-ro 12, somero, 64.
- 1968 a: *Trenuci 'Momentoj'*. Beogrado: eldono de la aŭtorino.
- 1968 b: *Istro ukradeni zaviĉaju* 'Istrio, hejmo ŝtelita'. Beogrado: eldono de la aŭtorino.
- 1969: *Maristo surmaste*. Beogrado: eldono de la aŭtorino.
- 1971: *Između blata i zvezda* 'Inter koto kaj stelo'. Beogrado: Obelisk.
- 1976a: *La manoj de l' homo*. En: *Esperanto*, 1976, n-ro 9. 150.
- 1976b: *Turniĝas la rado de l' historio*. En: *Esperanto*, 1976, n-ro 10. 164.
- 1977a: *El la vivo*. Beogrado: eldono de la aŭtorino.
- 1977b: *La blankaj perloj*. En: *Esperanto*, 1977, n-ro 9. 154.
- 1981a: "Kiso". En: *Fonto*, n-ro 7, aprilo. 19-20.

— 1981b: "Hundido". En: *Monato*, n-ro 9/81. Dua jarkolekto. 20-21.

— 1981c: *Kuŝante en herbejo*. En: *Fonto*, n-ro 13, oktobro. 20.

Stallaerts, Robert 2003: *Historical Dictionary of the Republic of Croatia*. Lanham, Maryland kaj Oxford: The Scarecrow Press, Inc.

Sutton, Geoffrey 2008: *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*

1887-2007. New York: Mondial.

Štimec, Spomenka 1983 (red.): *Kroatia poezio*. Zagrebo: IKS.

Tarracha Ferreira, Maria Ema 1975: *Antologia literária comentada. Idade média*. „Komentita literatura antologio. Mezepoko". Lisboa: Aster. 73.

"Velizar Krstic – Biography", en: <http://web.mit.edu/most/Public/YCG/krstic/krstic1.htm>

"Vesna Skaljer (Race)", en: <http://en.rodovid.org/wk/Person:321846>

Whitman, Walt 2006 [1855]: *Hojas de hierba*. Madrid: Visor.

Federico Gobbo kaj
Yuri Gamberoni:

Reklamo

Kun eseo pri la
originala komiksarto
en Esperanto



ISBN 9781595693839

76 paĝoj

**Bonvenon! Laŭra kaj Petro
malkovras Esperanton.**

Komikso en Esperanto



RECENZO

Kroniko pri onikrimoj

de Jorge Camacho

163

Septembre, surstrate en Tokio. Granda Tertremo en la regiono Kantô 1923 – Postsono de Masakro, de Katô Naoki, el la japana tradukis Mamiya Midori, Korocolor, Tokio, 2018, 205 paĝoj, ISBN 9784907239367.



Mi legis tiun ĉi libron en la urbo Pingtongo, en Tajvano, insulo kaj lando kiujn la japana imperio koloniis de 1895 ĝis 1945. Kaj jen kiel komenciĝas la antaŭparolo por la esperanta versio: “En septembro 1923, trafis Tokion senprecedenca tertremego. Pereis 105 mil homoj pro urba incendio en kelkaj tagoj. Poste, en la kaosa stato, japanaj popolanoj kaj soldatoj masakris en sia kolero sen-nombrajn laboristojn koreajn kaj ĉinajn”.

Temas pri tio kion en Hispanujo oni nun nomas “historia memoro”. Ĉi-okaze nome eviti for-

gesi la tiaman murdadon de koreaj kaj ĉinaj laboristoj (kaj, escepte, de junaj japanaj aktivuloj de laborista sindikato, aŭ de japanoj kiujn oni “erare” mortigis kredinte ilin koreoj aŭ ĉinoj).

La aŭtoro faras tion per prezentado de realaj atestoj (kun la veraj nomoj kaj de multaj murditoj kaj de iuj murdintoj aŭ murd-instigintoj) ne nur fare de supervivintaj koreaj viktimoj sed ankaŭ de personoj kiuj pasive aŭ eĉ aktive ĉeestis la krimojn; de aŭtoritatoj kaj policestroj mem disvastigintaj falsajn informojn pri neokazintaj ribelo aŭ atencoj fare de koreoj (iuj ĵurnaloj faris simile); kaj, cite el diversaj fontoj, atestoj

de volontulgrupanoj, policanoj kaj soldatoj kiuj kunkulpis kun japanaj popolanoj aŭ civitanoj en la mortigoj de koreoj kaj ĉinoj, kaj eĉ kiuj rekte mortigis.

La ĉapitroj aperis unue kiel artikoloj en specifa blogo pri la temo, kiu esploras ankaŭ la radikojn de tiaj krimoj (plej ofte en ligo kun rasismo kaj naciismo) kaj la konkretajn motivojn de la krimintoj por agi tiel, ĉefe la kredo je onisupoj pri imagitaj putvenenadoj aŭ dombruligoj fare de koreoj, en kombino kun la paniko de elitoj obsedataj pri t.n. “publika ordo”. Similan fenomenon oni observis jardekojn poste en aliaj regionoj de la terglobo kiel Ruando, eksa Jugoslavio aŭ Nov-Orleano (Usono) post la uragano Katrina en 2005.

Ni faru momente paŭzon aŭ parentezon pri la esperantigo. La kutimaj esperantujaj ‘gramatakistoj’ eble plendos pri iuj eraretoj aŭ nekutimaj lingvouzoj, el kiuj mi menciu nur jenajn: artikolo antaŭ monatemoj (p. 13: “la julio”, kaj plu en la libro), eble pravigebla anst. majusklo, malgraŭ la tradicio, tamen ne uzata sisteme de la tradukinto; trouzo de “kvazaŭ” anst. simpla “kiel” (en komparo, la ĝenerala komparvorto “kiel” sufiĉas, dum “kvazaŭ” tro emfazas la kvazaŭecon); probable misuzo de “sia” (p. 45, noto 1, en “mortigi sian ĉefon” kredeble devus esti “lian”, t.e. aliulan, ne la ĉefon de la mortiganto mem); “konsistata” anst. “konsistanta”; “apenaŭ” anst. “preskaŭ” (p. 85, 144); “Inferno” anst. “infero” (p. 187); sampaĝe, se blankulojn la tradukinto nomas blankuloj, kial li uzas por nigruloj apartan radikon “negroj”? (mi mem sentas tion ekdiskriminacia lingvero).

Persone al mi plaĉas la tradicia sobra, rekta, simpla (kvankam al mi ne ĉiam tute klara) stilo de japanoj, kio cetere neniel implicas elekton de nur fundamentaj radikoj aŭ simile. Kial “al mi ne ĉiam tute klara”? Eble pro la ĝisnuna troeŭropeco de la vorta kaj fraza sintaksoj de onia Esperanto. Indas legi ĉi tiajn verkojn jen kaj jen por forlavi de sia Esperanto almenaŭ iom de tiu troa eŭropida lingva rigideco. Kio tamen ne malvalidigas la ĉiaman dezirindecon de revizio fare de ali-lingvaj kompetentuloj, ne nur de japanoj.

Nu, ni konsciu ke tiu ĉi verko temas pri masakro kiel ĉenero inter du militoj: same kiel la krimoj de japanaj soldatoj en Ĉinujo kaj Koreujo komence de la dudeka jarcento antaŭtempis la malhumanan linĉadon de senkulpaj, sendefendaj eksterlandaj civitanoj en Tokio kaj aliaj urboj en 1923, ankaŭ tiu ĉi murdaro siavice antaŭtempis la fifarojn de la japanaj imperio kaj armeo en Azio en la sekvaj du jardekoj, ĝis Aŭgusto 1945

(kompareble, estas konate ke generalo Franco, dum la hispana interfrata milito, realigis kolonian militon kiel tiun jam provitan de li en norda Afriko, kaj same faris Hitler tra tuta Eŭropo dum la dua militego, traktante civitanojn kiel nehomojn).

La ĉi-supre menciitaj atestoj kune kreas faktofidele rakontan raporton pri la sinsekvo de la murdoj, inkluzive de harstarigaj detaloj pri la mistraktado de kadavroj, sed ankaŭ pri la aktiva kaj riska defendo de persekutataj koreoj fare de iuj japanoj.

Prave oni legas sur p. 195: “Nei la fakton de la masakro signifas pre-
pari estontan masakron”. Sed la aŭtoro trafe rilatigas la lokojn de la
tiamaj buĉadoj kun la nuno, ekzemple kun la samaj hodiaŭaj kvartaloj
de Tokio, de kiuj presitas fotoj. Ĉio tio bonvenas en la nuna epoko de fal-
saj novaĵoj, informoj kaj onidiroj, kiam eĉ verdkoraj “samideanoj” facil-
anime balotas por Bolsonaro, Duterte, Farage, Netanjahu, Orbán, Salvini,
Trump, Abascal kaj aliaj naciisme fremdulfobiaj popolfataj politikistoj.

Japanaj esperantistoj povas kaj devus legi tiun ĉi verkon ĉu en Espe-
ranto ĉu en la japana originalo. Ni, ali-naciaj legantoj, pensu pri rasismo
kaj rasismaj krimoj en niaj propra lando, historio, medio, vivo.

[Tiu ĉi recenzo aperas samtempe en *Beletra Almanako*, *Boletín de HEF*
kaj *Formoza Folio*]

bitlibroj.com




Beletra Almanako

N-ro 35 (Junio 2019) – 13a jaro

ISBN 9781595693921 / ISSN 1937-3325

NOVA ÊE MONDIAL



La vundo

Novelaro
de *Begoña Paz*

El la galega tradukis Suso Moinhos

84 p., ISBN 9781595693914

La noveloj de la galega verkistino Begoña Paz (nask. 1965) prezentitaj en ĉi tiu libro ne traktas la belajn flankojn de la vivo, sed esploras ombrojn de la homa ekzistado. Soleco, perforto, vundita pasio, malespero, timo, rompigitaj amrilatoj estas nur kelkaj el la temoj. La tekstoj estas intensaj kaj rektaj...

**MENDU ÊE UEA, via libroservo, en retaj vendejoj, aŭ vizitu
www.librejo.com**

www.beletraalmanako.com

Redakteja ret-adreso:
redaktejo@gmail.com

ISBN 978-1-59569-392-1



9 781595 693921

MONDIAL NOVJORKO

www.librejo.com